

Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo

n-ro 2 (marto 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Vejdo, Luiza Carol, Wen Yin, Pipi, Wang Xin, Laimundas Abromas, Liu Dong, Yin Jiaxin, Minosun, Fu Wen, Tong Tong, Gerrite Berveling, Mikaelo Bronštejn, Tiberio Madonna, Wally du Temple, Lily, Elena Popova, Ardo, Yi Qiao, Wđington Rocha, Eto, Tang Ren, Guozhu, Rita Mkrťĉjan, Rafael Henrique Zerbetto

AI-ilustris John Huang.

Vortoj de redaktoro

La eldonado de la unua numero de *Beletra Edeno* vekis grandan intereson ĉe multaj kolegoj. Tuj poste min atakis ondo da gratuloj, laŭdoj, proponoj, demandoj kaj duboj. Interalie, tio, kio plej emocias min, estas nia veterano, fama esperantisto Gerrit Berveling. Ĉe ekvido de *Beletra Edeno* tuj publikigita surrete, li demandis, “Ĉu mi povus kontribui?” Post du tagoj li afiŝis en Fejsbuko, ke li penis verki du tagojn, sed pro cerba infarkto li mismanipulis komputoron kaj perdis du paĝojn plene skribitajn. Li asertis, ke estas malfacile por li verki plu pro la malsano. Ho, ve! Tamen ekster mia atendo li sendis post kelkaj tagoj retmesaĝon kun naŭ poemetoj. Ĝi estas la unua kontribuo al *Beletra Edeno* el fremdlando. Mi estis ekster mi de surprizo kaj ĝojo. Nereteneble mi meditis pri liaj persistemo kaj obstineco al nia verda afero. Li ja starigas al ni brilan modelon en klopodado pri disvastigo kaj propagandado de Esperanto. Mi profunde dankas tiun estimatan maljunulon.

Kompreneble tiaj elstaraj samideanoj, kia Gerrit Berveling, estas multaj en diversaj landoj. Lastatempe, kiam mi redaktis la revuon, mi eĉ trovis, ke mia karmemora amiko kaj kunlaborinto Guozhu postlasis multon da nepublikigitaj verkoj kaj tradukoj. En ĉi numero de BE mi aperigas liajn du tradukojn por esprimi mian memorigon pri li. Kaj en la venontaj numeroj mi daŭrigos fosi en lia arkivoj kaj publikigi tiujn valoraĵojn. Samtempe mi esperas, ke tiuj, kiuj havas nepublikigitajn manuskriptojn en tirkesto, ĉu longajn aŭ mallongajn, sendu ilin al mi por aperigo.

Por respondi al kelkaj duboj, mi lakone diru kelkajn vortojn. Mi malhavas intencon paradi aŭ konkuri kun aliaj esperantlingvaj revuoj. Ĉiu revuo montras sian propran stilon kaj havas siajn legantojn. Miaflanke, mi pensas, ke BE servas al tiuj verkemuloj en beletra kreado, ĉu ili estas granduloj en Esperantujo ĉu ordinara literaturamantoj. Objektive aperigo de iliaj verkoj povas kuraĝigi ties emon pluverki. Persone mi nur diras, ke BE estas grava suplemento al tiuj gravaj esperantlingvaj revuoj.

Vejdo

05-marto-2024

Enhavo

Vortoj de la redaktoro	1
Originala prozo	
Luiza Carol: La plej grava libro	4
WenYin: (mikronovelo) Aliplanedanoj	6
Pipi: Hejmreveno	7
Wang Xin: (mikronovelo) Kiel ŝi aspektas	12
LaimundasAbromas: Oni ne plu kaptos min	13
Liu Dong: (mikronovelo) Rememoro	15
Yin Jiaxin: Elektita kiel prezidento	16
Tradukita prozo	
Chen Zhongshi: Silkraŭpoj	19
Eileen Chang: Malfeliĉa ŝi	26
Ĥristina Kozlovska: Brioĉo.....	28
Gu Hua: (mikronovelo) Li	33
Sheng Congwen: Paro da geedzoj	34
Li Nan: (mikronovelo) Plendoj	38
Maŭ Dun: Memmortigo	39
Anonima: Timiga vojaĝo	51
Chiung Yao: En profunda korto (2)	57
Originala Poezio	
Gerrit Berveling: Kelkaj poemoj	66
Mikaelo Bronŝtejn: Meditaĵoj de neĵuna viro	73
Tiberio Madonna: Tra la stratojn de vi	78
Wally du Temple: Ĉevalo, nova avataro indiĝena	82
Lily: Azeno en putro	84
Elena Popova: Parolado dum la plenluno	88
Ardo: Frua printempo	89

Yi Qiao: Nova Edeno.....	91
Tradukita poezio	
Fernando Pessoa: Sentabundo.....	93
Ai Qing: Dediĉe al la suno.....	95
Li Bai: Dek poemoj.....	98
Teatro	
Ding Xiling: Subpremo.....	107
Eseo kaj artikolo	
Rita Mkrťĉjan: Saluton, vojaĝantoj!.....	118
Rafael Henrique Zerbetto: Printempa festo en Ĉinio, karnavalo en Brazilo.....	123
Vejdo: Historiaj punktoj de ĉinesko.....	126



John Huang (黄小龙), prezidanto de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordameriko, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por du sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022 kaj 2023. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis multajn Esperanto-agadojn en la sekvaj jardekoj. Li faris la AI bildojn de ĉi tiu numero de Beletra Edeno.

John Huang (Kanado)

Foto sur la kovrilo farita de John Huang en somero de 2017 ekster Novlando de Kanado: glacimonto.

Luiza Carol (Israelo)



La plej grava libro

Tiu ĉi historio okazis en la komenco de la dudeka jarcento.

D-ro Printempo estis tre maljuna kuracisto, kiu vivis en bela urbo de Ĉinio. Li estis spertulo pri dietiko kaj akupunkturo. Ekde kiam li pensiigis, li ne plu vizitis pacientojn. Liaj eksaj lernantoj, kiuj intertempe fariĝis junaj kuracistoj, ofte vizitis lin por ricevi utilajn konsilojn, pruntepreni librojn aŭ simple babili kun la saĝa amikema maljunulo. Kelkfoje, tiuj junuloj rakontis al li pri tre novaj kuracmetodoj kaj ankaŭ alportis al li novajn librojn, ĉar d-ro Printempo estis ĉiam scivola pri novaĵoj. Pli kaj pli ofte, d-ro Printempo mem bezonis akupunkturitan terapion. Liaj eksaj lernantoj tre bonvole helpis lin pri tio; ili ĝojis pruvi tiamaniere siajn amon kaj dankemon.

Ne nur kuracistoj vizitis lin. Li havis multajn familianojn kaj geamikojn, kiuj profitis pri liaj spertoj kiam li estis juna, kaj nun ĉirkaŭis lin ame kaj respektoplene. Ofte ili kantis por li malnovajn kantojn, kiujn d-ro Printempo amis, kaj ili akompanis sin per muzikinstrumentoj. Inter liaj geamikoj troviĝis multaj eksterlandanoj, ĉar en sia juneco d-ro Printempo vojaĝis multe, gastis kaj ankaŭ gastigis multe. Krom la ĉinan, kiu estis lia denaska lingvo, li scipovis ankoraŭ kelkajn etnajn lingvojn plus Esperanton, tial li korespondadis en kelkaj lingvoj kaj ankaŭ kolektis librojn en kelkaj lingvoj. Krom fakajn librojn pri medicino, li havis beletraĵojn el la tuta mondo, librojn pri diversaj religioj kaj filozofioj, pri vegetarana kuirado, muziko, pentroarto, fizikaj ekzercoj k.a. En preskaŭ ĉiuj libroj troviĝis etaj paperoj, enhavantaj notojn kaj komentojn fare de la doktoro mem aŭ de aliaj legintoj. Kaj en multaj libroj troviĝis ankaŭ belaj paĝomarkoj, broditaj aŭ pentritaj. Kelkajn el ili pentris la doktoro mem, en sia junaĝo. Multajn librojn li ricevis de geamikoj, kiuj skribis belajn dediĉojn sur la unuan paĝon. Kelkajn librojn havis du aŭ eĉ tri dediĉojn, ĉar li ricevis ilin de geamikoj kiuj siavice ricevis ilin de siaj geamikoj. Parton el la libroj, li heredis de siaj gepatroj aŭ de siaj pli maljunaj gefratoj. Tiuj libroj havis dediĉojn adresitajn al liaj parencoj, subskribitajn de ties geamikoj, kiujn li ne ĉiam konis. Tutan historion pri amo kaj

amikeco entenis lia libraro...

Sed la tempo pasis. Iom post iom, d-ro Printempo malfortiĝis. Li preskaŭ neniam suferis pri doloroj, ĉar liaj junaj kolegoj bonege zorgis pri tio. Tamen li bezonis pli kaj pli multan ripozon kaj silenton. Li jam akceptis nur malmultajn gastojn, pli kaj pli malofte. Li ne plu pruntedonis librojn; li donacis ilin al tiuj, kiujn li amis. Li pasigis multan tempon sola, trafoliumante siajn karajn librojn antaŭ ol donaci ilin. Li skribis sur la unuajn paĝojn varmajn kortuŝajn dediĉojn (ofte aldonitajn al antaŭaj malnovaj dediĉoj) kaj ame donacis siajn librojn unu post la alia. La librobretaroj pli kaj pli malpleniĝis, kaj la librojn anstataŭis florpotojn. S-ro Printempo ne emis admiru florajn senigitajn de radikoj kaj velkiĝantajn en vazoj. Li preferis potojn kun bona grundo, en kiuj liaj plantoj kreskis kaj ekfloris, vivante tiom longe kiom eblis. Tiuj plantoj ĝuis la sunon enirantan la ĉambron tra grandaj fenestroj, kaj dum someraj tagmezoj, kiam la lumo estiĝis troa, delikataj kurtenoj protektis ilin.

Post kiam neniu libro troviĝis sur la bretaroj, dro Printempo komencis pasigi longan tempon meditante inter siaj floroj pri la homoj kaj la libroj kiujn li amis en sia vivo. Iamaj amikoj kaj libroj ofte enigis liajn sonĝojn, dum la pli kaj pli multaj horoj kiujn li pasigis dormante. Unu nokton, aperis en lia sonĝo tiu fascina ĉina poeto kaj filozofo, vaste konata en la tuta mondo laŭ sia kromnomo: La Maljunulo. En la sonĝo, La Maljunulo ŝajnis la spegula imago de la doktoro. Li ridetis afable kaj etendis la manon al la doktoro.

“Ne timu,” – diris La Maljunulo – “eĉ mil-kilometra vojaĝo komenciĝas per unu nura paŝo.”

La doktoro vekigis kun profunda emocio. Li parkeris tiujn famajn vortojn de La Maljunulo en sia infanaĝo, sed nun la samaj vortoj akiris pli profundan signifon por li. Longtempe li meditis pri tiu sonĝo. Fin-fine li serĉis en sia ŝranko malnovan kartonan skatolon. Tie, inter malnovegaj fotoj kaj desegnoj, troviĝis flava eluzita libro. D-ro Printempo estis ĉirkaŭ kvin jaraĝa, kiam li ricevis de sia patro tiun libron. Nun li malfermis ĝin per tremantaj manoj. Sur la unua paĝo videblis la vortoj, kiujn lia patro skribis tiam: “Tiu ĉi estas la plej grava libro de via vivo”. Inter la bildoplenaj paĝoj, la doktoro trovis kartonan paĝomarkon, sur kiun li mem desegnis floreton iam, per sia mallerta mano de eta infano. Sur la dorsa flanko, la paĝomarko blankis, kvazaŭ ĝi atendus ke oni aldonu al ĝi ion.

D-ro Printempo aliris sian skribotablon kaj kaligrafiis per peniko sur la blankan flankon de la paĝomarko, la faman aforismon de La Maljunulo: “Mil-kilometra vojaĝo komenciĝas per unu nura paŝo.”

Longtempe li trafoliumis la karan libron. Poste li enmetis la paĝomarkon en ĝin kaj lasis ĝin sur la skribotablo.

Tiuvespere, La Maljunulo denove vizitis lin en sonĝo kaj denove etendis al li la manon. Kuraĝe, scivole, trankvile, serene, d-ro Printempo faris la unuan paŝon sur la nova nekonata nebula vojo.

Post tiu sonĝo, la doktoro neniam vekigis.

La sekvan tagon, kiam la gefiloj de d-ro Printempo eniris la floroplanan ĉambrom, nur unu nura libro troviĝis tie, sur la skribotablo. Ĝi estis la unua ABC-libro de ilia patro.



Mikronovelo

Wen Yin (Ĉinio)

Aliplanedanoj

En la vilaĝo estas orfino nomata Nasa. Ŝi ofte kurante krias: “Nebone, venas la aliplanedanoj!” Fakte vilaĝanoj neniam vidis aliplanedanojn, sed ŝi senĉese faras tion. Ŝi havas sekreton, ĉar ŝi estas superpova soldateto. Ĉiufoje, kiam la aliplanedanoj venas ataki, ŝi batalas kontraŭ ili kaj venkas. La vilaĝanoj, kiuj koleras kontraŭ ŝi, ankaŭ havas sekreton. Vespere de ĉiu semajnfino, ili, kun jutsako kovranta sin, ludas kun ŝi.

Pipi (Ĉinio)



aŭtoro Pipi

En la superbazaro ondis miloj da homaj kapoj. Interpuŝigante, la homoj pene moviĝis. Mi kaj mia edzino helike boris nian vojon tra la homrivero, malrapide kaj malfacile.

Pasis longa tempo antaŭ ol mia edzino kaj mi bremsis la paŝojn antaŭ vendotablo ŝarĝita per grandaj skomberomoroj.

"Mi volas aĉeti skomberomoron kaj fari el ĝi farĉon de ĝjaŭzioj dum la Printempa Festo. Kion vi opinias pri tio?" mia edzino petis de mi opinionon.

"Bone, se vi volas!" mi ĝoje kapjesis.

En nia regiono, ĝjaŭzio estas unu el la tradiciaj frandaĵoj, precipe la ĝjaŭzio farĉita per spicita fiŝa haketaĵo estas tre populara. Laŭmore ni kutime faras ĝjaŭziojn kaj manĝas dum la Printempa Festo.

Aŭdinte nian interparoladon, la vendisto, mezaĝa kaj mezstatura, staranta malantaŭ la vendotablo, tuj servis nin kun granda fervoro. Indikante la skomberomorojn, li ekkriis:

"Bona kaj freŝa fiŝo malkara, malkara!"

"Kiom kostas unu kilogramo da ĝi?" sondtone demandis mia edzino.

"Kvindek juanojn."

"Kio? Kvindek juanojn?" mia edzino diris surprizite, kun larĝe malfermitaj okuloj. "Kiel ĝi estas tiel kara? Antaŭ kelkaj tagoj, ĝi estis tre ĉipa kaj unu kilogramo kostis nur tridek juanojn."

Hejmenreveno

La Printempa Festo havos lokon en Ĉinio nur post tri aŭ kvar tagoj. Ĉiu familio vigle okupiĝis preparante por la festo.

Tre frue en la mateno mi kaj mia edzino eliris sur la straton.

Estis ankoraŭ fride, malgraŭ ke jam printempis.

Pro la proksimiĝo de la Printempa Festo, la stratoj estis escepte movplenaj, kaj ĉie pulsus vigla vivo.

Post duonhora piediro ni eniris en superbazonon.

"Jes," la vendisto sincere respondis, "la prezon altigas ne mi, sed la pogradisto. Ĉar la Printempa Festo jam staras sur la sojlo, ĉio estas terure multekosta. Por diri la veron, mi profitas ne multe, kaj neniam mistifikas miajn klientojn."

Mi sciis, ke tio estis nur intencaj preteksto kaj mensogo. Estis vero, ke multaj komercistoj profitas de la Printempa Festo por plialtigi la prezojn de varoj kaj fari profiton per diversaj malhonestaj rimedoj.

Sen plua marĉando kun la vendisto, mia edzino senkomente okultaksis la fiŝojn kelkan tempon, kaj fine celis unu el ili.

La vendisto metis la fiŝon elektitan de mia edzino sur la pesilon, pesis, kalkulis kaj anoncis la prezon.

Paginte la vendiston, kun la fiŝo enmane mi kaj mia edzino turniĝis kaj pretis foriri de la vendotablo. Ĝuste kiam ni estis farontaj niajn paŝojn antaŭen, mi trafis junulon, kiu, aspektanta sufiĉe juna, probable dudekkelkjara, kun etaj okuloj kaj densaj lipharoj, kaj kun nevuso granda kiel nigra sojfabo sur la liva alo de la nazo, estis ŝovanta sian dekstran manon en poŝon de maljunulino, kiu, pli ol 70-jara, simple kaj modeste vestita, kun griza hararo kaj sulkiĝinta vizaĝo, estis staranta ĉe vendotablo antaŭ ni kaj okupata elektante ajlojn bulbon post bulbo. Ŝi estis tiom absorbata per la elektado, ke ŝi nenion perceptis pri la ŝtelado far la junulo.

"Temas pri poŝoŝtelado? Ĉu la junulo estas poŝoŝtelisto?" mi demandis min enkore, kaj samtempe malpeze kubutumante mian edzinon, flustris al ŝi en la orelojn: "Jen la poŝoŝtelisto ŝtelas la monujon de la maljunulino!"

"Tio ne estas via afero. Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon! Zorgu pri via propra monujo! Ni iru!" Ĵetinte oblikvan rigardon al la junulo, mia edzino okulsignis al mi, ke mi silentu kaj ne zorgu pri tio.

Mi silentis. Kun kapo flanketurnita kaj spirado retenita, mi sekvante mian edzinon antaŭen ŝtele okulsekvis la junulon, kaj samtempe ŝovis miajn fingrojn en la poŝon por kontroli, ĉu mia monujo estas en ordo.

Dank' al Dio! Mia monujo estas sekura!

La junulo eltiris la manon el la poŝo de la maljunulino. Malplena mano! Kredeble estis nenio en la poŝo. Li vane penis kaj nenion rikoltis. Ŝajnis, kvazaŭ li ne volis rezigni. Kiel serpento postĉasis predon, li kroĉis sian rigardon sur la alian poŝon de la maljunulino. Post iom da paŭzo, li denove etendis sian manon al la poŝo. Kun fulma rapideco li per du fingroj eligis nigran monujon el ĝi. Ĉifoje li sukcesis! Li tuj enpoŝigis la monujon, turnis sin, ekkuris. Kiel fulmo tratanĉas la nubojn, tiel li rapide puŝis sin tra la homamaso, kaj poste malaperis el mia vido.

Pri tio la maljunulino nenion sciis. Ŝi ankoraŭ estis okupita de elektado de ajloj.

Estis la unua fojo en mia vivo, ke mi propraokule vidis kiel poŝoŝtelisto ŝtelis aĵon.

La ŝtelado estis tuj antaŭ mia nazo, tamen mi malhavis la kuraĝon malhelpi ĝin kaj nur apudstarante rigardis kun senfaraj manoj. Pro tio mi sentis honton.

Ŝajnas al mi, ke la maljunulino estas de la vilaĝo kaj vivas ne en bona stato. Se ŝi trovos, ke ŝia monujo estis ŝtelita, kio okazos al ŝi? Ĉu ŝi eksplodos en ploregon, aŭ svenfalos, aŭ kolapsos, aŭ venos al frenezeco, aŭ ...

Kun peza koro mi kaj mia edzino foriris de tie, kaj trenadis nin pluen, pluen kaj pluen en la navedaj homfluoĵ.

Post proksimume kvaronhoro da malfacila travado, mi kaj mia edzino finfine elŝiris nin el la densa formike moviĝanta homamaso.

Ĝuste kiam ni starante ĉe la elirejo de la superbazaro volis iom ripozi kaj spiri freŝan aeron, ondo da ploroj trafis niajn orelojn. Ni turnis niajn okulojn al la direkto, de kie venis la ploro, kaj vidis, ke sur la vaka tereno live de la eliro, dista de ni plurajn metrojn sidante ploregas iu maljunulino, ĉirkaŭ kiu kolektiĝas multaj homoj.

Kio okazis al la maljunulino?

Puŝataj de scivolemo, ni ekmarŝis tiudirekten.

Kiam ni atingis la lokon, ni rekonis en ŝi ĝuste tiun maljunulinon, kiu zorge elektis ajlojn kaj kies monujo estis ŝtelita en la superbazaro.

En la frosta vento, la maljunulino, malmulte vestita, kun haroj taŭzigitaj, kun nazmuko fluanta, dolore kaj malespere ploregas kaj kriegas, ambaŭmane senĉese bategante la teron:



"Monujo, mia monujo, mia tuta mono, 1000 juanoj, mia tuta familia ŝparaĵo, akirita per la ŝvitoj de mi kaj mia maljuna kunulo, estis for. Kiu, diablo sen konscienco, aĉulo inda je mil hakoĵ, ŝtelis ĝin? Redonu, redonu al mi la monujojn! Ho, ĉielo! Ho, mia kara patrino! ..."

Kiaj histeriaĵ korŝiraj plorkrioĵ, similaj al tiuj ĉe entombigo! Ili estis raŭkaj kaj tirataj, jen kaj jen interrompitaĵ de spasmaĵ plorsingultoĵ. Ilin aŭdinte, oni ne povis ne verŝi larmojn.

Komencis aŭdiĝi zumado en la apudstarantoĵ. Iuj murmuris, "Okaze de la Printempa Festo ekstreme vigliĝas la poŝoŝtelistoĵ, la kompatinda oldulino ne

devus kunporti tiom da mono kun si!" Aliaj senrankore diris, "Vere estis tre malzorgeme! Kiel malatentis la maljunulino pri sia monujo!" Aliaj indigne sakris: "La damnindaj ŝtelistoj estas tre malbonaj, tro abomenaj, vere indaj je fulmotondro!"

"Se ni tiam malhelpus la ŝteliston! Se ni tiam malhelpus la ŝteliston!" murmuretis mi al mia edzino.

"Jes, se ni tiam malhelpus la ŝteliston, ĉio ĉi ne okazus. Eble estus mia kulpo. Sed, sed ..." mia edzino diris, ne sen bedaŭro en la voĉo. Evidente, ke ŝi estis iom turmentata de pento kaj rimorso.

"Sed kio? Nenia sedo! Ni tiam devus ..." mi rebatis.

"Sed mi timis ..., se ni ..." mia edzino heziteme vortumis, kvazaŭ ŝi havis ion hontindan en la koro por eldiri. Mi bone komprenis kion ŝi celis diri. Post momenteto, ŝi kaŭriĝis antaŭ la maljunulinon, dirante: "Onjo, de kie vi venas? Kiel vi sola butikumis? Kie estas viaj familianoj? Kial ili ne akompanis vin sur la straton por fari aĉetojn?"

Aŭdinte la demandojn de mia edzino, la maljunulino ĉesis plori, kun larmoj en la okuloj, spasme plorsingultante sin konfidis al mia edzino: "Mi loĝas en vilaĝo tuj apud la maro, malproksima ĉirkaŭ tridek liojn for de ĉi tie. En mia hejmo restas nur tri homoj, mi, mia nepo Hundeto kaj mia edzo, kiu kuŝadas malsana sur la briklito. Mia sola filo mortis de malsano kiam mia nepo estis nur 2-jara, mia bofilino, unu jaron post la morto de mia filo, forlasinte nin reedziniĝis al viro de alia provinco, kaj mia nepo, ĉijare 24-jara, estas la sola espero de mi kaj mia edzo. Ni prenis sur nin la devon varti kaj prizorgi lin dudekelkajn jarojn. Pro li mi kaj mia edzo suferis multe kaj nur post tiom da penoj ni sukcesis lin plenkreskigi. Li nun estas en suda Ĉinio entreprenante la okupon de la ... kiel-ĝi-nomiĝas? ho, mi forgesis, ĉiaokaze bela okupo, mi fieras pri tio. Li jam de tri jaroj ne revenis hejmen, antaŭ kelkaj tagoj li telefonis al ni dirante ke li hejmenveturos por la Printempa Festo. Je tio, mi kaj mia edzo frenezis de ĝojo. La Printempa Festo, festo de familia kunestado, ĉu? Kiel mi sopiras, ke ni kaj mia nepo bone festu ĝin kune! Por mia nepo, mia plej kara koro, por mia familia rekuniĝo, mi devas prepari abundajn frandaĵojn. Tre frue ĉimatene mi perbuse veturis en la urbon por fari la butikumon, sed mi ne atendis, tute ne atendis, ke ... ke ... Sen mono, por ne paroli pri la aĉetado de objektoj, eĉ hejmeniri mi ne povas! Ho, mia maljuna kunulo, certe maltrankvile atendas mian revenon! Ho, mia nepo! Ho, mia povra nepo, forestas en la hejmo de tri jaroj! ..."

Je mencio de sia nepo, la maljunulino ree eksplodis per larmoj.

Ĉe tio, la okuloj de mia edzino iom malsekiĝis. Post momenta medito, ŝi decideme elprenis el sia monujo centĵuanan bileton kaj prezentis al la maljunulino,

dirante: "Onjo! Ne ploru plu, kaj ne ĉagreniĝu! Mankas al vi mono por reveturi hejmen, ĉu ne? Ne grave, mi povas helpi vin per cent juanoj, kaj vi hejmenveturu kiel eble plej frue. Ne lasu vian maljunan kunulon suferi de longa atendo! Jen estas cent juanoj. Ili ne multe valoras, sed ..." mia edzino sufokiĝis.

Okazis ekmoviĝo inter la ĉeestantoj. Multaj homoj enŝovis sian manon en sian poŝon.

Vidante la monon donitan de mia edzino, la maljunulino digis la larmojn, kaj, levante ambaŭ manojn kunplektitajn kaj kun vangoj ruĝiĝantaj, singene diradis per plorema voĉo: "Dankon! Dankon! Ĉie sin trovas bona homo, bona homo ... Mi dankas vin, mia tuta familio dankas vin! ..." Tion dirinte, la maljunulino tuj ŝanĝis la sidan pozon je pozo genua, kvazaŭ por koŭtoŭi antaŭ mia edzino.

Ĝuste tiumomente en la homamason abrupte enstrudiĝis junulo kun ĉapo, malhelaj okulvitroj kaj blanka masko. Li rekte alpaŝis la maljunulinon, tuj stopis ŝin kaj levis, per dekstra mano kun mallonga montrorofingra stumpo, bandaĝita, ankoraŭ sangoeksudanta, kvazaŭ ĵus amputita, elpoŝiĝis manplenen da bankbiletoj kaj ŝovis ĝin en la manon de la maljunulino, dirante: "Olda Avinjo, jen estas 1000 juanoj por vi!"

Kaj tuj poste, li elprenis el la mano de la maljunulino la centjuanan bileton kaj metis en la manon de mia edzino, dirante: "Dankon, onjo! Jen via mono, mi redonas ĝin al vi, mi kore dankas vin! Lasu min sola helpi ŝin! Mi mem helpu ŝin!" Post tio, la junulo sin turnis de mia edzino al la maljunulino.

Kiel la maljunulino, mia edzino kaj mi, tiel ankaŭ la tuta ĉeestantaro estis tute konsternitaj kaj konfuzitaj de la nekredablaj ago kaj vortoj de la neatendita enstrudiĝinto.

Momento da silento.

Kun okuloj larĝegaj fiksataj al la maskito, la maljunulino panike demandis per tremanta voĉo: "Ĉu vi, vi ..., kiu ...?"

Sen rekte respondi, la junulo senprokraste kaŭriĝis, kaj diris: "Olda Avinjo, iru hejmen! Mi sendu vin al la stacidomo!"

Ĉe la lasta vorto, la junulo tuj ekis surdorsigi la maljunulinon.

Kun granda peno, la junulo prenis la maljunulinon sur la dorson. Apenaŭ li estis preta por rektigi sian dorson, subite liaj okulvitroj falis sur la teron. Li tute ne ĝenis sin pri tio, kaj li eĉ perforte unutire forŝiris la ĉapon kaj la maskon.

Vidiĝis lia tuta vera fizionomio!

Aspektis, kvazaŭ tiu vizaĝo estis al mi tre konata. Atente okulesplorinte ĝin dum iom da tempo, mi preskaŭ eksaltegis kaj ekkriegis pro ŝoko. Mi apenaŭ povis kredi al miaj okuloj. Denove aperis en mia menso la bildo de la poŝostelado vidita de mi en la superbazaro. Antaŭ ol mi ovris mian buŝon, mia edzino voĉetis al mi: "Jen!"

Jen li! Ĉu li ne estas la junulo, kiu ŝtelis la monujon de la maljunulino? La etaj okuloj, la densaj lipharoj, precipe la granda nigra nevuso sur la liva alo de la nazo! Mi bone memoras lin kaj rekonas unuavide."

"Jes, ĝuste estas li, kiu ŝtelis la monujon de la maljunulino!" mi rankore direktis. Starinte kelkan tempon, la junulo, kun larmovualitaj okuloj, senvorte faris profundan riverencon antaŭ la ĉeestantoj, poste turnis sin kaj foriris kun la maljunulino sur la dorso.

La rigardantoj tujtuj disiĝis por fari al la junulo la vojon.

Post la junulo la sango el lia fingro falis, faladis, guto post guto, postlasante sur la tero longan longan elipsosignon de sangomakuloj.

Leviĝis tondro da aplaŭdoj en la amaso. Ĉiuj okuloj plenaj de admiro fokusiĝis al la junulo. Ĉiuj superŝutis la junulon per laŭdoj kaj benoj: "La junulo estas tre bonkora kaj helpema! Dio benu lin!" "Virtulojn rekompencas bono!" "Vera kompatema junulo!" "Kiu estas la junulo?" ...

Foris, foris la junulo ...

Rigardante al la iom-post-ioma foriĝanta silueto de la maljunulino sur la dorso de la junulo, mi kaj mia edzino finfine faris ekspiron de faciligo.

Kiu estas la junulo efektive?

Eble nur mi kaj mia edzino ambaŭ scias!

Mikronovelo

Wang Xin (Ĉinio)

Kiel ŝi aspektas

Mi blindiĝis pro akcidento, tial mi ne konis, kiel aspektas mia koramikino. Tiujare, ŝi suferis de stomak-kancero. Ĉe sia morto, ŝi postulis al kuracisto grefti ŝian korneon al mi. Kiam mi revidis la lumon, la unua afero, kiun mi faris, esti serĉi ŝian foton ĉie kaj mi trovis koverton lasitan de ŝi, en kiu estis malplena foto. Sur ĝi skribiĝis jenaj vortoj: "Ne pensu, kiel mi aspektas. La junulino, kiun vi amos post mi, portas mian aspekton."

Laimundas Abromas (Litovio)



Oni ne plu kaptos min

Estis la kvara horo posttagmeze. Trans la fenestro pluvis. Aĉis aŭtuna pluvo, senĉese kaj ekde la mateniĝo, blovis malvarma vento. Mi sola sidis en mia loĝejo antaŭ televidilo. En la ĉambro tamen estis agrable varme. Miaj artikoj postulis kuracilon, tamen prefere en somero. Mi fermis la okulojn kaj ekvidis la varmegan afrikan sunon, flavoruĝan sablomaron, palmojn balancantajn en la sablaro, kamelan karavanon, marŝanta paŝon post paŝo trans la dezerton... La vera fabelo.

aŭtoro Laimundas Abromas



-Mi tre volas al Afriko! - mi laŭte ekkriis kaj saltis de sur la seĝo! – Por vojaĝi en Marokon mi fordonos ĉion ajn!

Enspiris mi profunde la aeron kaj longe tuis. Neatendite eksonis la telefonaparato. Komence mi ne volis respondi, ĉar malofte iu telefonadis al mi. Tamen mi aliris ĝin kaj prenis aŭskultilon. Mi eĉ malfruis eldiri “halo”, iu voĉo superis min.

-Dominiko, ĉu estas vi? – suspektinde demandis telefoninto.

“Li mian nomon scias!” – mi timtremis. Miaj okuloj malheliĝis. Mi metis aŭskultilon kaj komencis nervoziĝi. “Kiu telefonis al mi? Kion bezonis tiu telefoninto?” - nestis en mia kapo. Mi staris konsterniĝinte, kvazaŭ ŝtoniĝinta.

Post dudek minutoj eksonis sonorilo ĉe la pordo de mia loĝejo. Mi silentis. Mi ĵetrigardis sur la spegulon, kiu pendis apude sur la muro, kaj ekvidis mian senkoloran, paliĝintan bildon... Sur la pordon iu ekfrapis. Mi ankaŭ ekfrapis, poste aŭskultis. Mia koro febre batis. Ekster la pordo denove iu persiste frapis la pordon kaj eĉ krietis.

-Oho-ho ! - respondis mi.

-Kiu estas tie? – aŭdiĝis trans la pordo ekscitiĝinta voĉo .

“Kiu estas...?” – ekbalbutis mi. -Tamen tiel demandi povas nur tiu, kiu estas interne.

Iu daŭre frapis sur la pordon.

-Kiu vi estas? - finfine ekkuraĝis kaj demandis mi.

-Salomono, kluba prezidanto, - aŭdiĝis ekstere.

-Neniu estas hejme! - mi respondis malkuraĝe.

-Sed kiu parolas ĉi tie? - demandas tiu ekster la pordo.

-Vi misaŭdis, - jam pli kuraĝe respondis mi.

-Sed pro kio videblas la lumo? - ne cedis tiu ekster la pordo.

-Tuj mi elŝaltos ĝin, - mi parolis.

-Dominiko, ĉu estas vi? - ne ĉesis tiu ekstere.

-Li ne estas ĉi tie! - jam kuraĝe parolis mi.

-Sed kie li estas? - aŭdiĝis trans la pordo.

-Li foriris!

-Kien li foriris?

-Vi serĉu lin en la tombejo!

-Kiun?

-Dominikon! - jam kriis mi.

-Iu idioto! - jam kriis tiu ekster la pordo kaj ŝajne foriris.

“Mi trompis lin,” -ĝojis mi ankore.

Jam tedis li, naŭzis min tiu Salomono, tiu kluba gvidanto. Lia senbrideco transpaŝis ĉiujn limojn. “Vi ne forgesu pagi membrokotizon... Vi ŝuldas asocian kotizon... Vi abonu Esperantlingvajn periodaĵojn... Vi aĉetu Esperanto-librojn... Vi ne vizitas klubajn kunvenojn... Vi, Dominiko, pensas nur pri vi... Vi forgesas komunajn aferojn, Esperanto klubon... Vi ne atentis esperantistan komunumon!.. Vi pensu pri interna ideo kaj movadaj fenomenoj...” - nestis en mia kapo la vortoj, ofte eldirataj de kluba prezidanto Salomono. Liaj vortoj vundis

miajn personan honoron kaj dignon. Al la homoj neniam plaĉis kaj neniam plaĉos la krudeco, malspriteco, stulteco, malĝentileco, altrudemo, klaĉado, blasfemado, kriado. Al mi ankaŭ tio ne plaĉas. Kion mi devis respondi al li? Aĥ, ĉu mi bezonas ĝin, tiun komunumon? Verdire, sufiĉas la spaco por diversa esperantista individua aktivado. Ĉu Esperanto klubo povas fari ion sen mono?... Iru li for! Pro tiaj gvidantoj multaj esperantistoj forlasas la kluban agadon, rifuzas Esperanton.

“Ĉu vi estas esperantisto?” - multaj homoj demandas min.

“Jes.” – respondas mi.

Sed iuj esperantistoj jam ne kuraĝas konfesi sian esperantistecon. Ili elturniĝas, grimacas. Kvazaŭ esti esperantisto – afero hontinda. Kvazaŭ ĉiuj devas esti stultuloj aŭ stranguloj. Mi ankaŭ longedaŭre ne kuraĝis konfesi, kio mi estas. Mi pensis, ke la homoj komencos montri kaj piki min perfingre.. Sed foje mi ekkuraĝis kaj diris kiel statas la afero:

“Esperanto ne estas la danĝera lingvo, kaj esperantistoj ne estas damaĝuloj.”

Tamen niaj kontraŭuloj ne dormas: - “Ni atentos, ĝis vi mem spontane mortaĉos,” - balbutas ili. – “Longe vi ne eltenos”.

Sed mi ne atentis ilin. Ili povas paroli ĉion, kion ili volas. Multaj malamikoj de Esperanto delonge mortis kaj malaperis. Esperanto tamen restis – ĉiam pli forta, ĉiam pli progresanta. Mi komprenis; ne indas honti mian esperantistecon. Mi iru mian vojon kaj ne gravas, kion oni parolas pri mi. Oni parolis, parolas kaj parolos. Ni iru la vojon celitan.

En Esperanta klubo ni kantadas: - “Esperanto estas la lingvo por ni, por ni...” Poste ni ridetas kaj ĝojas. Naiva espero, ĉu ne? Sed jen, por ke venu fina venko – espero mankas.

Post la “ke” por mi ĉiam rompiĝas la pensoj. Mi tre bedaŭras, ĉar post “ke” kaŝas sin multaj mirindaj aferoj, post ke ...

Mikronovelo **Liu Dong (Ĉinio)**

Rememoro

Vespere, kiam Avino forlasis la mondon, Avo akompanis ŝin en malsanulejo dum la lasta peco de ŝia vivojo. Lastspire ŝi diris al li: “La lernohoroj finiĝas.” Ĉe tio Avo, kiu afektis sin trankvila, eksplodis per plorado. Post la funebra ceremonio mi demandis al Avo pri tiuj tri vortoj. Li diris al mi, ke, kiam ili vizitis bazlernejon, ŝi ofte diris al li: “La lernohoroj finiĝis. Ni rehejmiĝu kune!”

Yin Jiaxin (Ĉinio)



Elektita kiel prezidento

aŭtoro Yin Jiaxin (Ĉinio)

Por festi la kvindekjaran naskiĝtagon, tiuvespere mi kun amikoj drinkadis ĝis ebrieco en taverno. Hejmen irinte, mi ĵetis min sur la liton kaj ekdormis profunde. Baldaŭ kelkaj oficialuloj entrudiĝis en mian ĉambron kaj vekis min, deklarante, ke mi estas ĵus elektita prezidento de la Hunonga Respubliko, kaj ke mi devas tuj veturi al la Blua Palaco, la prezidenta rezidejo, por fari la paroladon de enoficiĝo.

Oni subtenis min je la brakoj ekster mian domon al grandspaca aŭto, en kiu bela kaj eleganta junulino serene ridetante al mi salutis: “Estimata sinjoro Iskal Etfó, saluton! Gratulon al Via Moŝto! Mi estas via ĉefsekretario, kaj vi povas voki min fraŭlino Lulu.”

“Pro kio vi volas min?” mi demandis delire.

“Sur la altano de la Blua Palaco faru paroladon al la Hunonga popolo.” Ŝia voĉo aŭdiĝis dolĉa kaj tenera.

“Kion paroli?” Mi estis perpleksa.

“Ĝuste legu ĝin.” Dirante ŝi donis al mi du paperfoliojn, dume, mi atentis ke ŝi havas plenan bruston kaj delikatajn manojn.

Ĉiuj ministroj estis vice atendantaj min sur la altano. Akceptinte ilian omaĝon, mi malsupren ĵetis la rigardon kaj vidis, ke sur la placo amasiĝas miriadoj da homoj kun konfuza bruo de voĉoj kvazaŭ ondanta marsurfaco, iuj tenas flagojn kaj iuj mian portreton. Fraŭlino Lulu paŝis antaŭen, dum mi okulmezuris, ke ŝi havas altan staturon kun svelta talio, kiun mi deziras ĉirkaŭbrakumi. Al la laŭtparolilo fraŭlino Lulu per sia pasia voĉo ekparolis: “Saluton, karaj gesinjoroj, Bonan vesperon!”

Silento ekregis sur la placo.

“La granda elektado jam finiĝis kaj ni ekhavas novan gvidanton.” Fraŭlino Lulu entuziasme daŭrigis: “Nun, ni bonvenigu al Lia Moŝto, sinjoro Iskal Efto, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Nova Demokrata Partio de Hunongio, prezidento de la Hunonga Respubliko kaj prezidanto de la Centra Milita Komisiono de la Nova Demokrata Partio de Hunongio, fari gravan paroladon!”

Aplaŭdado resonis kiel tondro.

Tuj kiam mi kapkonfuze finlegis la tekston de la du paperfolioj, la spektantaro eksplodis en surdigajn aklamojn, ĝojkriadante sloganon: “Hura, Iskal Efto! Vivu Hunongio!”

Sekve okazonta estis festeno en bankedejo de la Blua Palaco. Mi, kondukata de fraŭlino Lulu kaj sekvata de la ministraro, descendis de la altano kaj paŝis laŭ verando, kiu estas ambaŭflanke borderita per statuoj de nudaj belulinoj kun bela vizaĝo, rondaj mamoj, gracia figurlinio kaj amorveka pugo. Mi nereteneble laŭdis: “Kiel elegantaj! La skulptisto estas talenta.”

Aŭdinte mian laŭdon, fraŭlino Lulu ekturnis sin kaj al mi demandis: “Ĉu la skulptisto devas promociiĝi?”

Mi jese balancis la kapon kaj ŝi tuj alvokis la ministraron pri kulturo, dirante: “Lia Moŝto, sinjoro Iskal Efto, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Nova Demokrata Partio de Hunongio, prezidento de la Hunonga Respubliko kaj prezidanto de la Centra Milita Komisiono de la Nova Demokrata Partio de Hunongio, havas gravan instrukcion: Kiel elegantaj la statuoj estas! La talenta skulptisto devas promociiĝi.”

“Bone,” la ministro humile kapjesis, dirante: “Morgaŭ matene mi deklaras la skulptiston vicprezidanto de la Tutlanda Arto-Asocio.”

Fraŭlino Lulu tre ĝojis, ĉar la skulptisto estas ŝia onklo.

Efektive mi rimarkis, ke fraŭlino Lulu havas pli amorvekan pugon ol la statuoj. Dum irado ŝi lulis la pugon tiel logincitete, ke mi vere volis ĝin palpi.

En la kolosa bankedejo staris kelkdeko da pladplenaj larĝaj tabloj, ĉirkaŭ kiuj sidis homoj. Ĉe mia eniro, gaja marŝo eksonis, ĉiuj stariĝis kaj aplaŭdadis laŭ la takto de muziko. Fraŭlino Lulu kondukis min kaj la ministraron al la honora tablo. Mi venis al la plej honora seĝo kaj per kapbanlanco kaj mangesto silentigis kaj sidigis la ĉeestantojn.

Kiam fraŭlino Lulu por mi verŝis vinon, mi ŝtele etendis manon malantaŭ ŝin kaj ekpalpis ŝian elastan pugon. Ŝi al mi subkomprene ĵetis koketan okulumadon kaj rideton, tiel ke mi enkorre ekzaltiĝis, decidante tranokti kun ŝi en la prezidenta dormoĉambro.

La pladoj estis tre bongustaj, mi avide manĝis kaj manĝis preskaŭ ĝisgorgĝe. Fine mi sentis la ventron doloreta pro satago. Fraŭlino Lulu demandis al mi ĉu la pladoj plaĉas. Mi kontente diris: “La kuiristoj havas bonan kuirarton. Kiu estas la ĉefkuiristo?”

“Estas mia frato.” fiere respondinte, fraŭlino Lulu mallaŭte demandis: “Ĉu li povas promociiĝi?”

“Kompreneble!” Ridetante mi ekkaresis ŝian grasetan pugon.

Fraŭlino Lulu tuj alvokis la ministron pri nutradministrado, dirante: “Lia Moŝto, sinjoro Iskal Etfó, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Nova Demokrata Partio de Hunongio, prezidento de la Hunonga Respubliko kaj prezidanto de la Centra Milita Komisiono de la Nova Demokrata Partio de Hunongio, havas gravan instrukcion: La kuiristoj havas bonan kuirarton! La ĉefkuiristo devas promociiĝi.”

“Bone.” la ministro humile kapjesis, dirante: “Morgaŭ matene mi deklaras la ĉefkuiriston vicprezidanto de la Tutlanda Nutr-Asocio.”

Tiutempe la ventro doloris al mi tiel forte, ke mi ekhavis emon kontentigi miajn naturajn bezonojn. Al fraŭlino Lulu en la orelon mi flustris: “Kie estas necesejo? Ordonu iun konduki min.”

Fraŭlino Lulu urĝe sendis alvoki la ministron pri higieno. Post nelonge la ministro anhele galopis al mi, streĉite dirante: “Saluton, via estimata Moŝto! Via humila servisto atendas vian gravan instrukcion.”

Eltenante mian ventrodoloron, mi laŭeble montris min aplomba. Fraŭlino Lulu diris al la ministro: “Lia Moŝto, sinjoro Iskal Etfó, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Nova Demokrata Partio de Hunongio...”

Ho ve, la ĉielo! Mi apenaŭ povis elteni plu, tamen fraŭlino Lulu ankoraŭ daŭrigis la titoloprezentadon: “...prezidento de la Hunonga Respubliko kaj prezidanto de la Centra Milita Komisiono de la Nova Demokrata Partio de Hunongio, havas gravan instrukcion...”

“Krak...!”

Mi ne povis elteni min kaj laxis en la pantalonon.

En palpebruma daŭro, la ministro kaj ĉiuj ĉeestantoj dise forkuris. Fraŭlino Lulu, kun unu mano kovranta sian nazon kaj la alia pinĉanta mian orelon, kolere surprizkriis: “Terure! Terure! Vi malpurulo!”

Mi baraktis kaj baraktis. Finfine mi vekiĝis kaj trovis, ke estas mia edzino kiu pinĉas mian orelon, insultante: “Vi malpura viro! Vi denove laxis surlite! Vi ne devas nomiĝi Iskal Etfó. Vi devus inverse nomiĝi Ofte Laksi...”

Chen Zhongshi (1942-2016)



Silkraŭpoj

Eltirinte bulon da jam kompaktiĝinta kotonon el la vatita jako ĉifona kaj kruda, tiel zorgeme kaj diskrete mi taŭzis ĝin kaj pligrandigis, ke ĝi estu mola kaj disetendiĝema. Poste sur la kotonan bulon mi metis pecon de nigra papero el juto, grandan

kiel kupra monero kaj plene punktitan de silkraŭpaj ovoĵoj, kaj enigis ĝin volvitan en la ĉemizan poŝon, kiu algluiĝis al mia brusto, por ke ĝi estu varma. En la fajfado de la instruisto mi hastis al la lasoĉambro reformita el la templo Guan Yu (heroo, honorita kiel milita dio) kaj eksidis ĉe la granda kvadrata tablo alportita el mia domo, sur kiu sin trovis malfermita libro.

La instruisto, ĝiba, eniris tra la templa pordo, kies farbo jam deskvamiĝis, kaj stariĝis. Iom kapturnite, la malgrandan ĉambron li trarigardis kaj poste iris sur la estradon, sur kiu ne plu estis la argila statuo de Guan Yu. La tuta ĉambro silentis. Nur el la gorgo de mia najbaro, Ming'e, elkuris siblo.

“Anoj de unuajara klaso skribu grandajn ideogramojn, de tria kaj kvara malgrandajn, kaj de dua havu lecionon.”

La instruisto pendigis multiplikan tabelon sur la nigra tabulo kaj per instruista montrovergo gvidis nin laŭtlegi:

“Sesoble unu faras ses...”

Mi sekvis, kaj malkaŝe palpis la bruston: jen mola kotonbulo, kiu jam varmiĝis de mia korpa temperaturo.

“Sesoble naŭ faras kvindek kvar.”

Ŝajnis al mi, ke raŭpoj moviĝas sur la brusto. La mano jukis al mi, ke mi volus elpreni la bulon. Sed la rigardo de la instruisto fiksiĝis sur min, mi rektiĝis tuje...

En neeltenebla atendo mi restis. Kiam la leciono finiĝis, mi min forpafis. Sub la posta tegmentorando de la templo (Ming'e diris, ke la raŭpo ne povas esti rekte sub la suno), mi malvolvis la kotonan bulon. Aj, ili eloviĝis! Sur la nigra papero kuŝas du raŭpoj etaj kiel formikoj, senmovaj. Origine, la du estis purpurenigraj, kaj nun aspektis blankaj. Unu kokan plumon mi uzis por glupreni raŭpon kaj milde meti ĝin sur leontodan folion en la malgranda ladskatolo, kiun mi jam delonge pretigis. Je mia rerigardo jen aliaj du morde malfermis la ovajn ŝelojn, elŝovante siajn

nigrajn kapetojn, kaj la korpoj plejparte ankoraŭ restis en la ovoĵo, malfacile torde rampantaj.

“Fajf...” eksonis la fajfilo por leciono.

“Anoĵ de duajara klaso skribu grandajn ideogramojn...”

Vere ĝojige, ke ni penikos! La instruisto iris doni lecionon al la kvarajara klaso. Mi elprenis paŭspaperon kaj metis ĝin sur la modelon de ideogramoj, kaj malfermis la skatolon por inkuĵo... Ĉu la du raŭpoj eloviĝis? Se jes, ili neniel mortis sub premo.

Finfine mi ne povis min deteni. Mi elprenis la kotonbulon. Jen la du eloviĝis, kaj aliaj tri aŭ kvar tramordis la ŝelon. Mi enmanigis la plumon kaj malfermis la ladskatolon. Ming'e ŝtele alproksimiĝis por min helpi, kaj ankaŭ Shuanniu enŝovis sian kapon...

Pum! sur mian kapon falis peza bato. Antaŭ miaj okuloj disflugis oraj steloj. Apenaŭ mi falis de sur la benko. Tuj eksplodis ridego en la tuta ĉambro. Mi vidis la instruiston kun la vergo en la manoj, kiuj sidis sur lia dorso ĝiba, staranta malantaŭ mi. En konfuzo la skatolo kaj la kotonbulo falis teren. Premante la ardan doloron sur la kapo, mi ankoraŭ ŝtelrigardis la skatolon jam renversitan surtere.

Unu granda piedo de la instruisto etendiĝis, preter la benko sur kiu mi sidis, sub la tablon kaj... la skatolo platiĝis. Kaj per alia treto disrompiĝis ankaŭ la kotonbulo en kiu nestis raŭpoj. La okulojn mi fermis... ili estas beboj ĵus eloviĝintaj!

La sinjoro revenis antaŭ la vicon de la tabloj apartenantaj al la kvarajara klaso. La ĉambro tiel silentis kiel en dezerta valo.

Finiĝis la lecionaj horoj. Apenaŭ mi atingis la hejmon, mia panjo kriis: “Iru sendi manĝon al instruisto!”

Denove alvenis al mia familio la vico por liveri senpagan nutron al instruisto. Mi ne moviĝis, nek elparolis.

“Oĵ, ŝajnas, ke vi estis punita.” Panjo rigardis mian vizaĝon kaj konjektis: “Estas certe, ke vi petolis kaj ne serioze skribis.”

Mi ankoraŭ staris apud la lito, senvorte.

Panjo preterpase palpis la “tuberon” sur mia frunto. Mirigite ŝi rondigis siajn okulojn: “Aĵa! tiel granda tubero!” Malferminte miajn harojn, ŝi rigardis kaj kriis: “Fi al tiu sinjoro, kiu eĉ knabeton batis tiel kruele! Eĉ la verton frapi senpense...”

Miaj larmoj fluis malsupren.

“Sen bato, ne estos taŭga homo.” Mia patro fendis lignon en la korto, laŭte dirante: “Kiu lernanto ne spertus vergobaton?”

Panjo suspiris: “Sendu manĝon al instruisto.”

“Ne!”

“Iru!” paĉjo majeste ordonis, “sinjoro en lernejo estas ĝuste kiel patro aŭ patrino.

Li batas vin nur por ke vi estu promesplena.”

Portante ceramikan vazon kun milia kaŝo en unu mano kaj bambuan korbon kun blankaj vaporumitaj pastobuloj kaj surteleraj plado kaj papriko en la alia mano, mi eliris tra la strata pordo. Tiel blankan pastobulon mi povis gustumi probable nur tiam en festoj.

Enirinte la ĉelon kie loĝis la instruisto, mi riverencis lin kaj surtabligis la vazon kaj la korbon. Mi retiriĝis kaj staris sur la tera placo ekster la pordo por atendi ĝis li finmanĝos.

“Venu!” alvoko eliĝis el la ĉelo. Nu finiĝis la manĝado.

Mi eniris kaj pretis kolekti la vazon kaj telerojn.

La instruisto haltigis mian manon kaj, montrante la kolordeseĝnitan teleron, diris: “Alportu tiujn aĵojn hejmen, forĵeti ilin estas malpermesite...”

Sub mia vido restis peco el pastobulo manĝita sur la kolordeseĝnita telero, sur kiu iam estis peklita plado, kaj miksaĵo el milio, eta kiel fingropinto. Mi tuj ruĝiĝis, ĉar tio estis la plej senindulga riproĉo al fameliestro kiu liveris nutron.

Panjo vidis tion, tuj falsidis sur la benkon, kaj honto regis sur ŝia vizaĝo.

Ankaŭ la vizaĝo de mia paĉjo fergriziĝis de kolero. Li prenis la teleron kun la peco el pastobulo kaj la miksaĵo el milio kaj forte ĵetis ĝin for en la korton.

Posttagmeze, kiam mi iris al la lernejo, Ming’e tiris min ĉe la elirejo de la vilaĝo kaj malavare diris: “Mi donacos al vi alian pecon de papero kun raŭpoj.

Indiferente mi respondis: “Mi ne bezonas.”

“Kial?”

“Mi ne volas... bredi silkraŭpojn.”

Kelkajn tagojn poste, en la lernejon venis nova instruisto. Oni dividis la klasojn. La unuajara kaj duajara klasoj estis submetitaj al la nova instruisto.

Li estis tre juna. En lenin-stila kostumo kun du vicoj de grandaj butonoj antaŭ la brusto li staris sur la podio kaj ridete prezentis sin al ni: “Mia familia nomo estas Jiang (*ĝjang*)...” Sekve li turniĝis kaj, pinĉpreninte stumpon de kreto el ties ujo, serioze skribis sian nomon sur la nigra tabulo, dirante: “Mi nomiĝas Jiang Yusheng (*juŝeng*).”

Kiel strange! Kutime, lernantoj tabuis nomon de instruisto, same kiel tiun de praulo. Neniu el ni aŭdacus pridemandi nomon de instruisto. En nia elementa lernejo kun ĉ. kvardek lernantoj estis nur unu instruisto, do ne necesis nomo por alvoko. La nova instruisto tamen sin prezentis per sia nomo. Tio por mi estis ekstravaganca, kiel ajn ĝi estis kalkulata. Kiam li ekparolis, aperis du elstaraj kojnodontoj, kaj la okuloj ĉiam sin tenis ridetantaj: “Unuavice ni havu lecionon de muziko. Kiun kanton vi scipovas kanti?”

Ni ĉiuj rigardis unuj al la aliaj, neniu donis respondon. Ni scipovis kanti neniun

kanton, ĉar neniu instruis al ni kanti. Mi mem povis zumi nur kelkajn versojn de *Brodita Saketo*, kiun instruis al mi mia panjo.

La instruisto Jiang transskribis la tekston sur la nigra tabulo kaj gvidis nin kanti: “La ĉielo de la liberigita regiono estas blua...”

Nur unu verson tamen ni neniel povis kanti harmonie, ni knaboj, vivantaj en izolita montovilaĝo kaj neniam trejnitaj pri ia ajn muziko. Mi ne povis malfermi la buŝon pro ĝeniĝo, la gorgo kvazaŭ estis ŝtopita de io bulsimila. Senkaŭze mi larmis. Post kelka tempo, en la kantado de la instruisto kaj lernantoj, pograde fandiĝis la malmola aĵo en mia gorgo, kaj la menso ankaŭ malŝarĝiĝis. Kun la buŝo larĝe malfermita mi kantis:

“La ĉielo de la liberigita regiono estas blua...”

Mi rampis sur tiun maljunan morusarbon malantaŭ la vilaĝo. Plenbrakon da morusfolioj mi ŝiris kaj ĵetis al Ming’e. Glitante malsupren, senatente, mi falis sur la teron. Dumlonge mi ne povis leviĝi. En la buŝo mi sentis iom da saleco, jen ĝi sangis. La doloro ardis al mi.

“Kion faris vi ambaŭ?” la instruisto Jiang mirigite demandis.

La kapon mi klinis pli malalte.

Li kaptis min je la brako kaj iris al sia malgranda loĝejo. Ĉi-foje mi devus esti regalita per vergosvingo! Mi pensis, ke li batos min ne en la klasoĉambro, sed en sia vivoĉambreto, sen nenies vido...

Enirinte la ĉambbron, li elprenis el tablokesto bulon da kotono kaj de ĝi tiris pecon, kiun li volvis ĉirkaŭ stangeton de alumeto. Post kiam li trempis la stangeton volvitane de kotonpeco en ruĝa akvo kiel ruĝa inko en flakono, li ŝmiris mian vizaĝon per ĝi. La vundo doloris al mi kaj brulis, sed en la koro fluis nekutima varmo. Lia mano, kiu metis sin sur mian kapon, memorigis min pri la sento, kiun donis al mi mia patrino, kiam ŝi karesis mian verton.

“Kiel vi vundiĝis?” li demandis.

“Sur arbo... pluki morusfoliojn.” kun timo mi respondis.

“Por kio pluki ilin?” ŝajnis ke li estas tre interesa pri tio.

“Nutri silkraŭpojn,” al mi timo ne plu estis.

“Oj!” li gajis, “ĉu multaj lernantoj bredas raŭpojn?”

“Ming’e, Shuanniu (ŝuan-niŭ)...” mi nomis kelkajn, “estas multe!”

“Kiom vi bredas?”

“Mi...” abrupte min atakis tristo, “mi ne bredis.”

“Bone.” Li ne konis la aferon, kaj en la ridetantaj okuloj glimis vigla scivolemo, “por kio vi bredas raŭpojn?”

“Por fari kuseneton por inkujo.” Miaj vortoj multiĝis, “meti raŭpojn en malplanan ujon, kie estiĝos peco de delikata silko en reto.”

“Kiel interese!” li ĝojis, manaplaŭdante, “bredi ĉies silkraŭpojn kune kaj meti ilin ĉiujn ĉe mi; kiam lecionhoroj atingis sian finon, ni ĉiuj iros kolekti morusfoliojn, por ke ĉiu el la lernantoj havu unu silkan kuseneton por sia inkujo. Ĉu vi volus?”

“Bonege!” de ĝojo mi saltis de sur la seĝo.

Sekve, dum vespero li gvidis nin trakuri montojn kaj valetojn por kolekti raŭpofoliojn. Foje, li glite falis sur deklivo, kaj la verda suko de herboj makulis lian pantalonon, tamen li sin tute ne ĝenis pri tio. Li diris, ke lia hejmo troviĝas sur ebenaĵo, kaj li ne iam iris montovojon.

Vespere de frua somero, la lastaj radioj de la subiranta suno ruĝigis la klaran akvon en la rivero. Gvidate de la instruisto Jiang, ni nin senvestigis, saltis en la riveron por frapi akvon. Ni batalis perakve. Ni unuigis kontraŭ li. De ĉiuj direktoj ni ŝpruciĝis al li akvon. Kun la fermitaj okuloj li levis siajn manojn, kaj sur la vizaĝo fluus kelkaj strioj da akvo. Li kapitulacis, ŝajnigante peti de ni indulgon.

En alia tago mi kaj Ming’e alportis plenbrakon da morusfolioj, kaj apenaŭ ni eniris la ĉambron de la instruisto, ni stuporiĝis.

La instruisto sidis sur la seĝo, ŝtoniĝante kaj mienante tre bedaŭre. Kiam li vidis nin ambaŭ, li milde diris: “Pardonu min!”

Mi estis konfuzita. Ming’e kaj mi rigardis unu al la alia.

“Musoj... hieraŭ nokte... ŝtelmanĝis la raŭpojn!”

Mi kaj Ming’e kuris al la bambua korbo. Jen restis nur kelkaj! La raŭpoj, tiel grasaj kaj dikaj kiel fingroj, devontus ŝpini silkan reton nur post kelkaj tagoj. Kiel fiaj musoj!

Ming’e agis tre malavare: “Sinjoro, ne gravas. Mi alportos aliajn de mia hejmo...”

La instruisto amare ridetis, skuante la kapon.

Mi sentis min afliktita. Mi ne volis ke la konstante ridetanta vizaĝo varias en ĉagrenon, do mi rapide konsolis lin: “Ilia familio havas multajn... korbojn da raŭpoj!”

Tri tagojn poste, du aŭ tri raŭpoj jam rampis sur la randon de bambua korbo, tutkorpe orbrilaj. Kun la kapoj levitaj ili moviĝis, kvazaŭ gustoplene recitantaj poemojn. Ming’e kriis de ĝojo: “Ili baldaŭ ŝpinos silkon!”

La instruisto malfaris la kartonon, kie li entenis siajn vestojn; ni helpis por tondi ĝin en pecojn, kiujn ni traligis per fadenoj kaj faris fakoj. Kiam ili ne plu bezonos manĝon, ni metos ilin en la fakojn.

La silkon ŝpinitan da raŭpoj ni premis plata. Tiel ni faris ripete, ĝis silkopeco, unu post la alia, produktiĝos en la kartonaj fakoj.

La raŭpoj sinsekve rampis sur la randon de korbo, tiam ni transprenis ilin en la

fakojn. La instruisto kaj ni ĉiuj dronis en gaja atendo.

“En mia skatolo por inkujo mi baldaŭ sternos silkopecon!” la instruisto estis tute ekster si de ĝojo, kiel infano, “kiel signife, ke tiuj silkoraŭpoj breditaj de la lernantoj, kiujn mi la unua instruas, produktis silkopecojn! Kien ajn mi iros en la estonteco, kiam mi malfermis la skatolon de inkujo, mi ja vidos vin...”

La sekvantan tagon, post matenmanĝo, ni havis la unuan lecionon. Li eniris en la klasoĉambron kun teko por instruaj paperoj, sur kiu estis lernolibroj kaj ujo por kretoj, kaj suriris la podion, kiel kutime. En la krio de la monitoro “stariĝu” mi stariĝis, tiam mi vidis, ke en la okuloj de la instruisto sin kaŝas ia aflikto nedirebla. Li staris surpodie, tamen forgesante reciproki saluton al ni per kapsigno. La kretujon li eĉ renversis per mana tuŝo kaj konfuzite balbutis: “Lernantoj, ni komencu nian lecionon pri muziko...”

Kio okazas? Hieraŭ postagmeze ni jam spertis muzikan lecionon. Mi maltrankviliĝis, kaj ŝajnis ke en mi forte leviĝis ondo da acida humoro. La instruiston ĝeno hantas, certe!

Kun trudita rideto la instruisto diris: “Vi sekvu min: ‘Printempa vento trablovas la vastan kamparon...’”

Subite mi vidis, ke tuj post lia kanto de verso el lia okulangulo fluas strio da larmoj. Li tuj sin turnis por forviŝi la larmojn. Poste, li returniĝis kaj, tremante en la voĉo, rekantis: “Printempa vento trablovas la vastan kamparon...”

La buŝon li fermis, ĉar li ne povis eligi sonon. Ĉe Ming’e eĉ eksplodis “Ŭa!”. Li ekploris. En la ĉambro neniu sekvis la kanton.

“Mi foriros, kaj mi pensas lasi al vi unu kanton,” li ne plu daŭrigis, ĉar la larmoj denove fluis malsupren. Antaŭ la lernantoj li forviŝis la larmojn kaj laŭte instigis: “Lernantoj, kantu!”

Ankaŭ li mem ne povis plui. Abrupte li turnis sin kaj eliris.

Ni ĉiuj eliris el la ĉambro kaj svarmis en la malgrandan ĉelon de la instruisto. Ni staris entute silente.

Liaj litajo kaj libroj jam estis pakitaj en ordo. Li staris apud la tablo kaj kun trudita rideto diris: “Mi ne povas atendi ĝis la raŭpoj produktos silkoreton. Vi... prenu raŭpopaperojn... hejmen!” tion dirinte, li levis la retsakon kaj surdorsigis la litajon.

Ni deprenis de li la pakaĵojn, elirante la loĝejon. Transe, en la malgrandaj fenestroj de la triajara kaj kvarajara klasoj aperis kapetoj, unu ĉe la alia. Kun sono de severa riproĉo ili ĉiuj malaperis senspure.

Mi forte tremis: ĉu ni devos reveni al la ĉambro de la ĝibulo?

Elirinte la templon kaj transpasinte la malgrandan valon, ni vidis la teron vaste sterniĝantan. Finfine mi ne povis min deteni: “Sinjoro Jiang, kial vi devas foriri?”

Li rigardis min kaj milde diris: “Transpostenigo laŭ superaj aŭtoritatoj.”

“Kial fari transpostenigon? Vi ĵus alvenis!” demandis Ming’e.

La instruisto iris kaj, kun la buŝo firme fermita, ne parolis.

Mi aldonis: “Kial ne transpostenigi la ĝibulon?”

La instruisto rigardis jen min, jen Ming’e, kaj elbuŝigis: “Estis homo, kiu raportis pri mi al superulo kaj akuzis ke mi eldorlotas infanojn.”

Mia koro kovrita de nebulo nun estis iom lumigita, kaj mi ekmemoris multajn komentojn en la vilaĝo. Vilaĝanoj ne toleris tiun ĉi modan sinjoron, kiu en tuta tempo ludis kun infanoj, havante neniam instruistajn manierojn. De la antikveco kiu vidus ke instruisto duone nudigas sin kaj faras akvan batalon kun lernantoj? Kia nedecaĵo! Mi svage memoris, ke mia patro iam diris tiajn vortojn kune kun kelkaj maljunuloj sub la granda soforo. Tiu instruisto, kies nomo ankoraŭ ne estis konata kaj kiu okupis la templeton, ankaŭ svingis sian kapon kaj manon meze de kamparanoj. Je granda surprizo ili ne toleris instruiston kiun amis knaboj!

Printempe post pli ol tridek jaroj, en kunveno organizita de la eduka sistemo de la gubernio por honoro elstarajn instruistojn, neatendite mi premis la manon de la instruisto Jiang. Li portis medalon de “tridek instruaroj” sur sia brusto, kaj sur lia vizaĝo faltoplena radiis la ora brilo.



elĉinigi **Minosun** (Ĉinio)

Kien ajn, eĉ en la rando de la tero, mi kunportis tiun ĉi ligilon de sento, kiun mi ricevis en la unua printempo, kiam mi eniris en la socion.

La maljunulo akceptis la silkopecon kaj rigardis la oran silkoreton kun ĉiuj silkaj fadenoj en ordo. Gutis sur ĝin du vicoj da larmoj.

Li petis ke mi donu al li novelojn publikigitajn.

Mi elprenis por li silkopecon el la taglibro.

“Vi vere konservis ĝin dum tridek jaroj?” li miris.

Kiel eblis? Mi rakontis al li. Post kiam mi finis mian lernadon en mezlernejo, mi revenis al la vilaĝo kaj instruis ankaŭ en la lernejo, kiun oni nove konstruis post la malkonstruo de la malnova templo. En la unua printempo mi ja memoris ke ni devas teni silkoraŭpojn varmaj. Kune kun lernantoj mi bredis raŭpojn, faris silkopecon kaj sternis ĝin en skatolo por inkujo.

Eileen Chang (1920-1995)



Malfeliĉa ŝi

Elĉinigis Lin Run

La aŭtuna serena ĉielo disvolvis vaston da bluo, purigante nuberojn. Ĉe la ekstremo de la vasta ĉielo etendiĝis senlima klara akvaro. Ondantaj martajdoj similis al la mola brusto de belulino, spiranta en la blua reto, eligante sonorajn kaj mildajn ondbrunojn.

aŭtorino

Kelkaj purblankaj mevoj vigle flugis super la akvaro. En ĉi impona pejzaĝo unu boato alfloris per remado malrapide. En ĝi sidis du viglaj knabinoj, apenaŭ dek-jaraj. Kun nuda brusto kaj strikta naĝvesto ili montris siajn nudajn rozetajn femurojn kaj ofte metis ilin sur la randon de la boato, por ke ondŝaŭmoj kisu ŝiajn piedojn. Ili ne timis montri siajn aŭdacaĵojn. Ili strikte sin brakumis, apogis unu al la alia, babilis, ludis. En iliaj okuloj videblis la lumo de naiva kaj sincera amo al la vivo.

Loĝante tuj ĉe la plaĝo ili estis intimaj kunlernantoj de la bazlernejo M. Kiel burĝonantaj floroj ili vivis kaj kreskis ĉe la lazura akvaro. Hodiaŭ, eble dum ferioj, ili plezure ludis en la mezo de la maro.

“Fratino Yong (*jong*), vidu tiun tubecan marherbon. Ĉu ĝi ne similas al la tubherbo, kiun vi fajfas? Mi levprenu ĝin kaj fajfos per ĝi al vi,” dirante, ŝi klinas sian korpon, apogas sin sur la boatrandon kaj etendas la manon en la akvon.

Fratino Yong haste ŝin retenis, dirante “Vin gardu. Tio ne estas ludo, se vi falus en la akvon. Terure ondas, ĉu ne?” Ŝi ne plu eligis vortojn kaj nur premis sin firme al la sino de fratino Yong.

Nokta kurteno lante vuale falis. La mirinda strio da vesperruĝo ore farbis la marondojn. En la lumo penetranta en la marfundon, kantante mildan kanton ili hejmeniris per malrapidaj paŝoj.

Krepusko malheliĝis kaj voris ilian ombron

Post kvin jaroj la patro de la amikino de fratino Yong mortis. Ŝi iris kune kun ŝia patrino al sia onklino en Ŝanhajo por vivteno. Tiuj du amikinoj inklinemaj unu al la alia disiĝis kun larmo en la okuloj.

Pliajn jarojn ŝi vivis en movplena urbo kaj iom post iom plenkreskis, kiel rozo en plena disflorado. Post diplomitiĝo de supera mezlernejo ŝi komencis vivi lukse. En ŝia menso mallariĝis malrapide fratino Yong kaj naĝado en la maro.

Kiam ŝi estis dudekunu-jara, ŝia patrino, pro kadukeco kaj menskonfuziteco, subite volis edziniĝi ŝin al dando! Ŝi flamiĝis de kolero kaj ĉagreniĝo kaj decideme rifuzis ŝin. Kaj plie ŝi kolerece riproĉis la patrinon, tiel ke tiu svenis pro kolero. Ŝi, aroganta kaj libermensa, ĉasis memstarecon — por rompi putrantan konvencion — tio, kion ŝi povis fari por la tutviva feliĉo estis larmoplene kaj decideme forlasis sen scio de sia patrino.

Post kelkjara vagado ŝi informiĝis pere de amiko pri la morto de la patrino. Dum sia hezitado pri kien ŝi devis iri, ŝi subite ricevis la informon pri fratino Yong, kio eltiris el ŝi dankemajn, malĝojajn kaj ekzaltajn larmojn. Post diplomitiĝo el porinstruista kolegio fratino Yong servis en komerca rondo kelkajn jarojn kaj edziniĝis al malnova amiko. Nun ŝi jam havis belan kaj viglan filinon. Ĝuste kiel antaŭ dek jaroj ŝi vivis ĝojan vivon ĉe la plaĝo.

Post ioma korespondado fratino Yong sciigis, kiel ŝi vivas, kaj inviti ŝin al ŝia loĝejo por kelka tempo. Ekpensinte ŝi konsentis per letero.

Ŝi hasteme revenis. Kiam ŝi vidis la naskvilaĝon inter brila ĉielo kaj blua maro. La akumulantaj tristeco kaj ĝojo en ŝi alvarmis al la koro. Ondo da ĉagreniĝo solviĝis en varman larmon kaj elfluis. Pro longatempa disiĝo, kiam ŝi unue vidis fratinton Yong, ŝi ne sciis, ĉu ŝi devas ĝoju aŭ malĝoji. Kaj fratino Yong ankoraŭ tenis antaŭan trankvilecon kaj mildecon, krom iom malgrasa.

“Vi malgrasas vere!” subvoĉe murmuris fratino Yong.

Ŝia koro brue batis. Vidante, ke la edzo kaj la filino de fratino Yong donas agrablan akcepton, ŝi sentis ĉagreniĝon de tempo al tempo.

Post unu semajno ŝi subite foriris en sekreto. Ŝi forlasis paperslipon, kiu legiĝis:

“Mi ne povas elteni vidi vian ĝojon, kiu formigas al mi mian tristecon!

Adiaŭ! Kuniĝo kaj disiĝo estas ordinara afero en la homa vivo. Kiel ajn, ni ekhavos la tagon de disiĝo kun larmoj.”

Sidante sur la pruo de boato, ŝi rigardis en stuporo al la blua ĉielo kaj la lazura maro.

La ondanta akvo spegulis ŝian disrompitan figuron — ah, malgrasan —. Ŝi eligis longan suspiron. “Ĉio estas sama kiel antaŭ dek jaroj —, sed homoj malsamas! Fratino Yong, ŝi restas sama. Kaj mi? Kial mi ŝanĝiĝas tiel multe! — Nur mi estas malfeliĉa!

Krepusko iom post iom densiĝis kaj la nova luno leviĝis laŭgrade al la ĉielo. Ŝi zorgeme serĉis en la menso sian infanan ĝojon, kaj ĉe ŝia orelo kvazaŭ ŝvebis la antaŭa kantvoĉo.

Ĥristina Kozlovska



aŭtorino

Brioĉjo

Mi nomis ĝin Brioĉjo. Kiam paĉjo alportis ĝin, ankoraŭ tute malgrandan hundidon, ĝi estis tia blanka kaj lanuga, simila al tiuj rondflankaj brioĉoj, surŝutitaj per pulvorsukero, kiujn avinjo Olha bakas por Kristnaska vespero. Tiu brioĉa nomo venis al mi tuj, kiam mi ekvidis ĝin, Brioĉjon, kaj la nomo estis konforma al ĝi tiel bone, ke eĉ ŝajnis, ke komence aperis la nomo kaj poste la hundo, ĝuste tia por plej bone kongrui

kun tia nomo. Kiam Brioĉjo estis kuranta, ĝi ŝajnis esti ne hundo, sed malgranda buleto da felo, kiu ruliĝas ĝuste en miajn manojn. En tiaj momentoj mi simple falis surgenuen kaj akceptis ĝin en miajn brakojn. Tiam mi unuafoje komprenis, ke feliĉo ne estas iu abstrakta koncepto, ĝi povas havi konkretan formon, koloron kaj eĉ povas mordi.

Mi estis sepjara kaj estis sola infano ne nur en la familio, sed sur nia tuta strato. La vivo ŝajnis maljusta al mi. Mi sidis dum horoj sur fenestrobreto de mia ĉambro, observante kokinojn, vagantajn sur la herbo, serĉante ion manĝeblan en ĝi, nubojn, kiuj, flosante super nia domo, konstante ŝanĝis sian formon, pluvogutojn, kiuj dispeciĝis, frapante mian fenestron, kaj poste humile fluis malsupren por malaperi por ĉiam for de mia vidkampo, por transformiĝi en simplan akvon sub la piedoj. Do ĉiutage mi havis multajn aferojn por fari, centojn da objektoj por kontempli, kaj mi devis fari ĉion mem. Mi havis ja nenium fraton aŭ fratinnon por dividi ĉion ĉi, por batali kontraŭ iu pro ludiloj, por interŝanĝi vestojn, por ludi familiajn dramojn en la domo, kompilita el pecoj de la konstruludo, neniu apudis, ekzistis nur mi kaj la mondo malantaŭ la vitro de mia fenestro. Ĉio aliĝis, kiam ĝi aperis: blanka, varma kaj ia simple nereale belega, ĝuste kiel ĉiu infana revo. Brioĉjo distris min de kontemplado, memorigante, ke ekzistas ne nur tiu ekstera mondo kun ĉiuj siaj mirindaĵoj, sed ekzistas ankaŭ tiu en la ĉambro kaj tiu, kiu estas eĉ pli profunde, ie en mi, ĝi pulsas kaj ĝi estas ne malpli interesa. Ĝojo naskiĝis en mi, kreskis, fariĝis birdo, kiu svingetis siajn flugilojn pro ĝojo kaj impetis eksteren per laŭta rido.

La tagoj longe pasadis, la vivo, kiu atendis min en la estonto, ŝajnis eterneco.

Venis somero. Mi kaj Briocjo kuŝis sur la varma herbo, ĝi lekis mian vangon, mi sentis, kiel min superplenigas amo, amo al ĉio ĉirkaŭanta min, sed pleje al somero kaj Briocjo. La suno penetris tra miaj fermitaj palpebroj, kaj nun en la milda rozkolora brilo aperis imagoj pri mi kiel plenkreskulino, alta kaj ridetanta, kiu mem stiras aŭton kaj verkas librojn. Post kiom da jaroj okazos ĉi tiu adoltiĝo, ĉu dek, ĉu dudek? Mi ne sciis, kaj tio ne estis la ĉefa afero, tiuj tempoperiodoj estis tro longaj por pripensi tion serioze. La ĉefa afero estis imagi, revii, plani. Vera realeco kreiĝas en mia kapo, mi estas certa pri tio. En miaj fantazioj mi estis alia, ne tia kiel nun, sed mi imagis mian domon same tia, ĝuste tia devus esti mia korto, la longbranca nuksoarbo sur ĝi (ĉar nur ĝi kapablas doni tian densan kaj vere savigan ombron somere), la ĉerizarbo antaŭ la fenestro, eĉ tiu herbo kaj suno, ĉio devis resti sialoke, kaj tio estis grava. Mi eĉ ne dubis, ke Briocjo estos ĉiam kun mi.

Briocjo kreskis kiel neordinara, tre bonkora kaj karesema hundo, ĝi neniam bojis kontraŭ fremduloj, nur svingis sian voston paceme, vidante fremdulon la unuan fojon, kaj tion mi pleje ŝatis en ĝi. Sed la gepatroj kaj avinjo Olha havis alian opinion. Ili diris, ke Briocjo estas fuŝa hundo kaj ke la nebojado ne estas normo por hundo, ili prenis ĝin por bojado, hundo ja devas gardi la domon. Mi koleris kaj ofendiĝis pro iliaj vortoj, larmoj inundis miajn okulojn, mi rigardis mian Briocjon, sed vidis nur blankan svagan makulon. Plenkreskaj homoj povas esti vere ridindaj, mi pensis, ili ne komprenas evidentajn aferojn, ili konfuzas virtecon kun pekeco.

Mi sentis iun anstataŭigon de konceptoj, kvankam tiam mi eĉ ne povis esprimi tion per vortoj. Kiel oni ne povas ami iun pro ties bonkoreco? Absurdeco de la mondo penetris al mi tra barikadoj de mia infaneco, frapis per masiva ramo miajn murojn, la muroj krevis, kaj kelkloke la brikoj disrompiĝis, formante truojn. Mi febre provis savi min, fermadis la okulojn kaj submetis mian vizaĝon al la suno, vane esperante rememori tiun senton de feliĉego pro herbo sub mi, pro varma hunda lango sur mia vango kaj pro bildoj sub la rozkoloraj palpebroj. Estu ĉiam tiel, ĉiam, mi flustris al mi mem, sed tio ne plu estis, io malagrable en mi malkvietigis min, proksimiĝante al mia gorĝo, mi malfermis la okulojn, kaj Briocjo denove fariĝis blanka svaga makulo. En nia loĝloko hundoj ne povis esti nur por infana feliĉo, ili devis gardi la domon kaj mi konis tion, mi bone konis tion. Iu stranga maltrankvileco kreskis en mi, iu antaŭseno de ŝanĝoj, kiun mi ankoraŭ ne komprenis, ĉar mi neniam spertis ilin en mia vivo, tiujn ŝanĝojn. Sed ŝanĝoj estas tiaj, ili ne atendis sin longe.

Mi ne memoras, kiu el ili diris tion, ĉu panjo aŭ paĉjo, tiuj vortoj ŝajnis esti nenies, ili flugis el ies buŝo kaj preterflugis min tra la ĉambro, vantaj, sensencaj vortoj, kiuj signifis nenion por mi. Ĉar kion povas signifi por sepjara infanino la

vortoj, ke ni forveturos ien, por longe, por tre longe.

- Kaj kio okazos al avinjo Olha? - mi rigardis ilin - kaj kio okazos al Brioĉjo?

Strangaj estas tiuj plenkreskuloj, mi pensis, ja mi estas fantaziulino kaj povas elpensi ĉiajn nereale mojosajn aferojn, kaj ili ŝajne povas elpensi eĉ pli malrealajn aferojn.

- Ili restos, kaj ni iam revenos al ili ĉi tien.

- Kiam? - mi demandis ne flankiĝante de la ludo kun Brioĉjo.

- Iam ... kiam vi adoltiĝos - ial balbute diris panjo.

Mi ne plu demandis, tio ne estis interesa por mi, estas ja logike, ke tio ne povas esti interesa por oni, kion oni ne ŝatas.

La aŭtuno malvarmiĝis ĉiam pli kaj pli, kaj jam delonge ne eblis kuŝi sur la herbo. Brioĉjo plenkreskis kaj nun estis vere adolta hundo, mi almenaŭ pensis tiel. Ĝi ŝanĝiĝis, ĝia mallonga muzeleto plilongiĝis, ankaŭ ĝiaj oreloj kreskis iom kaj nun ridinde fleksiĝis kaj falis kiel anguletoj antaŭen. Ĝi kuris tiel rapide kaj saltis tiel alte. Mi vere fieris pri ĝi. Nur unu eco ne ŝanĝiĝis en ĝi, ĝi daŭre ne bojis kontraŭ fremduloj. Kaj mi plu ŝatis tion en ĝi pleje.

Iun sensunan tagon, paĉjo alportis hejmen du valizojn, ili estis tiom grandaj, ke en unu el ili, kiam neniu estis en la ĉambro, mi kun Brioĉjo lokiĝis, kaj tie eĉ restis iom da libera spaco. Mi karesis ĝian kapon, kaj ĝi rigardis min per siaj grandaj humidecaj okuloj, ĝi fidis min, mi sciis tion kaj pleje en la mondo mi timis rompi tiun fidon. Mi estas ĝia mastriro, ĝuste mi, tion paĉjo diris al mi, kiam li alportis ĝin en la manoj de sia onklo de alia flanko de la vilaĝo.

Kaj kiel mi estas feliĉa, ke bonŝance mi estas kun ĝi, kun mia hundo, paĉjo elektis ĝin, blankan kaj lanugan, el la aro de la samaj blankaj kaj lanugaj hundidoj, elektis hazarde kaj ne konjektis, ke li ricevis la plej bonan, la plej bonkoran hundon, kiu neniam bojos kontraŭ iu, des pli ne mordos iun. Mi plu karesis Brioĉjon, ĝi atente rigardis en miajn okulojn, hodiaŭ ĝi estis nekutime trankvila. Poste venis la gepatroj kaj ni devis forlasi nian valizon. Brioĉjo estis forigita eksteren, ja ne decas por hundo sidi en la domo.

Iutage mi aŭdis la plenkreskulojn interparoli. Ili parolis pri foriro. Ili parolis pri nia lando kaj kiel malfacile oni vivas ĉi tie, ili parolis pri prezoj, salajroj kaj multaj aliaj aferoj, kiuj estis nekompreneblaj kaj neinteresaj por mi. Ili diris, ke ili amas sian hejmon, sed devas foriri. Ili diris, ke nia lando estas malbona, ĝi estas sentaŭga. Kaj poste ili ekparolis pri Brioĉjo kaj mi senmoviĝis, ĉio en mi kunpremiĝis, ekstremis. "Ni devos forlasi ĝin - ili diris. - Ĝi ne bojas kontraŭ homoj, ĝi ne gardas la domon, ĝi senutilas, ĝi nur vane konsumas manĝaĵon, prefere estus preni alian hundon anstataŭ ĝi. Panjo estas tro maljuna por nutri unu hundon, eĉ ne parolante pri du". Ne aŭskultinte la finon, mi enkuris la ĉambron, falis sur la liton

kaj ploris tiel dum la tuta vespero ĝis la ekdormiĝo. Mi dormis malkviete, vekigis plurfoje, sed tuj denove ekdormiĝis. Mi vidis multe da songoj en tiu nokto, en kiuj estis nia flavruĝa bovino Franda, ĝi kokete rigardis min el sub siaj dikaj nigraj okulharoj, kvazaŭ flirtante, abelsvarmo flugis super ĝi kvazaŭ super floro. Ĝi lekis sian nazon per sia granda rozkolora lango kaj ridetis al mi. Mi songis avinjon Olha, kiu knedis paston por pastoposetoj en granda bovlo. La pasto en tiu bovlo estis pufa kaj blanka, kiel sukera vato, la manoj de avinjo plonĝis en la paston ĝiskubute, pro kio la pasto iĝis pli pufa kaj pli granda. Mi songis mian aveton, kiun mi jam ne estis trafinta ĝustatempe en ĉi tiu mondo, mi vidis lin nur sur fotoj. Li falĉis papavojn en la legomĝardeno. La papavoj falis obeeme per la plataj falĉaĵoj maldekstren de li. Aveto ekvidis min, demetis sian ĉapelon kaj svinge signalis al mi per ĝi, gaje ridetante. Liaj flavaj metalaj dentoj brilis pro la suno. Mi songis panjon kaj paĉjon, ili lulis min per ŝnura balancilo, kiu estis fiksita al branĉo de nia ĉerizarbo en la korto. Mi flugis tiel alten, super la ĉerizarbo mem, ĝis mi defalis de la balancilo kaj flugis super nia domo. Mi songis, ke mi kuŝas sur la varma herbo, ferminte la okulojn, Brioĉjo lekas mian vangon, kaj mi imagas mian estontecon, naive kredante, ke la vivo povas esti tia, kiel mi volas, kiel mi amas ĝin.

Mi malfermis la okulojn. Miaj gepatroj vekis min, kaj du grandaj valizoj staris pakitaj surplanke apud la pordo. Estis tempo por foriri.

- Mi ne volas, mi ne iros! - mi subite kriis - mi ne permesos, mi ne permesos fari ion al Brioĉjo! Ĝi estas bona, mi amas ĝin. Mi ja respondecas pri ĝi, mi estas ĝia mastrino.

- Ĉio estos bona - oni trankviligis min. - Ĉio estas bona. Brioĉjo restos kun avinjo Olha.

Sed mi ne kredis ilin, mi sentis, ke mi ne kredu al ili. Mi sciis, ke miaj gepatroj estas bonaj, sed same kiel ĉiuj plenkreskuloj, ili multon ne komprenas. Ili, same kiel ĉiuj plenkreskuloj, ne scias, kio estas bona kaj kio estas malbona.

- Mi ne povas iri ien ajn, mi devas resti, mi devas atenti, por ke ĉio estu bone al ĝi.

- Ni revenos, ni certe revenos iam - panjo ploris - mi kredas, ke Brioĉjo atendos nin.

- Sed kial ni iru ien ajn? Kial ni lasu iun por atendi ĝin poste?

La pordo knaris, kaj la ĉambron, apogante sin sur bastono, eniris ploranta avinjo Olha. Surbrake ŝi portis Brioĉjon. Brioĉjo vigle svingis sian voston kaj impetis al mi, ĝi lekis mian vangon kaj jelpis per maldika voĉo. Tio estis vera adiaŭo.

Kio povas okazi dum dek jaroj? Ja io ajn. Dum dek jaroj ĉio povas plene ŝanĝiĝi, ĉio, krom amo. Dum tiuj dek jaroj ŝanĝiĝis mia korpo, plurfoje ŝanĝiĝis miaj hararanĝo kaj harkoloro, miaj preferoj kaj ŝatokupoj, la lingvo, per kiu mi

komunikigiĝis en la lernejo, kelkaj bicikloj, trifoje estis ŝanĝita mia loĝloko, sed mia amo al la loko, pri kiu memoro velkiĝis iom post iom, ne lasis min, ĝi tenis min tiel forte, ke ĝi ŝajnis la plej reala el ĉio, kio estis en mia vivo. Dumtage mia amo buliĝis kiel katido, ie profunde en mi, kaj tie ĝi mallaŭte ronronis. Sed nokte ĝi donis al si librecon. Tuj kiam mi fermis la okulojn, mi vidis avinjon Olha en aŭreolo de milda lumo, knedantan pastopoŝetojn el la plej delikata, la plej maldika pasto en la mondo (ŝi scipovis tion); Brioĉjon, kiu, elŝovinte sian langon, kuras renkonte al mi; la ĉerizarbon surkorte, la ĉerizarbon florantan, la ĉerizarbon kun fruktoj, la neĝokovritan ĉerizarbon; nian preĝejon, kiu kunvokas homojn al la diservo per sonorilo, per la sonorilo, kiu reeĥis interne kaj disvastiĝis per agrablaj ondoj de la koro kaj tra la tuta korpo. Dek jaroj, kiam ili pasas, ili ŝajnas al vi neelteneble longaj, sed kiam la kalkulo finiĝas kaj vi laŭte diras ĉi tiun nombron, vi konstatas, ke fakte ĉio estis iluzio, iu distordo de la tempo, ĉar nur nun vi rimarkas, ke dek jaroj estas nur momento. "Ĉu eble ankaŭ mia amo estas iluzio? - mi pensas - Eble tiu mondo tute ne ekzistas, eble mi nur songiĝis ĉion?" Sed tiam mi venis al la tirkesto plena de leteroj de avinjo Olha kaj elspiris trankviliĝante: "Ĝi estas reala".

Ni vere revenis hejmen, ne por longe, sed revenis. Dek jaroj pasis kvazaŭ momento, kaj jen mi estas denove tie ĉi. Avinjo Olha estas grave malsana. Panjo helpas ŝin levigi, por ke ŝi sidigu surlite. Avinjo kisas min, ploras, demandas, kiel mi fartas, kaj mi ial, anstataŭ respondi, demandas ŝin, ĉu ŝi plu faras pastopoŝetojn. Avinjo nur ridas tra siaj larmoj:

- Mi jam ne knedos ilin ĉi-jare por la Kristnaska vespero.

Avinjo multe ŝanĝiĝis, ŝi estas faltoplena, kiel sekigita piro, kaj ŝiaj manoj tute ne estas tiel rapidaj kaj belaj, kiel mi memoras ilin. Mi ne volas vidi ĉion ĉi, mi ne volas aŭdi, mi fermas la okulojn kaj vidas nur la blankan paston, similan al sukera vato, kiun mia avinjo knedas por fari pastopoŝetojn.

- Vi estas jam tiel granda - diras avinjo Olha per tremanta voĉo - kiel estas domaĝe, ke mi ne vidis vin kreski, mi ĉion preterlasis, Sonjo, mi ĉion preterlasis.

- Ja ne vi preterlasis, avinjo - mi diras. - Ja ni preterlasis tion - kaj mi forlasas la ĉambbron.

Estas malvarmete ekstere, mi levas la kolumon de mia jako, viŝas miajn larmojn, rigardas antaŭ mi kaj nur ĵus mi konstatis, ke la ĉerizarbo forestas.

- Avinjo Olha diris, ke ĝi velksekiĝis kaj mi estis devigita forhaki ĝin - diras paĉjo, kiu kaptas mian glaciĝintan rigardon sur la arbostumpon.

Kaj en tiu momento min penetras subita konjekto. Certe, kiel mi povis forgesi? Mi ĉirkaŭrigardas:

- Brioĉjo! Brioĉjo!

Mi kuras ĉirkaŭ la domo:

- Brioĉjo!
- Mi kuras al la hundoĵo, apud kiu estas ĉeno sur la tero, mi rigardas enen:
- Brioĉjo!
- Sonĵo - paĉjo alproksimiĝas al mi - Brioĉjo ne plu estas tie ĉi.
- Sed kie ĝi estas?
- Ĝi elĉeniĝis, forkuris kaj ie malaperis. Tio povas okazi kun hundoĵoj.
- Kiel vi scias?
- Avinjo Olha iam skribis.
- Ĉu ĝi forkuris, aŭ ĉu vi forigis ĝin, kiel vi iam planis? - mi ploras.
- Sonĵo, dek jaroj pasis, ĉu tio gravas nun?



Paĉjo revenas hejmen. Tra la malfermita pordo mi aŭdas avinjon Olha tusi. "Ja ne vi, avinjo, ja ni preterlasis tion" - mi diras al mi mem. Mi fermas la okulojn, levas la kapon al la ĉielo. La suno penetris tra miaj fermitaj palpebroj. Kaj jen mi jam kuŝas sur la varma herbo, Brioĉjo lekas mian vangon. Mi sentas, kiel min superplenigas amo al somero kaj Brioĉjo, amo al ĉio, kio jam delonge forestas. Mi estas denove tiu knabineto, senzorga kaj ĝojoplena, nur nun mi ne havas fantaziojn pri la estonto. Mi kuŝas sur la herbo ensomere kaj min mirigas tiuj plenkreskuloj (kiaj naivaj ili ja estas), ili pensas, ke de ĉio devas esti iu profito, eĉ en amo ili serĉas

elukrainigis *Petro Palivoda* (Ukrainio)

ĝin, sed amo ne estas tia, ĝi ne donas profiton, amo donas feliĉon.

Mikronovelo

Gu Hua

Li

Kiam li vidis ŝin nekonatan, li sentis, ke la tuta mondo ekbrilas. Li sin ĵetis al la fenestro kaj gapas al ŝi sen palpebrumi. Dume ŝi, same. Dum la longaj kvin minutoj ili fikse rigardis unu al la alia ĝis vagonaroj startis. La vagonaroj antaŭen kuris en malaj direktoj. Ĉe la momento kiam la vagonaroj disiĝis ŝi kriis ion, swingante bluan silktukon. Ekde tiam li havis ne alian koloron ol la bluo en siaj okuloj ĝis li maljuniĝis.

Sheng Congwen (1902-1988)



PARO DA GEEDZOJ

.....konsentite. Ĉio jam estis en ordo.

"Nu, bone, bone, mi iros mi iros! laŭ via parolo mi agos!" Dirante la virino refoje rigardis al la viro, laŭ maniero speciala de virino.

"Kiel vi diros?" La penso de zorgema viro ĉiam estis pli profunda ol virino. Li ja timis ke ŝi forgesus.

"Kiel diri? Ĉu vi demandas, kiel mi diru en tiu okazo?"

"Jes!" La viro jam senpacience urĝis ŝin tuj diri.

"Mi lasos lin elpreni tiun objekton, ke li legu, ke li..."

"Diru simple, ke vi post lia ĉirkaŭprenado, vi!"

"Jes, post kiam li ĉirkaŭprenis min, mi diros al li, ke li ne faru tion. Mi diros ke mi jam havis edzon, mi ne povas fari tian stultajon kun alia viro. Mi diros, ke se tiu viro scius, li mortigos min per ponardo, li strangolos min per ŝnuro. Mi diros ke mi suferis ofendon. Mi rakontos tion al tiu mia viro. Mi diros ke mia bonfamo estas ruinigita. Ruinigita estas ankaŭ la honoro de mia edzo...Mi ploros, ne permesante lin foriri... Kaj mi diros ke mi dissciigu tion al la publiko, ke ĉiuj sciuj ĉitie, ke ĉiuj juĝu la aferon por mi."



Dum la virino ripetis la produktitajn frazojn, la viro kapjesis, kapjesis, kapjesis. Vidante ke la virino finis parolon, li manklakis, esprimante sian ĝojon kaj kontenton pri ŝia kompetenteco. Kaj li admonis: "Ne forgesu dum la necesa momento! Ne ploru senlarne! Ne..."

Fakte, la zorgo pri senlarma ploro estas superflua. Pri tio la viro sciis pli ol sia virino. Li sugestis ke la larmoj estu abundaj. Ĉar la epoko progresis. Malmulte da virinaj larmoj ne sufiĉas por konkeri koron de viro.

Ĉar ordinare larmoj malfacile timigis lin. Li sugestis pri multo da larmoj. Ŝi respondis ke tio certe estas plenumota. Al virino, kiu nur se kapkline ekploris, larmoj certe elfluos. Tio estis pli facila ol akuŝo, la grava afero.

Li kredis tion. Tamen, se oni ankaŭ povus anticipi ekzerci sin pri larmado, kompreneble la viro ne oponus tian "provludon".

Mi fidas vin. Agu laŭplane! Mi certe venos fini." La viro diris ĝentilmane.

"Ho, vi nepre venu! Sen via alveno mi ne povos elsceniĝi. Vi atendu anticipi ĉe la ŝtiparo, silente, ne lasinte ke aliaj homoj sciu! Vi ekaperu kiam vi aŭdis mian ploran krion 'helpu!'"

"Ho, tiam mi certe venos. Vidante ke mi batas kun minaco buĉi lin, vi nur ploru neglekte! Mi koleros ĝis tia grado por fari murdon. Tiam mi senigos al li fieron. Nur tiam vi plorante konfesu al mi ion ĉion. Kaj ni vidu kiel li reagos?"

"Mi plendos ke tiu ulo volis senvestigi min! Ne! Mi diru ke li perforte devigi min fari tian malĉastajojn. Li devigis min kunkuŝi en tia loko. Li petis ke mi fuĝu kun li, ke mi..."

"Sed ne diru tion, se li parolis al vi ne pri fuĝo!"

"Ho jes! Mi ne diru kion li ne diris, mi diru nur kion li diris. Sed tamen kion fari se li diris nenion?"

"Ne eble, tiu viro ne estas muta! Ĉu viro kiu volas allogi aliulan edzinon povus esti stulta? Vidante vian nekonsenton, li certe serĉos multe da paroloj por tenti vin! Lia parolo certe estos pli multa ol kiom mi povas imagi. Tiu estas fiulo. Vi ne estu allogita de lia bela aspekto kaj lerta lango kaj efektive kun li..."

"Kio? Ĉu mi estas tia virino?"

"Ho, vi ja estas fidinda por mi! Ĉar tio estas profito de ni ambaŭ. Mi ne havas egoistan intencon.

Por utilo de la ŝtato ni ja devas puni tian fiintencan junan dandon. Sed mi devas atentigi vin: estu singardema! Agu laŭ mia artifiko, ni akiros monon sen trompiĝo. Akirinte monon, mi aĉetos ŝtofojn kiuj plaĉas al vi. Ĉu vi ne diris ke vi bezonas kelkajn bonajn vestojn por gastoj?"

"Ho, mi volas la ruĝan, ne la skarlatan."

"Nu! Ni aĉetu la ruĝan! Sed ĉu vi memoris mian parolon?"

"Jes! Mi ne estas trijara infano!"

"Do ripetu, refoje!"

"Ho, mi ne ripetu. Mi jam forgesis." Tio estas intenca rifuzo, ĉar la viro rigardis ŝin tro malsaĝa.

Aŭdinte tian tro sekan respondon, la viro diris: "Se vi jam forgesis, do for la aferon!"

"For, do for! ĉar ne mi mem bezonas monon."

"Ho, ĉu vi opinias min vivanta kokrito?"

"Ba, vi estas honesta, rangulo! Kiu ne scias tion? Tian kokradon ja mi mem deziras!"

"Putino! Vi meritas baton pro tia parolo! Se vi vere adultos, mi rabu vian vivon!"

"Ho, mi adultos, ĉu laŭ mia propra deziro? Ĉu mi volas ĉasi monon? Se mi estas putino, kio vi?"

"Mi estas kokrito, vivanta kokrito! Nun kokrito batmortigos vin!" Kaj la viro kun grincanta dentaro iris al la virino. per unu mano li ekkaptis al ŝi mallongan hararon kaj trenis malantaŭen. La virino ekfalis teren.

Fortaj vangfrapoj falis al ŝiaj du vangoj, piedbato al ŝia talio. La virino ekploris kvazaŭ en trejnado.

Jen vere brila provludo de larmado. Kvankam tiom multe da larmoj, tamen ankoraŭ nur provludo!

"Ho vi batmortigu min, batmortigu min! Mi ne volas plu vivi en la mondo!" La virino plore plendis ruliĝante sur la tero.

"Vi mem mortu. Mi jam estas laca!" Dirante la viro forlasis la virinon. Li manfrapis por forigi polvojn desur polmoj kaj rikanis starante en la ĉambro.

"Ho, vi batmortigu min! Tiam vi povos prenu pli junan belulinon ke ŝi ĉasu monon por vi!"

La viro respondis nur per silenta rikano.

"Kial ĉesigi vian baton? Batu! Piedbatu!"

La viro ankoraŭ rikanis, kun iom da pento. Tamen ĉar la edzo estas ĝentilmano, li posedu la stilon de ĝentilmano, tial li ne povas konfesi sian eraron kiel tiaspeca viro...

La virino laciĝis de plorado, de plendado. Sidante sur tero ŝi meditis. Ŝi ekridis. Ŝi ne bezonis persvado de la viro. Ŝi mem stariĝis, frape forigis de si polvon kaj iom ordiĝis al si hararon.

Ambaŭ okupis respektive angulon de la salono, kvazaŭ jam kun konsento pri repaciĝo.

Iu frapis je la pordo ekstere. La viro iris gvati tra la pordfendeto, kaj tuj rapidis revenen al la virino. Li fariĝis afabla. Li demandis afable al la virino, ĉu ŝi volonte

agos laŭ la malnova interkonsento.

"Volonte," respondis la virino.

"Li jam alvenis. Do vole nevole ludu la dramon en nia hejmo."

Aŭdante ke tiu homo jam alvenis, la virino eksentis streĉon en sia koro.

Aŭdinte la diron de la viro ke ili ludu la dramon en sia propra hejmo, la virino ekridis. Tiu rido signifas ŝian konsenton pri la honora propono far la edzo.

"Iru malfermi la pordon, kaj mi foriru tra la malantaŭa pordo."

"Vi..."

"Mi nepre devas foriri! Mi revenu post unu horo. Bone ludu la dramon dum unu horo. Se la intrigo estus plilongigota, mi revenos en malĝusta momento."

Aŭdiĝis denova frapado sur la pordo.

"Prefere vi revenu post kiam mi vokas 'helpu!'"

"Jes, bonege. Mi ne revenu antaŭ via voko."

"Konsentie. Nun foriru!"

Ili kisis unu la alian, kvazaŭ per la kiso garantias. Post kiam ambaŭ ricevis la garantion, la virino iris malfermi la pordon, kaj la viro malaperis tra la angula pordo de kuirejo.

La virino enlasis gaston al salonon, kaj poste de la salono al ĉambro.

La gasto estas junulo. Aŭdinte ke la dommastro ne estas hejme, la gasto fariĝis bonhumora kaj ankaŭ tre kuraĝa, ĉar junulo kutime rigardis la hazarde ricevitan oportunun favora ŝanco.

La virino invitis la gaston kune sidiĝi. kaj la gasto kondukis ĝuste kiel la mastrino atendis. Tempo malrapide pasis, kaj la gasto malrapide ŝanĝis sian konduton.

Sed verŝajne la virino forgesis krei: "Helpu!"

Ŝi eĉ lasis ke la gasto ricevis ĉion kion li deziras.

Ŝi faris aferon eĉ ekster sia propra atendo.

Evidente kun venĝemo ŝi lasis ke la juna gasto senbride agu sur ŝia korpo.

La gasto eliris la domon, kaj tuj ĉe la enirejo de la strateto renkontiĝis kun la dommastro.

La dommastro konfuziĝis, dum la gasto ruĝiĝis. Tamen, kiam du amikoj renkontiĝis, ili devis paroli ion. Do la gasto komencis:

"Ha, mi atendis vin tutan horon, sed vi ankoraŭ ne revenis, do mi akompanis la bofratinon sidi longan tempon..."

"Ho, ĉu tiel okazis? Pardonu, pardonu! Sidiĝu ankoraŭ momenton!"

Rigardinte sian brakhorloĝon, la gasto diris: "Jam urĝis la tempo. Morgaŭ mi revenu."

"Sed vi venas ja por iu afero, ĉu ne?"

"Ah, nur bagatelo. Morgaŭ ni revidu nin en la parko."

"Sed kiam?"

"Je la sepa posttagmeze."

"Bone. Je la sepa, akurate."

Fakte la gasto diris al la mastro la saman tempon kiun li mendis por rendevuo kun la mastrino.

Tamen li jam ne havis tempon korekti kaj haste forrapidis.

La mastro revenis sian hejmon. Li vidis ke la edzino kuŝis en la lito, ankoraŭ ŝajnigante sin dormanta, kun paro da kapkusenoj sub sia talio. Li subite komprenis ion. Li iris al la edzino, kun furioza kolero, li ekkriis laŭte kaj tuj sin ĵetis sur la korpon de la edzino.

.....

La sekvan tagon, la gasto atendis en la parko ĝis la 9-a vespere kaj ankoraŭ ne volis foriri.

Tiu naiva homo ankoraŭ supozis, ke lian vanan atendon kaŭzis certe subita malsaniĝo de iu el la geedzoj, kiuj ne povis veni al la rendevuo en parko.

La trian tagon, li vizitis al la bona paro, kaj nur tiam li informiĝis, ke la gemastroj ambaŭ suferis de neatendita stranga malsano kaj nun vizitis hospitalon por ŝanĝi al si bandaĝon.



elĉinigiŝ **Guozhu** (Ĉinio)

Mikronovelo

Li Nan (Ĉinio)

Plendoj

Geedziĝinte kvindek jarojn ili ŝajne kaŝis siajn plendojn en la ostoj. Preskaŭ ĉiumatene, kiam ili malfermis la okulojn, la reciprokaj plendoj tuj eksonis. Iliaj gefiloj eĉ ne havis kuraĝon ilin viziti, ĉar ili renkontos katastrofon al la oreloj. Alian matenon, kiam ŝi plendis pri lia malfrua ellitiĝo, ŝi subite trovis, ke li jam forpasis. Post longa silentado, ŝi eldiris sian lastan plendon: "Kial vi ne atendas min iri kune..."

Maŭ Dun (1896-1981)



aŭtoro Maŭ Dun

Kelkfoje la humuraj vortoj de ŝia kuzo vekis delikatan ridetron ĉe ŝiaj lipoj kaj ŝi sendis al li naivan ekrigardan. Tamen ŝi retenis siajn vortojn. Foje kiam ŝi ne devis ne malfermi la buŝon pro priŝerco, se nur unu vorto povis esprimi, ŝi neniel eligis du vortojn, ĝuste kiel avarulo, kiu neniam facile malŝparas groŝon. La kuzo ofte ŝin incitetis, dirante, ke ŝia parolado estas telegram-stila, kaj ŝia onklino laŭdas, ke ŝi ne similas al nuntempaj junulinoj, kiuj emas brui. Sed al tiuj incitetoj aŭ laŭdoj ŝi respondis per ridetoj de tiu, kiu afliktiĝas en la koro.

Servistinoj ofte babiladis pri tio, kion Fraŭlino Huan faris en la privata ĉambro. Aŭdinte tiajn babilojn, la onklino emis riproĉi: “Ne ŝovu vian nazon. Fraŭlino legas kaj skribas en la ĉambro!” Sekve de tio la maljuna onklino ekrememoras pri sia karmemora frato. Antaŭ ŝiaj okuloj flosis la ombro de ŝia frato kun pala kaj malgrasa vizaĝo. Kaj tiam ŝi movis sian kadukan korpon kaj iris en la ĉambro de Fraŭlino Huan por vidi, ĉu pene legas aŭ skribas ŝia nevino, kiun ŝi dorlotas. Kiam ŝi vidis Fraŭlinon Huan leviĝi el la lito kaj renkonti ŝin, kaj tiujn kolorajn kovrilojn de libroj ĉe la kapkuseno, la maljunulino multe trankviliĝis. Post malpli ol dek minutoj da sidado en la ĉambro ŝi ŝancelpaŝe eliris. “Ŝi ripozu momenton en paco.” La maljunulino ofte parolis al si tiujn vortojn kaj forlasis la fraŭlinon.

Ties bofratino, al kiu du infanoj al kroĉiĝis tirante ŝian jupon, ankaŭ ofte kaptis liberan tempon por fari vizitojn al ŝi. Kiel kutime ŝi falsidis kvazaŭ tre lace sur la kanseĝon, sur kiu Fraŭlino Huan ofte sidis. Eliginte elspiron, ŝi ridete diris: “Mi

Memmortigo

Elĉinigiŝ Tong Tong (Ĉinio)

Oni diris, ke Fraŭlino Huan (*hŭan*) lastatempe fariĝas pli kaj pli kvieta, eĉ preskaŭ ĝis ekstravaganco.

Tuttage ŝi lokis sin en la mallarĝa dormoĉambro kaj ne senmotive eliris, krom manĝoprenado. Kaj eĉ dum manĝado la soleca rideto naĝis ĉe ŝiaj lipoj, kio montris, ke ŝi ne kovas koleron al la aliaj, kaj ŝi parolis malmulte kiel kutime. Eĉ ĉe la bruplena tablo de vespermanĝo ŝi ne aspektis iom pli vigla. Ŝia milda rigardo ofte estis nur direktita al ŝia manĝobovlo.

vere ne plu eltenas tion. Mi tre enuas,” ŝi komencis. Post tio ŝi ekraportis pri hejmaj aferoj detaleme: mi devas fari somerajn vestojn por ambaŭ filoj; hieraŭ mi sendis donacon por naskiĝtago de la maljuna patrino en Familio Wang; morgaŭ venos la “bona tago” de la granda filino de Familio Li; eble okazos postmorgaŭ la funebraĵoj de la paralizinta patro de la moŝto de la kvara avo — la kuracisto asertis, ke malfacile por li transvivi la morgaŭan vesperon. “Kuracisto Huang (*hūang*) tre trafte antaŭdiras la mortan tagon de la malsanulo!” Dirante tion, la bofratino fuŝfingrumis la librojn dismetitajn malorde sur la tablo. Fraŭlino Huan ĉiam aŭskultis silente ĝis la onklino, eliginte alian elspiron, ŝablone konkludis, “Nu, mi jam redonis la tutan sakon da lernolibroj al mia instruisto!” Kelkfoje, kiam ŝi ankoraŭ ne finis babilon pri hejmaj aferoj aŭ ekpensis pri alio aŭ aŭdis plorvoĉon de la infano, ŝi ŝanĝis la formon de sia konkludo: “Kiam mi havas hejmajn aferojn en mano, mi vere ne povas legi libron kun atento.” Tiam rigardante la gracian dorsfiguron de la bofratino, Fraŭlino Huan ĉiam mallaŭte diris: “Pli bonas ne legi librojn, alie tio distras ŝin.”

Krom la onklino kaj bofratino, servistino Ajin (*aĝin*) plej ofte eniris la ĉambron de Fraŭlino Huan. Ĉiutage ŝi iris tien balai la plankon kaj inviti tiun al manĝo. Pro tio ŝi konis pli bone ol la alia ŝian vivon en la buduaro. Tial kiam servistinoj babilis en la kuirejo pri Fraŭlino Huan, Ajin povis eligi aŭtoritatan voĉon pri la temo. Tamen malfeliĉe ŝi ankaŭ ne eldiri precize, kion la fraŭlino faris kaj nur negative neis la aserton de la maljuna mastrino, ke Fraŭlino Huan estas leganta libron kaj skribanta. Ŝi neniam, eĉ unufoje, almenaŭ dum la lasta duonmonato, vidis la fraŭlinon tuŝi librojn kaj skribilon. Kvankam kiam ŝi iris purigi la ĉambron matene, ŝi trovis kelkaj paperpecojn, kiuj estis disŝiritaj en nmallarĝajn slipojn kaj malorde disĵetitaj ĉe la piedoj de la librotablo, ŝajne skribitaj, tamen ŝi penis kunigi tiujn paperajn pecoj kaj trovis, ke tio sur la paperslipoj ne estas ideogramoj, sed laŭvolaj desegnaĵoj, kelkaj el kiuj similis homajn vizaĝojn.

Post senrezulta babilado Ajin ĉiam diris, skuante la kapon: “Fraŭlino Huan estas vere stranga!”

Probable la eldiro de la kuzo proksimis al la vero. Iutage okaze menciinte la fraŭlinon kun la onklino, li iam diris: “Ŝajnas, ke ŝi sentas enuon kaj ĉagreniĝon.” Do, kial ŝi sentas enuon kaj ĉagreniĝon, la bofratino tute ne sciis, kaj la kuzo malfacile eltiris la konkludon. Kvankam la gepatroj de la fraŭlino ambaŭ mortis kaj ŝi ne plu havas hejmon, tamen la onklino tiom dorlote amas ŝin, la kuzo estas denaska kunludanto kaj la bofratino tiel sagace zorgas pri ŝi. La hejmo de la onklino estas ankaŭ ŝia hejmo dum dudek jaroj. Kial ŝi abrupte eksentas alion malsaman? Do, se Fraŭlino Huan vere enuas kaj ĉagreniĝas, ŝiaj kuzo kaj bofratino rajtas aserti, ke ŝia konduto absolute ne estiĝas pro la sento de ŝia sola vivo.

“Eble ŝi pripensas sian edziniĝon,” la bofratino esprimis sian opinion al sia edzo. Tamen post zorgema konsiderado ili trovis tion neprava, ĉar la onklo kaj la kuzo permesas al ŝi edziniĝi laŭ libera maniero kaj la onklo jam frue preparis ŝian doton tre detale. Se la fraŭlino nur ekhavos amaton, estos ne malfacile por ŝi tuj edziniĝi. Kaj plie ŝi, malkiel malnovmoda junulino, kiu ne eliras el la buduaro, ofte ekskursas kune kun geamikoj. Nur dum la lasta duonmonato ŝi laŭ sia volo fermas sin en la dormoĉambro, rifuzante ĉiujn ekskursojn.

Sekve de tio estis malfacile kompreneble kial la fraŭlino subite falis en stagnadon. Ĉar neniu rekonis la malfacilecon, oni lasis al servistinoj klaĉi kaj babilkaĉi laŭbontrove. La atmosfero inter la gemastroj ne estis streĉita.

Taglumo pasis kaj vesperkrekusko sekvis. Sidante en lamplumo, Fraŭlino Huan, kun la kapo apogita per la maldekstra mano, dronis en flosantaj pensoj. La kvar muroj mutis kiel dormantoj, kontrastante kun brua ridoj en babilado alŝvebanta el la transa ĉambro de la kuzo kaj lia edzino. Ŝi iom abomenis tiujn ridsonojn de troa ĝojo, sed ne volis aŭskulti al la enhavo de la troa ĝojo. Ŝiaj pensoj ne obeis kaj kanajle alkroĉiĝis al ŝi. Kelkaj klaraj vortoj, ŝajne el la buŝo de la bofratino, jam frapiĝis kontraŭ ŝia cerbomembrano, sed subite malaperis. Ŝia konscio plenis je multaj aferoj kaj objektoj nedifineblaj, kiuj ekskludas eksterajn novajn impresojn. Inter tiuj nedifineblaj aĵoj troviĝis kelkaj, kiuj baraktas por sin montri. Finfine ili aperis kiel konataj vortoj: “Huan, ni iru en ĉi direkto.”

Tra la fenestro penetras malvarma ventblovo kaj forbalais febron el ŝia korpo, kvazaŭ ŝi sin trovus en la roka kaverno sub la monto Feilai (*fejlaj*). Sonis ankoraŭ la frazo “Huan, ni iru en ĉi direkto.” ĉe ŝiaj oreloj, tre delikate kaj klare. Estiĝis la sento de formikado sur ŝia pojno kaj ĝi disvastiĝis al ŝia brusto, tiel ke ŝia koro nereteneble palpitiĉis. Abrupte junulo alvenis antaŭ ŝin kaj, prenante ŝian pojnon, peteme rigardis ŝin. Ŝia koro batis pli rapide kaj ŝia vizaĝo varmiĝis. Ŝi sentis, ke fortika brako ĉirkaŭprenas ŝian talion. Ŝi abrupte eligis “Ojo!”. La stranga voĉondo skuis ŝian timpanon kaj tuj neniĝis. Ŝi ankoraŭ sidadis en sia mallarĝa dormoĉambro, sola en la lamplumo.

Ŝi ankoraŭ sentis formikadon, kiu pli intensiĝis. Longkrura moskito, kun jam travideble ruĝiĝinta ventro, pene eltiris sian longan pikilon el ŝia delikata haŭto kaj forflugis senĝene. Ŝi okule sekvis la moskiton ĝis ĝi malaperis en mallumo. Ŝi subite sentis, ke la eta fluganta insekto ŝajnas la junulo, kiu ĵus troviĝis en ŝia halucino. Iutage antaŭ duonmonato la junulo ekscitis ŝian animon de virgulino kaj poste senĝene foriris senspure, lasante ŝin en soleco kaj plendemo. Ŝi eksspiris kaj apogis la kapon per dekstra mano. La ridsonoj en la ĉambro de la kuzo kaj lia edzino jam frue malpliĝis, malpliĝis ĝis nun regis nur malvarma kvieto. De tempo al tempo alŝvebis kolersimilaj kvakoj de ranoj el la malproksimeco, ŝajne

plendante por ŝi.

Fratino Huan ekstaris ĉe la fenestro. Tiuflanke, apud la scenejo regas nebuleca maldika lumo kaj sonis obtuza bruo, kaj ĉiflanke ĉirkaŭ la lago staras nigraj montoj kiel gigantaj vigilantoj. Kaj sporade blinkas la lampoj en vilaoj apud la lago. La homa mondo estas bela kaj la vivo plezura. Tamen la fraŭlino pensis, ke ĉio ĉi ne apartenas al ŝi kaj ŝi jam estas dispecigita homo. Ŝi ne plu komforte ĝuas la valoran junecon kaj la bela mondo fariĝas venena ironio. Tio, kion ŝi povas fari, estas femi ŝin en la domon kaj fojrefoje likvidi makulojn en la koro.

La sekreta ŝarĝo ĉiam pezis sur ŝin, tiel ke ŝi ne devis ne eskapi en la solecon. Ĉiufoje kiam multaj babilis kaj ĉiuj langoj moviĝis, Fraŭlino Huan sentis, ke ŝi fariĝas ĉies fokuso de la okuloj kaj ties ridetaj lipoj ŝajne diras: “Ni ĉiuj konas ĉion pri vi!” La plej intimaj geamikoj ankaŭ ŝanĝiĝis en ŝiaj okuloj. Kiam ili alparolis ŝin, ili emis montri ridojn. Laŭ ŝia kompreno tiuj ridoj estis malbonintencaj. Ili ofte babilis pri la amaj aferoj de konatoj aŭ nekonatoj, kaj ŝi ankaŭ travidis, ke ili moke insinuas ŝin per tiaĵoj. Kie timida leporo ŝi nur sin kaŝis en la nesto. Por pasigi jarlongajn tagojn ŝi legis romanojn, sed la aŭtoroj de la romanoj ŝajne konis ŝian sekreton kaj prenis ŝin kiel rolulon en romanoj. Feliĉe la onklino kaj kuzo ankoraŭ ne sciis pri ŝia afero, alie...

Fraŭlino Huan sin turnis kaj du larngutoj falis nereteneble. La homa mondo estas tro bela, dum ŝia sorto tro kruela. Je ekpenso, ke la ĝoja vivo neniam rilatas al ŝi, ŝi des pli sentis, ke la vivo meritas ŝian altan taksadon. Mispaŝo jam forpasis, ankaŭ la momenta ĝojo, kiu kaŭzis al ŝi dumvivan bedaŭron, jam forpasis. Sed tio kio neniam forpasis, estas aliulaj malicaj buŝoj kaj vizaĝoj. Ŝi palpos sian vivan vojaĝon en la primokoj kaj flegmemo de aliuloj. Kiam ŝi ekpensis pri tio, ŝiaj larmo elfluis senĉese. Retroirinte kelkajn paŝojn, ŝi sin ĵetis en la liton. Brakumante kapkusenon, ŝi preskaŭ eksplodis per plengorĝa plorado. Ŝia koro dispecigita de tristo brue batis en baraktado, ŝajne sinsekve kriante: “Mimmortigo! memmortigo! memmortigo!”

Ŝi mem ne sciis, de kiam ekestis tiu senhelpa ideo. Tamen ĉiufoje kiam ŝi malĝojiĝis, tiu damninda vorto venis kaj revenis en ŝia cerbo. Kaj ŝi ankaŭ ne sciis, kiam la penso jam difinis la daton por ŝia fino: eble estis la tago, kiam ŝia onklino kaj ili eksciis ŝian sekreton. Subkonscie ŝi konfesis, ke tio estos la komprenebla kaj sola solvo. Tamen kiam ŝi ekpensis, ke post ŝia pereco la mondo ankoraŭ tiel belos, multaj homoj ankoraŭ ĝuos trankvile, kaj ankaŭ multaj homoj, inkluzive la homojn, kiujn ŝi malestimas, ankoraŭ babilos pri ŝiaj bonoj kaj malbonoj, mokridos, blasfemos kaj montros kompaton— eĉ kompaton ŝi ne povis toleri, ŝi konsideris, ke eĉ memmortigo ne sufiĉos, ne sufiĉos! Ŝi deziris, ke la mondo tuj ruiniĝu kaj la sinistra fajro forbruligu senspure ŝin mem, ĉiujn homojn, ĉiujn

objektojn kaj ĉiujn ĝojajn kaj malĝojajn rememorojn.

Ŝi kolere eksaltis kaj kuris al la ĉambro, kun larĝe malfermitaj okuloj ruĝigitaj de plorado. Nun alloga trajto aldoniĝis al ŝia ordinara vizaĝo. Ŝi rapide iris al la librotablo, eltiris la maldekstran tirkeston kaj elprenis ŝlosilon el la fajna kesteto, kaj poste eltiris la dekstran tirkeston, kie kuŝis stakoj da leteroj, kelkaj fotoj kaj bruna oblonga virinstila teko el kangurufelo. Malferminte la tekon, ŝi etendis iom tremantajn figurojn en ĝin kaj elprenis foton el ĝia tre mistera fako. Ŝir! ŝi ĝin disŝiris. Kaj kvazaŭ ŝi elĉerpus ĉiujn fortojn tra la korpo, ŝi blovis longan suspiron kaj falsidis sur la seĝon deprimate kun mallevita kapo. Larmo malrapide fluis el ŝiaj okuloj kaj falis sur ŝian mandorson. Levinte la kapon, ŝi gapis al la lampo kun sento de perdiĝo. Nun inter ŝiaj brovoj iom riveligiĝis pentemo. Ŝi pentis, ke ŝia ĵusa konduto estis tro kruda kaj tro senmotiva.

“Kial kulpigi lin!”

Kun memriproĉo ŝi levprenis pecojn de la foto, milde kunmetis ilin sur la genuoj, kvazaŭ patrino miskulpigus sian infanon. Ŝi ne povis sinretene donis kison al la homo en la foto. Ŝi amas lin! ŝi amas lin por ĉiam! Kiun motivon ŝi havas malami lin? Kvankam la travivaĵo en la roka kaverno sub la monto Feilai estas la fonto de ŝia doloro, ĝi tamen restas la plej trezora paĝo en ŝia juneca historio! Poste ilia ama kelkfoja orgio en la hotelo aldonas buntan koloron al ŝia juneco. Ŝi trafis ondon da febro sur la vizaĝo kaj eksentis molan dolĉecon etendiĝantan tra la tuta korpo.

Ŝi pensis en tranco: “Unuvorte, mi ne povas kulpigi nur lin. Ĉu mi ankaŭ ekscitiĝas tiam? Sed homoj estas senŝanĝaj kaj la tero senŝanĝa. Kiu povus garantii, ke mi ne involviĝu en ĝi? Cetere la budhaj statuetoj sur la rokaj muroj povas atesti, ke tiam mi ne agis tro absurde kaj ne estis pelata de karna tento ĝis tia grado, ke mi ne sciis, kiel trakti. Kvankam tiam mi lasis lin palpi kaj kisi kvazaŭ en songo, mi tamen decideme rifuzis lian lastan postulon. La sekvan tagon mi iris al lia hotelo, kio nature estis erarego. Sed nur la Ĉielo scias, fantomo urĝis min de post mia dorso, kaj mi neniel min detenis!”

Ŝi pensis sian tiaman animstaton: du fortoj tiras ŝin, unu el ili, nedirebla, sed nerezistebla, urĝas ŝin de poste; la alia, evidenta moralkoncepto, penas ŝin baras. la sango de la tuta korpo apogas la unuan forton, dum en unu angulo de ŝia cerbo io malvarma ŝin kuraĝigas. Sed kiam ŝi alvenis al la hotelo, la jenaj vortoj konvinkis la moralkoncepton: ĉar hieraŭ vi jam oferis al li viajn sanktajn korpon kaj buŝon, tial via domaĝo ne havas ajnan signifon.

Kun tia penso ŝi des pli enfaliĝis kaj fine post ensorbado de sukertegilon de la plezuro gustumis amarecon en la mezo. Kiam ŝi iris al la hotelo la trian fojon, li jam foriris, nur lasante unu leteron kaj unu foto. Ekde tiam ilia “romance” (amo) finiĝis, kaj ŝia tragedio komenciĝis.

La fraŭlino eligis mallaŭan suspiron. Ŝi metis la disŝiratan foton en la tekono kaj irinte al la fenestro, ŝi stulte rigardis al la ĉielo. El kelkaj maldensaj nombroj elflosas plenluno, kiu ŝajne kuras rapide, sed ĉiam restas senmova ĉe la fiksita loko, kie ĝi estas. Mistere palpebrumantaj steloj ŝajnas grupo da infanoj babilantaj brue. Malvarma vento blovas grandpece, kvazaŭ donante diversajn sentojn el la ĉielo. Gapante, ŝi eklhavis pli konfuzitan kaj pli okupitan menson: ĉu mia konduto estis tro senpripensema? Kun konfuzita menso mi falis en marĉejon, ĉu mi sola kulpas? Ĉu la homo, kiun mi amas, estas vera trompisto? Ĉu li estas la malbonulo de ĉiuj flankoj, kiu ŝtelis ĉastecon de virgulino kaj mensogegis, tiel ke mi ankoraŭ sopiras al li kun tutanimo? Ĉu lia ago estas komploto anticipe aranĝita? Ĉu la letero lasita de li estas ankaŭ kutima truko, kiu jam trompis multajn inojn? Ĉu tiuj sinceraj kaj amplenaj vortoj en la letero estas hipokritaj mensogoj? Ĉu tia belaspekta kaj aminda junulo estas eĉ trompisto? Ĉu mi estas tiel malsaĝa, ke mi ne rekonas en li trompisto? Ĉu mi vere dronas en la ĉagreniĝo pri sekso kaj ruinigas mian vivon kvazaŭ en sonĝo?

“Neniel!” ŝi kriis en la koro, “ĉio ĉi ne estas tia! La kunulinoj multe pli frivolaj ol mi ne trafis tian aferon. Li ne estas malbonulo. Lia foriro estas devigita. Li rezignas pri sia mema ĝojo por sin doni al la homaro. Li estas senartifika bravulo. Kvankam la homoj kun peza respondeco kia li, ne devas senpripense fali en amon, li tamen diris, ke li ankaŭ estas homo el sango kaj karno, kun entuziasmo kaj nerezistema kontraŭ la karna tento.” Ŝi rememoris, ke estis ŝi mem, kiu allogis lin al brakumado. Ĉe tio ŝi honteme kovris la vizaĝon per ambaŭ manoj. Ŝi ankaŭ profunde ekpentis, kial ŝi ne tuj lin serĉis por sin ĵeti en fajron, en akvon kaj eĉ iri kune kun li al la rando de la ĉielo. Abrupte nova espero vibrigis ŝian koron: ĉu li vere revenos? Kun viro sindonema al la feliĉo de pli multaj homoj kiel sia edzo ŝi devas senti fieron pri li.

“Sed en la letero li diris, ke li ne havas tutcertan esperon reveni. Lia misio estas strebi por eterne kaj ne forlasi lian postenon ĝis lia morto. Pro tio, li diris, ke li iru sola, ne volante, ke lia amatino faru nenecesan sinoferon.”

Nigra ombro denove kovris ŝian koron. Sed kiam ŝi konstatis, ke ŝi donis sian virgulinan ĉastecon al la viro, kiu ŝi amas, ŝi eksentis, ke foriĝis la peza ŝarĝo sur ŝia koro. Ŝi mokridis pri si pro tio, kial ŝi ne povus veni al nuna kompreno, sed afliktiĝis tuttage, kvazaŭ ĉagreniĝante pro tio, ke ŝi jam faris krimon. Ŝi devintus malkaŝi sian sekreton al la aliaj, ke ŝi enamiĝas al viro kaj donis siajn koron kaj korpon al li, tamen por la pli sankta afero, li brave ŝin forlasis. Ĉu tio ne estas la plej brila kaj la plej nobla afero!

Kaj ŝi tute rajtas ridi kun trankvila koro inter la ĝojantaj homoj de la bela mondo.

En memkonsolaj rozkoloraj nuboj kaj mistera nokta brakumado Fraŭlino Huan

ĝuis multajn plezurajn songojn. Ŝi songis, ke ĉiuj serioze atentoplene aŭskultas ŝian rakontadon pri ŝia unua amo, kaj laŭdas ŝian amaton kiel veran revolucionan junulon, kaj ke ŝia amato revenas plene kun gloraj stel-insignoj sur la brusto.

La mistera nokto forpasis kaj la reala tago sekvis. La blindiga sunlumo kaj brua homamaso igis la fraŭlinon eksterordinara timema. La kuraĝo de la lastnokta ekdormiĝo jam eskapis, kaj ŝia kredo ankaŭ ŝanceliĝis. Ŝi legis malestimon kaj mokemon sur ĉies vizaĝo kaj vole nevole ŝi fermis sin en la ĉambron.

Por forigi sian enuon ŝi legis ĵurnalon. Sed en felietono de ĉitiejaj novaĵoj ne mankas raportaĵoj pri viraj malfidelaĵoj, en kiuj ĉiuj ideogramoj ŝajne ŝin sakris krude. Forĵetinte la ĵurnalon, ŝi prenis libron de malnova romano, en kiu prezentiĝis nenio alia pli ol “amavidaj virinoj kaj malfidelaj viroj, kio servis ĝuste kiel priskribo pri ŝi mem. Ŝi prenis alian libron de nova romano kaj legis, sed ĝi des pli kolerigis ŝin. Ŝi vidis, ke ŝi priskribiĝas kiel la tragedia protagonisto, kiu estas nude prezentata, kaj fariĝas la ludilo pelata de la sorto, kvazaŭ la fluganta insekto en la manplato de bubo.

Forĵetinte la libron, ŝi kuŝigis sin sur la lito, ne penante pensi plu. Ŝi gapis al la grizaj nuboj sur la ĉielo kaj apreziis ilian formon. Tiu ĉi similas al la vizaĝo de la onklino, tiu al blanka ĉevalo, ĉu tiu galopanta de malproksimeco ne ŝajnas vagonaro? “Jes, kompreneble ĝi estas vagonaro,” ŝi diris en la koro. “Ĉu tiuj kvadratoj ne estas fenestroj de la vagonaro? Kaj cetere homkapo riveliĝas tra la fenestroj” . Kiel guto da akvo sur sorba papero tiu kapo pli kaj pli grandiĝas kaj renkonte iras al la fraŭlino, ju pli ĝi proksimiĝas, des pli granda ĝi fariĝas, kaj ju pli granda ĝi sin prezentas, des pli ĝi proksimiĝas. Kiam la fraŭlino rekonas en ĝi sian amaton, ĝi subite, kiel eksponita fot-filmo, malklariĝas kaj malaperas.

La papebroj de la fraŭlino iom kaj iom peziĝis kaj mallarĝiĝis ĝis linio, tra kiu ŝi ankoraŭ rigardis, kaj fine tute fermiĝis. Sed ŝi ankoraŭ imagis, ke li eble sin trovas en vagonaro, eble li hodiaŭ ree revenas, eble mi renkontos lin, kiam mi eliros eksteren, eble li pacience atendas ĉe la antaŭa rendezuvo, eble... Sin turninte leĝere, ŝi jam eliris el la dormoĉambro kaj nerimarkite ŝi rekte iris al la bordo de la lago, kie ili rendezuis kelkfoje. La lagakvo similas al arĝenta speguleto. Iu sidas sur la ŝtona balustrado, jen estas li! Sin ĵetinte sur lian ŝultron, ŝi hasteme diras:

“Aĥ, vi revenas!”

“Jes, mi revenas.”

“Nature vi revenas por geedziĝo kun mi. Mi volas diri al ĉiuj, ke ni tuj geedziĝos. Vi ne estas frivola viro. Vi ne estas trompisto.”

“Mi estas nek trompisto nek via edzo.”

“Sed ni jam...”

“Ĉu jam havi amaferon? Pli bone ni tute forgesu ĝin. Mi ne estas via edzo, sed

via iama amato. Vi ankoraŭ estas juna kaj vi ankoraŭ donos al la homo, kiun vi amos, ĝojon, multan ĝojon, pluroblan ĝojon pli ol tiun, kiun ni jam spertis!”

Ne povante respondi, ŝi nur mallaŭte ploris, brakumante lin ĉirkaŭ lia kolo.

“Vi devu ĝui la ĝojon de la vivo. Kvankam vi havis amaton, vi ankoraŭ trovos el alia viro la ĝojon, kiun vi bezonas. Supoze, ke mi jam mortis...

“Tamen vi ne mortis.”

“Mi volas morti nun.”

Dirante, li sin turnas kaj volas sin ĵeti en la lagon. Ŝrikante, ŝi brakumas lin. Vere ŝi sukcese retenas lin, sed ŝi nur ĉirkaŭprenis kapkusenon en la lito. Malvarma ŝvito malsekigis ŝian silkan veston. Ventblovo tremigis ŝin.

Ŝi rigardis ĉirkaŭen en paniko, timante, ke iu kaŝgvatas la sekreton de ŝia songo. Neniu tie. Tamen voĉo sonis kvazaŭ tra septo de la ĉambro: “Mi scias, mi scias!” Ŝia koro sinkis kaj dolore batis. Ĉu tia voĉo venas el la bofratino? Ĝi ankaŭ ne similas al tiu de akralanga fraŭlino Jin (*ĝin*). Des malpli... Subite ree alvenas tiu voĉo. Ŝi distingis la cikadan ĉirpon alblovitan de zefiro de malproksimeco.

Sidante ĉe la fenestro, ŝi rememoris la songon, amindan sed abomenindan. Ŝi pensis, ke ĝi ne estas bona aŭguro. Sed kiam ŝi pri tiuj vortoj, kiujn li diris en la songo, ankaŭ skribiĝis en la adiaŭa letero, kaj ŝi konsideris, ke tiu songo ne estas stranga. “Ĉu tio, kion li diris, estas vere racia?” Ŝi pesis tiujn vortojn kun trankvila humoro. “Ĉu ĝi vere ne estas inda afero? Mi jam ne estas la antaŭa memo kaj mi jam perdis la plej valoran rajton, kiun mi posedis antaŭe. Mi jam fariĝas dispecigita jadplato. Ĉu ĝi ne estas inda afero kaj devas esti tute forgesita? Tamen mi restas mi kaj nenio mankas al mi. Mi certe donos al tiu, kiu min amos, ĉiujn ĝojojn, senmezurajn ĝojojn. Se mi forgesos tion ĉion! En la letero li konfidis al mi sian absolutan sekreton. Li diris, ke li eniros en la tombon. Liaflanke la sekreto estos enterigita en la tombo por ĉiam, kaj miaflanke ĝi eterne plantiĝos en la profundo de la koro. Ĉu certas, ke ne triulo konas ĝin? Mi deziras, ke neniu konu ĝin!

Sekve de tio, rozkolora espero ŝvebis antaŭ ŝiaj okuloj, kaj miraĝoj stakiĝis tavolon super tavolo en ŝia iluzio. Ŝi kaŝos — certe povos kaŝi en forgeso la sekreton de ŝia unua orgio dum pubereco, kaj trankvile ĝuos ĉiujn plezurojn de la bela mondo. Abomeninde estas, ke la bela mondo samtempe apartenas al multaj triuloj.

“Mi deziras, ke neniu konu ĝin! Ĉu kun plena certeco?”

Ŝi ne kuraĝis aserti, ke jes. Multaj triuloj — tedaj triuloj, malbonintencaj triuloj, la triuloj, kiuj ĉiam okupiĝas pri spionado de aliulaj sekretoj, kaj la triuloj, kiuj ĉiam pretas rikani al aliuloj — ĉiuj svarmis antaŭ ŝiajn okulojn. Ŝi profunde malamis tiujn triulojn! Ŝi kovris sian vizaĝon, firme kunpremitaj dentojn. Ŝi

profunde kredis, ke ŝi havas plenan rajton vivi en la ĝoja mondo, kaj ili havas neniom da rajto senigi ŝin je vivado, sed ilia demona forto igis ŝin vivi malĝoje. La abomenindaj triuloj! Ŝi preĝis, ke pandemio balae ekstermu ilin ĉiujn!

Malbenado, kolerado kaj malespero helpis al la fraŭlino pasigi tagojn de tro timiga realeco.

Ĉe vespermanĝo la bofratino subite menciis, ke ŝi iros spekti la nove prezentatan filmon “La Trista historieto de junulino Ma Zhenhua (*ma ĝenhŭa*)”. Ŝi rigardis fraŭlinon Huan, kvazaŭ petante ties konsenton. Ŝajne timante, ke la ĉeestantoj ne komprenas ŝin, ŝi ekparolis pri la kialo de memmortigo de la junulino Ma. Fraŭlino Huan sentis, ke ŝia ĉiu vorto pikas ŝian koron kiel pinglo. Ŝi kaŝe rigardis la mienon de siaj kuzon kaj bofratino kaj trovis, ke ili sin tenas same kiel ordinare. Ŝi eksentis ioman faciligon en la brusto. Kun rideto ŝi pene afektis ne preni ŝiajn vortojn serioze. Sed la voĉo de ŝia kuzo peze premis sur ŝiajn palpitaciantajn nervojn: “Fakte tia afero ne indas surscenejiĝon, ĉar ĉiutage okazas tia tragedio kiel tiu de Ma Zhenhua. Se neniu scias pri tia afero, oni konsideras, ke neniam okazas tia afero. Kaj la trompita ino ne emas mortigi sin.”

Je tia subita eldiro de la kuzo Fraŭlino Huan abrupte sen tia nigriĝon antaŭ la okuloj. La seĝo, sur kiu ŝi sidis, strange moliĝis, kiel amaso da kotonon, kaj ŝi sinkis kaj sinkis. Feliĉe la vortfluo de la kuzo glitis al alia direkto, kaj plie ŝi sentis, ke neniu rigardo balais ŝian vizaĝon, alie ŝi certe svenus.

“Ĉar bofanjo ŝatas ĝin, mi akompanu vin por spektado.”

Fraŭlino Huan pene elpremis tiujn vortojn. La tuta tablo subite falis en kvietecon. Ĉiuj ĉeestantoj ĉe la tablo sentis neatendite, ke Fraŭlino Huan eĉ havas tian humoron hodiaŭ. Dankema rideto ekludis ĉe la buŝo de la bofratino. La fraŭlino ankaŭ trudis delikatan rideton, kaj ŝi gratulis sin, ke ŝia truko eĉ iom efikis. Almenaŭ neniu el la domanoj skeptikas pri ŝi!

En kinejo ŝi renkontis kelkajn konatojn. Ŝi zorgeme legis ilian vizaĝon kaj analizis iliajn eldirojn. Ili kun sincera mieno tenis nek ironian rigardon nek malican rideton. “Ŝajne ili ne sciiĝas pri mia afero,” ŝi pensis en si, spektante la rendevuon en la filmo. Ŝi certis, ke ŝia amato povas absolute teni sian sekreton, kaj ŝi ne volis, ke ilia dufoja rendevuado falis en la okulojn de aliuloj. Ŝia sperto tute malsamas ol tiu de junulino Ma Zhenhua! “Dum la pasintaj du semajno mi tro nervoziĝis, tiel ke oni naskas miron kaj skeptikecon, ĉu ne?” Pro tio ŝi kaptis ŝancon diri kelkfoje, ke ŝi timas varman veteron kaj ofte suferas de sunfrapo en la somero.

Ŝi laŭgrade sentis, ke ne ĉiuj triuloj estas absolute abommenindaj kaj la vivovojo ankoraŭ plenas je lumo. Tamen ŝi vere “malsaniĝis”, kompreneble, “de sunfrapo”. Dum la tutaj tagoj ŝi emis dormi pro kaptumiĝo kaj kelkfoje sentis vomemon. Ofte ŝi volis manĝi tion aŭ alion, sed kiam la manĝaĵo atingis ŝian buŝon, ŝi trovis, ke ĝi

ne havas la antaŭan guston.

La anormala strangajo dauris unu semajnon. Ŝi trovis novan sekreton: la monataĵo ne plu alvenas. “Ĉu tio estas...?” Pensante pri tio ŝi sentis fortan batadon de la koro. La espero nove formita tute diseriĝis.

Kion fari do? Tiu nebonvenigata vivestajeto! Tio ne ebligas kaŝi la sekreton. Nun eĉ la mistera kaj milda lunnokto ne donas al ŝi kelkan belan iluzion. Tagoj kaj noktoj sinpele forflugas, kaj ŝi sentis, ke ŝi iras al tombo, al pereco paŝo post paŝo. Kaj ŝi solece iras sen konsolo, sen kompatado, eĉ sen rankoro. Se iu ŝin malamas, tio estas pli bona ol en malplena flegmeco. Ŝi tre volus patrinon, eĉ la plej rigoran, kaj ŝi povus iom plori en ŝia sino, parolante rekte al ŝi sian mizeron. Post tio ŝi iros al la morto. Sed ŝi ne havas tian patrinon. Kiam ŝia propra patrino forpasis, ŝi ankoraŭ troviĝis en vindaĵoj. Ŝi jam ne povas plu memori ŝian ridmienenon. En ĉi mondo ŝi havas neniun karulon. La onklino estas ŝia protektanto kaj kiam la bofratino ankoraŭ ne edziniĝis, ŝi pensis, la kuzo estis nur kuzo, kaj nun li fariĝis la kuzo en la vera senco.

Kiam nokto falis, sidante ĉe la fenestro, ŝi stulte gapis al la steloj sur la ĉielo. Ĉagreniĝo tuementis ŝin kaj ŝia penso flugis foren, foren kaj vagis inter la steloj. Ŝi vidis, ke rubando de ruĝa luno leviĝas kaj la mieno de ŝia amato aperas en la ruĝa luno, kaj ankaŭ aŭdis lin diri “Mi neniel imagas, ke nia denova renkontiĝo lasas rememoron. Antaŭe mi volas, ke vi falu en forgeson, sed nun mi petas, ke vi zorgu pri tiu ĉi rememoro!” Ŝi sciis, ke tio estas la krio el la profundo de lia animo, kaj la vasta mondo povas aŭdi lian krimon kaj la steloj laŭde kapjesas.

Ŝi tuj fariĝis kuraĝa kaj unu vojo sin etendis antaŭ ŝi. Ŝi volis anonci al la mondo siajn sekretojn kaj decidon, ke ŝi sentime starigas sin antaŭ la publiko, firme brakumante la frukton de sia unua amo.

Tamen la lasta duonluno ruze palpebrumis al ŝi, kun rikano, kaj fride diris: “Vana penso! Bela vana penso! Ĉu vi povus akiri indulgon de la malvarme rigora socio? Kaj krome vi jam diris adiaŭ al la homaj plezuroj. Sed iu anstataŭus vin en via nomo, ĉio ŝanĝiĝus malsame. La socio bezonas hipokritan nomon. Via plej saĝa rimedo estas serĉi homon por kovri vian mison.”

Fraŭlino Huan ekhavis hezitemon. Estis malfacile por ŝi elekti inter du elirvojoj, du vojoj respektive kun avantaĝo kaj malavantaĝo, kio ĵetis ŝin en embarason por fari decidon. Steloj kaj la luno insistis je siaj propraj vortoj respektive. Tio igis ŝin neelteneble ĉagreniĝa. Ŝi forgesis ridon vere, kaj ankaŭ ploron. Tia granda problemo kaj tia forta ŝokado reduktis ŝin ĝis stuporeco.

Des pli ŝi malgrasiĝis tagon post tago. Ŝajnis, ke la sekreto jam ne plu eltenis ne montri sian vizaĝon. Pri ŝia malgrasiĝo la onklino ankaŭ maltrankviliĝis. Kun ŝancelanta kaduka korpo ŝi iris en la ĉambron de Fraŭlino Huan kaj sidis tie

duonhoron. Ŝi babileme demandis ripetfoje: “Huan-njo, vi malgrasiĝas lastatempe. Se vi havas nalsanon, diru al mi, via onklino. Kia malsano? Kia penso? Kion vi volas? Diru ĉion al mi. Mi ordonos al ili alporti por vi. Huan-njo, ĉu vi afliktiĝas? Ĉu via bofranĵo diris ion malbonan al vi? Ĉu Ajin ne servas zorgeme? Diru al mi ĉion. En mia familibrancĉo restas nur vi kara al mi. Se al vi okazas io letala, kiel mi povos rakonti tion al viaj mortintaj gepatroj kaj aliaj parencoj en la submondo?”

La maljunaj okuloj de la onklino iom malsekiĝis. Retenante larmojn, Fraŭlino Huan nur trudis solecan rideton kaj malpeze skuis la kapon. Ŝi tre volus diri: “Onjo, vi vere dorlote amas min, ĉar vi portas respondecon de zorgado pri mi pro tiuj mortintoj sub la tero. Sed se vi sciiĝus pri mia malindaĵo, kiun vi plej malamas, ĉu vi ankoraŭ montrus amemon al mi? Kun larĝe malfermitaj tristplenaj okuloj, ŝi rigardis al la maljuna longa vizaĝo de la onklino, balbutante tiajn vortojn kiaj “mi ne havas malsanon”, “mi sentas min nekomforta pro la varma vetero” kaj “mi ne havas malplezuron en la koro”. Ŝi ne volis — ne havis sufiĉan kuraĝon — deklari sian ĉagrenigan sekreton.

Ŝi sciis, ke la amo de la onklino al ŝi estas por la patrinflankaj parencoj, tiu de la kuzo estas por la bofratino kaj tiu de la bofratino nur por la kuzo. Ili ĉiuj havas aliajn kialojn ol amon por ŝi mem. Nur unu homo, kiu vere amas ŝin, iris tre foren, kio kaŭzis ŝian nunan suferon. Ĉu tio estas ŝia sorto? Ĉu ŝi jam estas destinita morti aĉan morton? Ŝi volus morti tuj antaŭ tiu homo. Tamen li jam iris tre tre foren senspüre. Se iu alia povus ami ŝin pro ŝi mem — se nur ekzistas tia homo, ŝi ankaŭ volontus morti, elverŝi al li la sekreton de ĉagreniĝo kaj morti sub lia indignaj pugnobatoj.

Pro tiu konfuzita kaj dolora penso ŝi nereteneble faligis larmojn. Rigardante la kadukan dorsfiguron de la onklino, ŝi sentis, kvazaŭ ŝia koro tordiĝus.

La bofratino ankaŭ venis lerte demandi kio malĝojiga troviĝas ĉe Fraŭlino Huan, kaj asertis, ke ŝi malgrasiĝis. Kaj plie, ŝi dirs, ke se io malzorgema ekzistas, tiu faros pardonon kaj rekte eldiros familiare. Tremante tra la korpo, Fraŭlino Huan konsideris, ke tiuj fremdiĝantaj konsoloj malkomfortigas ŝin pli ol tiuj akraj sakroj al ŝi, kaj ankaŭ ke ŝia kontraŭkutima teniĝo kaŭzis konjekton kaj maltrankvilecon en tiu ĉi familio kaj spionaj okuloj jam ŝin gvatas ĉirkaŭ ŝi. Nun eĉ se ŝi fermas sin en sian propran ĉambron, ŝi ne povas akiri momentan trankvilecon. Ĉiu voĉeto, ĉiu paŝbruento igis ŝin eksalti de surprizo.

“Ĉu tiu laŭta bruo, kiu alvenas renkonte al ŝi, ne estas paŝbruo de la Morto? Ĉu vi iras al la Morto tiamaniere? Ĉu vi, en disflorado de juneco, kiu ĵus gustumis guton da vino de ĝojo, tuj silente mortos en soleco?”

Fraŭlino indigniĝis ĝis la grado de frenezeco. Ŝi ne volis morti. Se nur ŝi povus eskapi, ŝi absolute ne volontus morti. Ŝajnis nun, ke morto estas la nura elirejo.

Kiel do kuraĝe deklari sian sekreton kaj ignori tiujn rikanojn? Ŝi cerbumis ripetfoje pri la situacio, sed ŝi ne havis tiom da kuraĝo. Memmortigo bezonas momentan kuraĝon, dum traktado pri tia situacio bezonas longan tempdaŭron. Ĉu serĉi alian viron por kovri ŝin? Ŝi ne havas plenan certecon. Kaj cetere plenumi tian aferon kostas multan paciencon. Se turni sin al malbonulo, ĉu la afero troviĝos en kaĉo?

Ŝi komencis envii senmezure siajn amikinojn, pro tio, ke ili ĉiam havas du au tri virojn malantaŭ ili. Ili ne timas la ĝenaĵon societumi kun tiuj viroj unu post alia. Eble ili povos kovri sin per tiuj viroj. “Do mi havas la nuran elirejon de memmortigo,” ŝi pensis malespere, “Mi estas tro bonkora kaj honesta, sed bonuloj ne povas trovi piedtenon en ĉi nuna mondo!”

Super Pagodo Baoshu (*baŭ-ŝu*) unu stelo glimis per frosta lumo. Nokto fariĝis pli kaj pli kvieta kaj spiris je morto. Fraŭlino Huan jam faris decidon. Ŝi prenis silkan rubandon kaj pendis ĝin sur la litkoloneton, kun abunde fluantaj larmoj. Ŝia cerbo animiĝis kvazaŭ per elektro kaj ĉiuj travivaĵoj de ŝiaj mallongaj dudektri jaroj alsvarmis. Ŝi ekmemoris, kiel la nova tajdo agitis ŝian animon deksep-jaran, kiel ŝi soifis je nova lumo, kiel ŝi revis pri sia feliĉo, kiel ŝi gratulis sin pro tio, ke ŝi ankoraŭ ne fianĉiniĝis, kiel ŝi sugestis al siaj onklino kaj kuzo, ke ŝia edziniĝo estas aranĝota laŭ ŝia bontrovo, kiel ŝi proksimiĝis al la viro duonsurprize kaj duonĝoje, kaj venis al la nuna rezulto! Ŝi plektis la silkan rubandon en maŝon per tremantaj fingroj. Kvazaŭ kun krevonta koro, ŝi eligis tristajn kaj akrajn malbenojn: trompo, trompo! ĉio estas trompo. Emancipiĝo, libereco kaj lumo! mi volus esti analfabeta kaj senscia kaj edziniĝi laŭ ilia aranĝo, kaj almenaŭ min ne trafis nunaj ĉagreniĝo kaj finaĉo! mi almenaŭ povus vivi trankvile kaj kontente kiel la bofratino!

Ĉe la litrando ŝi tremis tra la korpo, kun okuloj plenaj je sangostrioj. Ŝi ne povis pensi plie. Nur unu penso rapide kirlis en ŝia eksplod-krevonta cerbo: la penso, kiu deklaras la krimon de trompantaj emancipiĝo, libereco kaj lumo! morto estas deklaro! ŝi ne volis heziteme ŝovi sian kolon en la maŝon faritan el silka rubando. Ŝia korpo flankiĝis eksteren kaj ŝiaj piedoj forlasis la litrandon.

Samtempe moviĝis malklara ideo en ŝia cerbo: devas troviĝi alia elirejo, se ŝi kuraĝe irus laŭ la tendenco, se ŝi povus adaptiĝi al la paŝoj de la rapide ŝanĝiĝema socio. Sed la silka rubando jam streĉiĝis. Ŝiaj okulgloboj elstariĝis, ŝia lango elŝoviĝis pli longe kaj ŝia vizaĝo fariĝis livida.

Ŝiaj elstaraj okuloj gapis antaŭen, kvazaŭ pruvante, kio finfine estas tio, kio povas adaptiĝi al la rapide ŝanĝiĝema homa vivo!

la okan de julio, 1928

Anonima

Timiga vojaĝo

Reverkis Fu Wen (Ĉinio)

laŭ reta materialo

Fraŭlino Mei (*mej*), kiu jam lernis tri jarojn en universitato, decidis fari vojaĝon antaŭ sia diplomitiĝo al la urbeto Blanka Monto tricent kilometrojn malproksima.

Ŝi volis varbi kunvojaĝonton per afiŝo sur la retpaĝaro de la universitato kaj konigis sian telefonnumeron por faciligi kontakton. Posttagmeze de la sama tago Wang (*vang*), duajara studento de ŝia sama lernejo telefone promesis esti ŝia kunvojaĝonto.

Sekvan tagon, kiam ili renkontiĝis ĉe bushaltejo, ili trovis, ke la biletoj por veturi rekte al la celloko jam frue elĉerpiĝis.

Li proponis, ke estas pli bone petveturi, pri kio Mei konsentis. Wang sin turnis al ŝoforo en la restoracio Ŝofora Hejmo kaj metinte antaŭ lin ducent juanojn, humile petis, ke tiu veturigu ilin nur vojpecon.

Ĵetinte rigardon al monon kaj poste al Wang, la ŝoforo demandis: “Nur vi?”

Wang respondis: “Plus alia fraŭlino.”

“Fraŭlino?” La okuloj de la ŝoforo ekbrilis. Post iom da pripenso, li diris: “Nur unu sidloko disponeblas en la ŝoforejo, kaj unu el vi devas sidi en malantaŭa vagono.

La studento tuj diris: “Ne problemo. Mi sidos malantaŭe.”

La ŝoforo aldonis: “Estas malfacile veturi sur tia vojo. Mi ne povas certigi al vi, kiam ni atingos la cellokon. Eble ni neniam atingos ĝin.”

Post dek minutoj la fraŭlino eniris la mallarĝan kaj malbonodoran ŝoforejon. Aliajn dek minutojn poste la malaltaj kabanoj ĉe ambaŭ flankoj de la kamiono retroire malaperis kaj abrupte sin prezentis malhelaj montoj antaŭ iliaj okuloj. La ebena sabla vojo cedis al malglata vojpeco. Kaj pro tio la veturilo tangis kaj skuiĝis kiel boato sur ondoj. La radoj ŝprucigis ŝtonetojn, kiuj frapetis la ĉasion de la aŭto, eligante klarajn sonojn de metalo. De tempo al tempo noktaj birdoj kriĉantaj flugis tra la nigra-griza ĉielo kaj sin ĵetis al malproksima monto.

Fetoro atakis ŝian nazon en la ŝoforejo. Scivoleme ŝi ĵetis rigardon ĉe siajn piedojn kaj trovis, ke nigra sako kuŝas enŝovite sub ŝia sidloko. Ŝi supozis, ke ĝi

estas la fonto de la fetoro. La verutilo senĉese skuiĝis kiel lulilo. Ŝi sentis fortan dormemon. Ŝi volis endormiĝi, sed ŝi ne liberiĝis de maltrankvilo pri la viro, kiu senemocie stiris la veturilon, sidante apud ŝi.

Kiam ŝi emis endormiĝi, ŝi eksentis fortan skuiĝon. Ŝajnis, ke la rado kuris sur altan malebenaĵon, abrupte saltis kaj poste peze falis sur la teron. Kontraŭ ŝia atendo ŝia korpo saltis kaj ŝia frunto preskaŭ frapiĝis kontraŭ la tegmenton de la ŝoforejo. Ŝi eligis panikan ekkriion. En mallumo ŝi aŭdis la viron sible ridetis, kvazaŭ serpento elŝovus la langon facilmove.

Tiam ŝi sentis, ke io malpeze gratas ŝian kruron jen kaj jen, kun regula ritmo. Ŝi ekkuntiris siajn brovojn. Ŝi turnis la kapon kaj instinkte direktis sian rigardon al la manoj de la ŝoforo. Sed liaj manoj kviete tenis la stirradon sen ajna demoviĝo. Kaj ŝi promeniĝis la rigardon ĉe siajn piedojn, kaj en malhela lumo ŝi vidis, ke palkolora homa brako rigide etendiĝas el sub la sidloko kaj ĝiaj disigitaj fingroj karesas ŝian maleolon fojon post fojo.

Ŝi histerie ekŝriakis pro timo.



Aŭskultinte, kion ŝi rakontis, la studento demandis al la ŝoforo: “Ĉu estas unu

mano en la ŝoforejo? Vi certe aŭdis kion ŝi diris.”

Kun sibla rideto, la viro etendis siajn manojn, dirante: “Jen vidu. Estas du manoj, sed ne unu, ĉu ne?” Li reeniris en la kajuton, brue turnis la aĵojn kaj elprenis grizblankan molan tubon. Ĵetinte ĝin ĉe la piedojn de la studento, li diris: “Kian imagipovon via koramikino havas! Mi uzas ĝin por plenigi la akvujojn de la kamiono. Miaflanke, mi asocias ĝin nur kun bastono aŭ serpento, sed neniel prenas ĝin por mano!” Li moke demandis al la junulino: “Ĉu vi jam vidis, ke la fingroj de la mano estas ŝmiritaj per ruĝa ung-verniso?”

Ŝi ne estis certa, ĉu ŝi misvidis ion. Ŝi flustris al la junulo, ke ĵus ŝi dormemis. Ŝi eĉ insistis, ke la ŝoforo ne estas normala viro. Kun abomena mieno ŝi menciis la nigran sakon sub la sidloko kaj la fedoron por pruvi, ke la viro almenaŭ estas mallaborema en purigado.

Aŭdinte tion, la junulo, kiu fikse rigardis ŝiajn okulojn, lante diris: “Laŭ via eldiro, la sako eble entenas ... kadavron...”

Kun larĝigitaj okuloj ŝi eligis surprizitan ŝrikon.

La junulo tuj permane kovris ŝian buŝon kaj flustris ĉe ŝia orelo: “Ne eligu voĉon. Eble li estas murdisto. Post kiam ni atingos la lokon, kie troviĝas homoj, ni tuj descendu.”

Kelkan tempon post la oka punkto, la kamiono haltis ĉe riparejo de pneŭoj. La junulo donis ekpuŝon al la brako de la fraŭlino kaj ili ambaŭ elsaltis de la veturilo kaj pelis siajn piedojn dum kelka tempo. Kiam ili eniris malluman strateton, la junulo vee diris: “Mia sako... mia sako perdiĝis. Lia voĉo elspiris iom da paniko.

Ŝi ekmemoris, ke li vere kunportis nigran sakon pluvimunan. Ŝi atentigis al li: “Ĉu vi lasis ĝin en la vagonon? Kion ĝi entenas? Ĉu monon?”

Li respondis nenion. Post iom da pripenso, li diris: “Lasu do. Nenio valora en ĝi... Mi supozas, ke tiu ulo jam forstiris la veturilon. Ni iru serĉi loĝejon.”

Ili reiris laŭ la vojo, kaj kiam ili perterpasis la riparejon, ili kaŝe rigardis ĉe stratangulo. Vere la kamiono jam forveturis.

“Ĉu ni devas raporti tion al la polico? Se tiu sako vere entenus kadavron?” ŝi demandis.

Li jetis al ŝi ekrigardon kaj diris: “Ĉu vi vidis tion propraokule?”

Ŝi ekskuis la kapon.

Li klarigis: “Mi nur konjektis, ke la sako entenas kadavron. Mi ja konsideras nian sekurecon. Prefere ni kredu tion vera ol aserti tion falsa. Rilate raportadon al la polico, ni devas esti zorgema. Kion ni faros, se ĝi ne estas kadavro? Ni ne ŝovu nian nazon en tiun aferon.”

Pripensante, ke li diris racie, ŝi tenis sin senvorta.

En la urbeto ili fine trovis malluksan gastejon kaj ili sin enloĝigis. Proksime al

la deka ŝi malŝaltis la lampon. Sur la lito ŝi neniel sukcesis endormiĝi, turniĝante de flanko al flanko. Ŝi apenaŭ ekfermis siajn okulojn, kiam ŝi ŝajne eksentis, ke blugriza homo, starante ĉe la litkapo, ridete etendas la samkoloran brakon al ŝi.

Ŝi simple malsupreniris de la lito kaj sin vestis. Malferminte la pordon, ŝi iris al lia ĉambro kaj trovis, ke la lampo jam estingiĝis ene. Ne volante lin ĝeni, ŝi volis reiri daŭrigi sian dormon, sed ŝi sentis sin iom timema, pensante, ke ili morgaŭ sin veturigis al la urbeto Blanka Monto. Ŝi ne sciis, kiel nomiĝas la urbeto, kie ili nun troviĝas, kiel longe distancas ĉi tie al la urbeto Blanka Monto, kaj kiel ili prenos veturilon morgaŭ. Pensante, ŝi palpis sian vojon malsupren al la teretaĝo.

La gastejestro, kiu estis maljunulo, staris ĉe la pordego, kun klinita korpo. Ŝi eligis softan tuson. La maljunulo sin turnis kaj ŝin rigardis rigide. Lia mieno timigis ŝin.

Rulinte siajn okulglobojn, la maljunulo raŭke demandis al ŝi: “Jes?”

Ŝi demandis: “Kiel longe distancas ĉi tie al la urbeto Blanka Monto?”

Ekskuinte la kapon, li murmuris: “Ĉu vi iros al la urbeto Blanka Monto? Kial vi erare venis al nia urbeto?”

Post iom da pripenso ŝi koncize rakontis al li, kion ŝi spertis survoje. Ŝi interalie menciis tiun terurigan brakon kaj speciale emfazis, ke ŝi eble sin troviĝis en dumsongĝa halucino tiam.

La maljunulo, kun kuntiritaj brovoj, tenis sin senparola dum kelka tempo kaj poste diris subite kun certeco: “Tio ne estas halucino. El via eldiro mi jam eldivenis, kio okazis. Ĉu vi volas aŭskulti al mi, fraŭlino?”

Liaj vortoj surprizis ŝin. Ŝi haste diris, ke ŝi volas aŭskulti al li.

Lia vizaĝo malheliĝis. Li diris: “Se mi ne eraras, estas vera kadavro en la kamiono, kaj ĝi estas ina kadavro. Tamen la ŝoforo eble ne estas murdinto, kiel vi asertis. Mi supozas, ke li estas vendisto de kadavroj.”

“Vendisto de kadavroj?” ŝi surpriziĝis.

“Jes,” li diris, “li vendas kadavrojn. Tio rilatas al antikva moro de nia regiono. Vi eble nomas tion malbona kutimo — geedziĝo de mortintoj. Laŭ ĉi-tiea tradicio, kiam junulo mortis sen edziĝo, oni devas trovi inan kadavron kiel lian edzinon, por ke li povu morti trankvile kun femitaj okuloj kaj ne ĝenu siajn ankoraŭ vivantajn familianojn. Dum lastaj jaroj furoras la moro de mortintula nupto kaj inaj kadavroj estas multe bezonataj. Pro tio iuj serĉas inajn kadavrojn kaj disvendas ilin al tiuj familioj, kiuj volas aranĝi la geedziĝon de mortintoj. Tiu entrepreno donas profitojn, eĉ tre grandajn profitojn.”

Tiuj vortoj de la maljunulo hirtigis al ŝi la harojn. Ne retenante scivolemon, ŝi demandis: “Kiel tiuj kadavrovendistoj povus scii, kiuj familioj bezonas kadavrojn? Ili ne povas disvendi la kadavrojn de pordo al pordo, ĉu?”

La maljunulo eligis malestiman sonon: “Ili nur peras tian aferon. Ili estas makleristoj, kiuj konstruas ponton inter kadavro-vendantoj kaj kadavro-provizantoj. Kiam ili faras telefonadon, la provizantoj liveras kadavrojn al ilia pordo. Poste ili difinas la prezon laŭ la freŝeco kaj aĝo de la kadavroj. Se mi parolos orelpike...” Li mallarĝigis siajn okulojn kaj ridete diris kun malica tono: “Se la knabinoj, kia vi, tuj fariĝos kadavroj, oni povos tre facile vendi vin je la prezo de kelkaj dekmil juanoj.”

Dirante, li etendis sian manon en la poŝon.

La junulino tuj paliĝis, kaj retroirinte kelkajn paŝojn, ŝi sin turnis kaj kuris al la ŝtuparo. Post ŝi la maljunulo haha-is en stranga tono. Li elpoŝigis boteleton da alkoholaĵo, eltiris la korkon kaj faris suĉon el la boteleto.

Post kvin minutoj aŭdiĝis motorbruado alproksimiĝanta kaj fine la aŭto haltis antaŭ la pordo de la gastejo.

La maljunulo stariĝis kaj iris al la pordo. Tra la vitro de la pordo li vidis bluan komionon. Malfermiĝis la pordeto de la veturilo kaj refermiĝis brue. Malgrasa bruna junulo puŝmalfermis la pordon de la gastejo kaj eniris kiel ombro, kun profunde enkaviĝintaj okuloj kaj frida rigardo.

Tiutage mortis homo en la gastejo, kio ne estas grava afero en ĉi tiu urbeto. Kun sirenaj sonoj polica aŭto fulme rapidis ĉi tien de la gubernia urbo.

Kio okazis nokte, la junulino ne volis paroli pri tio dum sia tuta vivo.

Meznokte, kiam ŝi malfermis la okulojn, ŝi vidis paron da okuloj sang-kongestitaj.

Ŝi sentis sin strikte premsufokita ĉe la gorĝo, kvazaŭ ĉikaŭvolvita de serpento. Kun konscio iom post iom malklariĝanta, ŝi ŝajne estis falanta en mallumon...

Kiam ŝi vekigis, ŝi jam sin trovis en blanka hospitalo plena je varma sunradioj filtriĝantaj tra la fenestro.

Du policanoj faris notojn pri tio, kion ŝi priskribis la okazaĵon, kiun ŝi trafis.

La pli aĝa policano diris al ŝi: “Vi devas danki la ŝoforon de la kamiono, s-ro Li, kiu jam savis vin.

La policano daŭrigis: “La krimulo estas demono, kiu nur okupiĝas pri murdo de junaj knabinoj kaj vendas iliajn kadavrojn. Ĉiufoje, kiam li estis kaptita, li asertis, ke li estas kunlernanto de la viktimo. Estas li, kiu utiligis kunvojaĝadon, ĉiurimede trompis la kunvojaĝantinon iri al la celloko kaj serĉis ŝancon mortigi ŝin. Jam kvin knabinoj en flora aĝo pereis en lia mano. Vi estas la unua postvivanto, kiu eskapis el liaj monstraj ungegoj. Kiel feliĉe! La kaŭzo de la tragika okazaĵo atribuiĝas al via kredemo al fremduloj.”

La pli juna policano prenis la paroltemon: “La krimulo jam estas mortigita de s-ro Li en tiunokta luktado. Ne maltrankviliĝu, fraŭlino. Li ne plu povas vin

vundi.”

La junulino penis sidigi: “Kie estas tiu ŝoforo, s-ro Li? Ĉu mi povas intervidigi kun li?”

La policano embarasite klarigis sian gorĝon kaj eviteme diris: “Nun ne eblas, fraŭlino. S-ro Li ankoraŭ restas ... en arestejo. Li devas malliberigi por kelka tempo.”

Post dek du tagoj fraŭlino Mei renkontis s-ron Li ĉe la pordo de la arestejo. Li ankoraŭ tenis sin silentema kiel kutime, sed en ŝiaj okuloj lia rigardo ŝajnis multe pli mola ol antaŭe.

Ŝi invitis lin al manĝado, dum kiu ŝi demandis al li: “Kiel vi travidis, ke tiu aĉulo volas min mortigi?”

Kun rideto s-ro Li respondis: “Li forlasis sian sakon sur mian veturilon. Kiam mi atingis la proksiman urbeton, mi malfermis ĝin kaj trovis dek kelkajn tranĉilojn de malsama grandeco, ferŝtalan fadenon kaj venenon, kiujn li povis uzi por mortigi. Mi urĝeme stiris la veturilon returnen. Mi sciis, ke troviĝas nura gastejo en la urbeto, kie vi sendube tranoktis. Feliĉe mi sukcesis trovi ĝin, kie vi vere loĝis. Mi gvertis lin duonokton. Kiam li eniris en vian ĉambrom, mi kaŝis min post la pordo de via ĉambro, kun tenajlo en la mano. Vidinte, ke li vin strangolas, mi min ĵetis kaj frapis lin per la tenajlo. Mi neniel imagis, ke li estas tiel malforta kaj mortos sub tia frapo.”

Demandite pri tiunokta teruriga travivaĵo, s-ro Li konfesis, ke li vere transportis unu kadavron per sia kamiono kaj tio estas kial li estis arestita. Sed li emfazis, ke li ne estas tiu, kiu helpas aliajn aranĝi la geedziĝon de mortintoj pere de vendado de kadavroj. Li klarigis: “Mi nur helpas rehejmeniri tiujn, kiuj mortis en fremda loko, kaj preterpase mi gajnis iom da mono por min vivteni. Mi ne scias, ke mi faris tion kontraŭ la leĝo ĝis mi estis retenita en la arestejo. De nun mi ne plu faros tion kaj komencas laŭleĝan laboron.”

Ĉe disiĝo li admonis al ŝi: “Vi studentoj estas tre simplanimaj. Mi esperas, ke vi ne montru vin tiel kredema je malbonuloj.”

La fraŭlino ridetante diris: “Kompreneble mi devas domaĝi mian humilan vivon sendube.”

Sub alta kamforarbo ili adiaŭis unu al la alia. La fraŭlino okule sekvis la bluan kamionon malproksimiĝantan sur la nigra asfalta vojo, envolvitan en arĝentgriza fumnebullo.

Chiung Yao (1938-)



En Profunda Korto (2)

Elĉinigiŝ Vejdo (Ĉinio)

aŭtorino Chiung Yao

Chiung Yao (ĉjong jaŭ), ĉina moderna fekunda verkistino de romanoj. Ŝi nun vivas en Tajvano. «En profunda korto» estas unu el ŝiaj elstaraj romanoj. BE aperigas la tutan romanon popece en venontaj numeroj.

2

Post dekorado kaj ordigo, la malgranda ĉambro unupersona asignita al Fang Siying fariĝis klara, freŝa kaj plezurige bonorda. Super la fenestro pendis nova helverda kurteno kun striita desegno, sur la lito sterniĝis kremkolora kaj kafkolora littuko, sur la malgranda kana te-tableto kovriĝis ajura kroĉetita tablotuko, sur du kanseĝoj metiĝis po unu kuseno el nigra sateno, sur la skribotableto staris lampo kun kremkolora kovrilo, en la verde glazurita florbazo enmetiĝis kelkaj junverdaj bambuetoj, kiujn ŝi ĵus plukis el la malantaŭa montdeklivo, kaj sur la malgranda toalettablo disŝutiĝis kelkaj simplaj pecoj de kosmetikaĵoj.

Kun ĉio pretigita, ŝi falsidiĝis en la seĝon antaŭ la skribtablo. Ĉirkaŭrigardinte, ŝi naskis nebulan kaj nekredeblan senton. Nu, antaŭ kelkaj monatoj, ŝi ankoraŭ havis alsalajritan laboron kaj luksan apartementon fore fremdlande, dum nun ŝi restas, kiel instruistino, en la elementa lernejo en la ĉirkaŭurbo de Tajvan. Tute nekredeble! Ŝi ankoraŭ rememoris, kion diris al ŝi s-ro Zhang el la Eduka Ministro, kiu prezentis ŝin al ĉi tiu elementlernejo:

“Fraŭlino Fang, mi ne havas sufiĉe da informoj pri vi. Laŭ via kvalifiko en edukado, estas facile por la Eduka Ministro enkonduki vin al ajna universitato kiel docenton. Kial vi insiste elektas ĉi tiun Zhengxin Publikan Elementlernejon? Kiel instruistoj de elementlernejo oni havas nealtan salajron kaj malfacilan taskon, kaj plie devas koni la ĉinan fonetikan signaron.”

“Mi konas la ĉinan fonetikan signaron. Estu libera de zorgoj, s-ro Zhang. Mi pruvos min taŭga por la tasko,” estis ŝia tiama respondo. “Mi ne volas fariĝi docento. Infanoj plaĉas al mi, dum studentoj en universitato iom timigos min!”

“Tamen, kial vi insistas pri Zhengxin? Kio pri aliaj elementlernejoj?”

“Oh, ne. Mi nur celas al Zhengxin, ĉar mi ŝatas la medion tie.”

Nun ŝi jam restis en la amasloĝejo por instruistoj de Zhengxin Elementlernejo. Apogante sin al la fenestro, ŝi povis vidi verdajn montojn en malproksimo, montdeklivon ekster la lernejo, dense plantitaj te-arbedoj sur la deklivo kaj tiujn sporade kreskantajn bambuarojn. Jes, ĉi tiea pejzaĝo estis pitoreska kiel pentraĵo, sed ĉu tio, kio rezolute restigis ŝin ĉi tien kiel instruistinon, estis nur la ĉi tiea medio? Aŭ ia kaŭzo nekomprenebla? Ŝi ankoraŭ rememoris pri la miro kaj surprizo montritaj de lernejestro Liu, ĉirkaŭ-40-jara, diketa, kaj bonhumora virino. “Aĥ, fraŭlino Fang, estas tro humilige por vi instrui ĉi tie!”

“Ne, tiun laboron mi deziris jam delonge,” ŝi diris, sciiĝinte, ke ŝia diplomo de magistro akirita eksterlande surprizigis la lernejestrinon.

“Do, ĉu vi volontus labori kiel instruisto de la sesa klaso?”

“La sesa klaso? Mi timas, ke mi ne povas kompetenti en instruado de lernantoj, kiuj baldaŭ ricevos diplomojn. Se eble, kio pri la kvina klaso? Pli bone instrui malĉefan lernobjekton.” La kvinan klason tiu knabino devos eniri post somera ferio.

Tiel ŝi asigniĝis instrui al la kvina klaso matematikon.

Du tagojn proksiman al la komenco de la semestro, ŝi havis tempon ĉirkaŭiri por pririgardi kaj konatiĝi kun aliaj instruistoj. Antaŭ la toilettablo, ŝi kontenteme mezuris sin: haroj ligitaj malstrikte sur la verto, delikate pudrita vizaĝo, paro da miopaj okulvitroj, kaj kompleto da simpla malhelblua vestaĵo. Jam ŝi ekhavis la aspekton de instruistino.



Kun mansako, ŝi eliris el la amasloĝejo por promeni ekster la lernejo. Ĉe vesperkrepusko, la ebenaĵo de kamparo sub la subiranta suno ravigis konfuze. Elirinte la pordon, ŝi antaŭeniris laŭ la vojo, ambaŭflankita de malaltaj te-arbedoj nete plantitaj en la kamparo. Rigardante te-arbedojn, ŝi imagis al si la te-kolektadan sezonon: ĉie troviĝas te-kolektantinoj kun bambučapelo sur kapo ligita per kaptuko kaj kun volvitaj manoj kaj piedoj per tolo, kiuj klinas la talion kun korbo en mano, kio vere prezentas vivecan scenon.

Post nelonga irado, ŝi vidis la loĝejon de familio Bai. En la rebrilo de la subiranta suno aspektis tre bele la domo, ekster kies ĉirkaŭmuro sieĝis te-arbedoj. Ŝi haltis momenton. Ĝuste tiam la ruĝa pordo malfermiĝis, kaj elkuris elane aŭtomobilo Chevrolet fabrikita en 1964 en la direkto al Tajbei, levante nubon da polvo. Aŭtomobilo Chevrolet fabrikita en 1964! Nun estas 1965. Kiel prodigeme la mastro aspektas! Ŝi pensis. En Usono, la studentoj el alilandoj kutimiĝas interesiĝi pri aŭtomobiloj, kiam ili estas liberaj, kaj tiun kutimon ŝi jam formis. Tial ŝi povis, je la unua vido de preskaŭ ĉiuspecaj aŭtomobiloj, nomi ties markon kaj fabriĵaron.

Preterpasinte la domon de familio Bai, ŝi baldaŭ vidis Hanyan Bienon, kies ruino post bruligo forte allogis ŝin. Post momenta hezito, ŝi eniris en la feran pordon. La rozfloroj ankoraŭ restis en pompa disflorado tie. Deŝirinte du branĉojn kun floroj, ŝi staris tie kaj fikse rigardis al la ruino por kelka tempo. Poste, sin turninte, ŝi eliris. Ĉe la horizonto la subiranta suno flamis bele. Ŝi faris profundan enspiron. Sufiĉe! Ŝi sentis sin plena je varmo kaj forto. “Mi neniam pentos pri mia elekto!” ŝi parolis al si.

Reveninte en sian ĉambron, ŝi enmetis la du rozojn en la florvazon sur la skribtablo. La skarlato de rozoj kaj junverdo de bambufolioj kontrastantaj reciproke bele ravigis per fantazio. La tutan vesperon, ŝi alvizaĝis la vazon distrite. Sub la malalte pendanta noktvalo alŝvebis kvakado de ranoj kaj ĉirpado de insektoj de tempo al tempo. Ŝi aŭskultis, kaj post iome ŝi eligis basan kaj softan suspiron. Eltirinte la tirkeston de la skribtablo, ŝi elprenis staketon da leterpapero kaj komencis skribi angle leteron, kiu legiĝis jene:

Kara Yali,

Mi sentas grandan bedaŭron, ĉar mi jam decidis restigi min en Tajvan kaj ne reiri al Usono. Mi esperas, ke vi ne koleriĝu kontraŭ mi. Mi benas, ke vi trovu virinon pli bonan ol mi. Mi ne povas klarigi kial. Nur... nur okaza epizodo. Tiun postagmezoon de majo, mi, puŝite de kaprica impulso, iris al la antaŭurbo kaj fariĝis sorĉita de amaso de ruino kaj knabino...

Ŝi ne finis la leteron. Demetinte la plumon, ŝi faris longan deprimitan suspiron. Tio ne povas esti bone klarigita, nek Yali povas kompreni tion por eterne, ĉar ŝi ne povas komprenigi lin. Li eĉ prenos ŝin kiel frenezulon. Nun, ŝi gapis la du rozojn en stuporo. Nur la ĉielo scias, kial ŝi decidis resti ĉi tien. Viro malproksime en alilando volas edziniĝi ŝin. Jam estas la tempo edziniĝi por ŝi, kiu jam atingis la aĝon de tri dek jaroj. Nur la ĉielo scias! Ŝi eble vere freneziga!

La trian tagon post la komenco de la semestro, ŝi staris en la klasĉambro. Klarigante la lecionon, ŝi fiksas sian rigardon al la knabino sidanta meze de la unua vico. Tiam ŝi eksplikis la rakonton pri koko kaj kuniklo en la sama kaĝo, sed la knabino ne direktis sian rigardon al la nigra tabulo. Apogante sian mentonon per siaj manetoj, ŝi rigardis erarvage al fenestro. Sur ŝia pala vizaĝeto ludis esprimo de atentemo, kio ankaŭ altiris la rigardon de la instruistino al la fenestro. Malantaŭ la fenestro troviĝis lerneja tereno kun dikega banjanarbo sur la fono de flosantaj blankaj nuboj en malproksima ĉielo. Haltinte en klarigado pri leciono, Fang ekkriis subvoĉe, “Bai Tingting!” La knabino tamen tute ne aŭdis kaj ankoraŭ absorbiĝis en rigardado al la fenestro. Nereteneble eliginte tuseton, la instruistino iome levis sian voĉon, “Bai Tingting!” La knabino ankoraŭ ne aŭdis ŝian voĉon. La paro da ŝiaj nigraj okuloj aspektas malhele profundaj, kiuj tute ŝajnas ne aparteni al knabino, kaj ŝia atentema mieno des malpli ŝajnas tiu de knabino. Kio akaparas la animon de la knabino? Fang kunŝovis siajn brovojn kaj plialtigis san voĉon, “Bai Tingting!” Ĉifoje la knabino aŭdis. Pro surprizo ŝi saltetis kaj sin starigis. Per paro da okuloj plenaj je paniko, ŝi senpalpebrume rigardis al Fang. Ŝiaj lipoj tremetis kaj ŝiaj mincaj fingroj nerveze kaptis la lernoibron sur la pupitro. Ŝi duonvoĉe elbuŝiĝis, “Oh, instruisto?” Ŝia tono timida kaj almozpetata tute konkeris Fang-on. Nevole malstreĉinte la kuntiriĝintajn brovojn, Fang aliris al ŝia pupitro. La knabino, levinte la vizaĝon, alrigardis al ŝi, kun mieno de pasiva atendo de riproĉo.

“Vi ne aŭskultis al mi,” la voĉo de Fang neatendite mildis. “Kion vi pririgardis?” Bai Tingting malsekiĝis siajn lipojn per langpinto. La milda tono kaj bonkoraj okuloj de Fang kuraĝigis ŝin. “Birda nesto troviĝas sur la arbo,” ŝi diris mallaŭte. “Birdino senĉese enflugas kun manĝaĵo en buŝo. Mi pririgardis, ĉu birdido enas?”

Fang turnis sian kapon. Vere, inter densaj branĉoj kaj folioj, birda nesto firme sidis sur la forko de branĉo. Returninte sian kapon, ŝi pafis atenteman rigardon al Bai Tingting. Ŝi havis nenian kaŭzon por riproĉi la knabinon. “Do, sidiĝu. Atente aŭskultu, alie, kiel vi povas ekhavi komprenon?” Post paŭzeto, ŝi aldonis, “Post lerneja tasko, venu al ripozĉambro por instruistoj. Mi volas interparoli kun vi.”

“Oh? Instruisto?” Sur la vizaĝo de la knabino denove alnaĝis esprimo de paniko.

“Ne timu,” ŝi premetis ŝiajn ŝultrojn per siaj manoj. Kiel maldika kaj malgranda la paro da ĉi tiuj ŝultroj estas! “Nenio speciala, nur babilado. Sidiĝu! Revenu al nia lernolibro. Ne zorgu pri tiuj birdidoj.”

Je la kvina posttagmeze. Post la ceremonio de flagmalhisado. Sidante en la ripozejo por instruistoj, Fang vidis Bai Tingting-on eniri malrapide. Sur ŝia tablo kuŝis mallferme la ekzerckajero de Bai Tingting. Ŝi neniam vidis tiel fuŝfaritajn ekzercojn: ĉiuj 14 ekzercoj de aritmetiko estis eraraj, eĉ absurde eraraj. Ŝi eĉ mire scivolis, kiel ŝi eltrenis sin tra la lernado de la kvara klaso. Nun, la knabino staris timide antaŭ ŝi. Ŝiaj du mincaj brakoj elmontriĝis el sub la manikoj de blanka ĉemizo, tiom mincaj, ke ili kvazaŭ rompiĝus je tuŝeto. En la koro de Fang nereteneble ŝveliĝis forta kaj nedirebla kompato kaj tremo. Kia estas ĉi tiu knabino? Kian vivon ŝi vivas? Ĉu ŝia familiestro eĉ ne atentis pri ŝia malforta korpo?

“Instruisto,” la knabino leĝere vokis, kun la kapo malalte klinita.

“Venu, Bai Tingting.” Fang altiris Bai Tingting-on al si kaj okulmezuris ŝian malfortan kaj belan vizaĝeton. “Ĉu vi tute komprenas, kion mi klarigis pri la leciono?”

“Oh, instruisto,” vokante, la knabino des pli malalte klinis sian kapon.

“Ne kompreni?” Fang provis mildigi sian voĉon. “Se vi ne komprenas, vi devas demandi al mi. Ĉu vi scias? Viaj ekzercoj estas tre malbone faritaj!”

La knabino suspiris mallaŭte.

“Kiel? Ĉu vi havas demandojn? Diru al mi,” ŝi demandis pacience.

“Mi nur ne komprenas,” diris la knabino suspire, “kial kokoj kaj kunikloj estas fermitaj en la sama kaĝo. Kiel ĝena afero! Kaj plie, la kapoj de kokoj kaj tiuj de kunikloj tute malsamas, kial oni devas kalkuli kiom da kapoj kaj kiom da piedoj ili havas adicie! En mia hejmo ankaŭ Maljuna You bredas kokojn kaj kuniklojn. Mi ne estas tiel ĝenata kalkuli iliajn kapojn kaj piedojn,” ŝi elspiris alian suspiron.

“Ah!” Fang stuporiĝis, ne sciante, kiel respondi antaŭ tiu naiva vizaĝo. “Tio estas nur metodo, metodo de kalkulado. Ĉu vi komprenas?” ŝi klarigis mallerte. La knabino fiksas sian paron da naivaj okuloj sur ŝin kaj ekskuis sian kapon.

“Ĉu tio instruas al ni, kiel malsimpligi la problemon?” demandis la knabino.

“Ha! Matematiko funkcias tiel. Ĝi provas vian cerbon per multaj metodoj kaj trejnas vian kalkulpovon. Kaj vi devas akcepti tian trejnadon. Kiam vi plenkreskiĝos estonte, vi renkontos multe da problemoj kaj solvos ili per tio, kion vi nun lernas. Ĉu vi scias?”

“Mi scias,” Bai Tingting mallevis siajn palpebrojn, kun plia suspiro. “Mi estas stulta, mi pensas.”

“Ne, ne pensu tiel,” Fang tuj intermetis, prenante la du manetojn de la knabino en la siajn. Ŝia rigardo senkompare tenera restis sur ŝia vizaĝo. “Mi pensas, ke vi

estas tre saĝa kaj aminda infano."

Du floroj da ruĝo alflugis al la vangoj de la knabino. Rapide levante siajn okulharojn, ŝi pafis sian rigardon al Fang, la rigardon kun hontemo, konsolo kaj ĝojo. Sur ŝia buŝangulo fulmis delikata rideto, kiu reliefigis sian amindan mienon.

"Diru al mi, kiuj konsistigas vian familion," Fang nereteneble demandis, kun io dubinda pri la maldikeco kaj malforteco de la infano.

"Paĉjo, panjo, Yazhu kaj Maljuna You," senpripense respondis Bai Tingting kaj tuj klarigis, "Yazhu estas servistino, kaj Maljuna You, ŝoforo kaj ĝardenisto." "Ho," post momenta stuporo, Fang zorgeme okulmezuris Bai Tingting-on. "Sed..." ŝi demandis mallaŭte, "ĉu via panjo ŝatas vin?"

La knabino, ekekscitite pro surpriziĝo, tuj levis siajn okulharojn kaj rekte rigardis al Fang per siaj agresaj nigraj okuloj. "Kompreneble ŝi ŝatas min!" ŝi preskaŭ elkriis. Ŝiaj vangoj ruĝiĝis pro ekscitiĝo. Forte anhelante, ŝi aspektis multe ofendite kaj malamikece. "Ili ĉiuj ŝatas min, paĉjo kaj panjo!" Mallevinte siajn okulharojn, ŝi forte ekmortetis sian malsupran lipon per siaj malgrandaj blankaj dentoj. Ŝi denove levis sian kapon. En ŝiaj okuloj jam vanuis la malamikeco, anstataŭ kiu naĝis preskaŭ petemo. "Instruistino Fang," ŝi mallaŭte diris, "Ne aŭskultu al alies kalumnio, ne aŭskultu! Estas vere, ke miaj gepatroj montras amemon al mi! Mi vere ne trompas vin!" Sur ŝia eta vizaĝo estiĝis tiel serioza esprimo, ke fulmis doloro tra la koro de Fang Siying. Kiel kompreni "ne aŭskultu al alies kalumnio"? Okule ekzamenante la knabinon, ŝi rememoris pri la maja posttagmezo, la blinda patro, kaj ĉi tiu knabino...

Ŝi faris enspiron. "Nu, Bai Tingting, neniŭ dubas, ke viaj gepatroj amas vin!" Ŝi palpis ŝiajn harojn kaj trovis unu harligon malstreĉiĝi. Ŝi turnigis la infanon dorse al si kaj streĉis ŝian harligon. Post tio, ŝi returnigis ŝian vizaĝon al si. "Faru demandon al viaj gepatroj, ĉu bone?"

"Bone."

"Demandu al viaj gepatroj, ĉu ili volontus restigi vin plian horon en la lernejo, tiel ke mi povos ripari vian lernadon de aritmetiko. Post lernejo, vi venos al mia ĉambro kaj mi riparos vian lernadon de la bazaj scioj, alie vi postrestigis en la klaso. Ĉu vi scias?"

"Bone, instruistino."

"Do, foriru."

"Ĝis revido, instruistino." La knabino pafis ekrigardon al ŝi, en kies okuloj brilis io speciala, milda, infaneca kaj inklinema, kio premegis ŝian koron. Ŝi sciis, ke la knabino ŝatas ŝin, kaj ŝi des pli sciis, ke ŝi vivis en soleco, ĉar iom da amo kaj zorgo alportis al ŝi grandan ĝojon. Vidinte ŝin jam retiriginta ĉe la pordo de la ripozejo, ŝi nereteneble ŝin voke haltigis, "Kaj pliajn vortojn, Bai Tingting!"

“Instruistino?” Haltinte, la knabino returnis sian kapon kaj rigardis al ŝi.

“Ĉu vi havas junajn gefratojn?”

“Ne.”

“Ĉu vi estas la solfilino?”

“Jes.”

“Ĉu vi havas geavojn?”

“Mia avino mortis antaŭ tri jaroj. Kaj mia avo mortis delonge, mi neniam vidis lin.”

“Oh,” Fang enpense fiksrigardis al ŝi. “Nu, mi ne havas pliajn demandojn. Foriru.” Bai Tingting foriris. Sidante peze en seĝo, Fang ankoraŭ absorbiĝis en rigardado al la pordo, kie la knabino vanuis. Nevole ŝi mordetis la gumkapon de kraĵono per siaj dentoj kaj formordis pecon de la gumo. Ŝia enpenŝigo rompiĝis je alveno de instruistino.

“Mi vidis, ke vi faris demandojn al Bai Tingting. Ĉu ŝi miskondutis?” demandis la instruistino kun rideto.

“Oh,” Fang levis sian kapon. Antaŭ ŝi staris Li Yusheng, juna bonhumora instruistino, kiu gvidis la kurson de la ĉina lingvo al la kvina klaso. Jam ŝi instruis tri jarojn en ĉi tiu lernejo. Krom instruado de la ĉina lingvo, ŝi funkciis kiel ĉefinstruistino en la klaso, en kiu Bai Tingting lernis. “Nenio,” Fang diris, “ĉar ŝi ne akiris bonajn notojn en aritmetiko, mi kuraĝige alparolis al ŝi. Ŝi estas speciala infano!”

“Jes, tre speciala tipo!” diris Li. Altirinte seĝon, ŝi sidiĝis kontraŭ Fang. “Se vi legas eseojn skribitajn de ŝi, vi neniel kredas, ke tiuj eseoj produktiĝas el la mano de 11-jarulino?”

“Kiel? Bone skribitaj?”

“Bonege! Ŝia riĉa imagpovo vin mirigas!” Li skuis sian kapon kaj suspire diris, “Tia infano kun inteligenteco en unu flanko plej ĝenas. Dumtempe ŝi estas la infano kun problemo en ĉi tiu lernejo. Ĉiujare ni diskutas pri ŝia avancado al pli alta klaso, ĉar ŝi ĉiam estas malforta en aritmetiko, sed mirage forta en lernobjekto de la ĉina lingvo! Tamen, ne trompiĝu de la knabino. Ŝi ja estas inteligenta diableto!”

“Trompiĝi de ŝi?” Fang nekomprene demandis, “Kion vi volas diri? Ĉu ŝi mensogas?”

“Mensogi?!” Instruistino Li faris troigan rideton. “Ŝi estas la unuaklasa lertulo en mensogado! Vi eksciis pri tio pli poste.”

“Kiel?” Fang nekomprene kunŝovis siajn brovojn.

Li Yusheng alproksimiĝis al ŝi. “Vi estas novevenanto. Vi certe ne scias pri la historieto de ŝia familio,” diris Li kun mistera mieno. Ekde estiĝo de la homaro,

inoj havas la kapablon dissemi rakontojn.

“Rakontoj?” Fang plue kunŝovis siajn brovojn. “Kiaj rakontoj?” Ŝi firme fiksrigardis al Li Yusheng. Antaŭ ŝiaj okuloj riveligis la figuro de la blindulo.

“La patro de Bai Tingting estas Bai Peiwen, ĉu vi scias pri tio?”

Fang ekskuis la kapon.

“Ve, vi vere scias nenion!” diris Li. “La riĉeco kaj influo estas konataj de ĉiuj. Ĉu vi vidas la ĝardenojn de te-arbedoj ekster la lernejo? Ili ĉiuj apartenas al familio Bai! Krome, en Taibei, li havas enorman fabrikon de te-prilaborado. Ĉi-tieaj lokanoj diras, ke neniu povas taksi lian riĉecon. Li estas tiom riĉa, ke li bruligis sian domegon sendomaĝe.”

“Kio?” Fang Siying surpriziĝis. “Kion vi diris? Bruligi? Kiu bruligis?”

“Ĉu vi rimarkis la bruligitan domegon, kiu nomiĝas Hanyan Bieno?”

“Jes.”

“La domego apartenis al familio Bai. Oni diras, ke Bai Peiwen mem bruligis la domon!”

“Bai Peiwen mem?” Kuntiriĝis la brovoj de Fang. “Kial?”

“Unuj diras, ke la domo estis hantata, kaj aliaj diras, ke, ĉar la domo rememorigas lin pri lia mortinta edzino, li simple bruligis ĝin. Tamen, post bruligo, li pentas. Tial li ofte vizitas la bruligitan ruinon por priserĉi la spiriton de sia edzino.”

“Lia edzino?” Fang pligrandigis siajn okulojn. “Ĉu vi diris, ke lia edzino jam mortis?”

“Jam mortis lia unua edzino, kiu ankaŭ estas la propra patrino de Bai Tingting. Nun li havas la duan edzinon.”

“Oh.” Fang englutis salivon. Ŝia rigardo fiksiĝis distrite sur la ekzerckajeron de Bai Tingting sur la tablo.

“Oni diras, ke Bai Tingting ne estas la sanga filino de Bai Peiwen,” daŭrigis Li, kvazaŭ ŝi intence rivelus la rakonton poiome, por ke la aŭskultantino surpriziĝu plu kaj plu.

“Kio?” Vere, Fang rapide levis la kapon kun vaste malfermitaj okuloj je miro. “Kion vi diris?”

“Laŭdire, okazis, ke lia unua edzineteto estis bela kaj timida, sed ŝi ne havis bonan devenon. Ŝi estis laboristino en lia fabriko en Taibei, kaj li enamiĝis kun ŝi manie. Malgraŭ la oponado de sia familio, li edzinigis ŝin. Post du jaroj de ilia geedziĝo Bai Tingting naskiĝis. Kaj tiam okazis neatenditaĵo. Oni diras, ke li trovis la amaferon inter lia edzino kaj prizorganto de te-arbedoj. Kun granda kolero, li forpelis sian edzinon el la hejmo, kiu memmortige sin ĵetis en la riveron. Ankaŭ la prizorganton li forpelis. Pro tio, oni diras, ke Bai Tingting estas la filino de la

prizorganto anstataŭ li.”

“Ho!” Fang malfacile eldiris, “sed...” ŝi ekpensis pri la simileco inter Bai Tingting kaj ŝia patro.

“Ĝuste pro tio,” ne atentante pri la konfuzitecon de Fang, Li daŭrigis laŭvole, “Bai Tingting neniam ĝuas denaske la ŝaton de sia patro. Post kiam ŝi ekhavis duonpatrinon, ŝia vivo des pli malboniĝis. Kaj krome, ŝia patro blindiĝis...”

“Ĉu li estas blinda multajn jarojn?”

“Ne malpli ol ses aŭ sep jaroj.”

“Kiel li blindiĝis?”

“Mi ne scias klare,” La instruistino ekskuis sian kapon. “Mi aŭdis, ke li vundiĝis en fajrego. Ĉiaokaze, en tia legendeca familio, ajna rakonto povas naskiĝi. Kiu scias, kiel li blindiĝis?”

“La duonpatrino ne ŝatas Bai Tingting-on?”

Li Yusheng faris implicitan rideton. “Certe Bai Tingting diris al vi, ke ŝia patrino tre amas ŝin, ĉu ne?” ŝi demandis. “Mi ne parolos plu. Se vi interesiĝas pri la knabino, vi povos elfosi multajn rakontojn de ŝi. Vi estas studento pri edukado kaj infana psiko. Tiu ĉi knabino estas la plej bona studobjekto. Sengene kontaktu ŝin ofte, kaj poste, mi kredas,” ridetante, ŝi rigardis al Fang. Ĉiuj en la lernejo sciis, ke tiu instruas ĉi tie nur pro interesiĝo pri la knabino, sed ne por perlaborado kiel aliaj instruistoj. “Ŝi donos al vi miregon! Provu!”

Leviĝinte, Li ĵetis ekrigardon eksteren de la fenestro. La suno jam subiris, kaj la vesperkrepusko ensvarmis de ekstere. En la ripozĉambro, aliaj instruistoj jam foriris.

“Ho,” ŝi surprizite diris, “nia babilado daŭris ĝis malfrua horo. Mi devas foriri.” Ŝi, kiu loĝis en Taibei, hasteme ekprenis mansakon kaj diris adiaŭ.

“Ĝis revido!” Fang okule akompanis ŝin ĝis ŝia malapero. Kaj ŝi, ankoraŭ sidante en la seĝo, rigardis tra la fenestro la nebulan krepuskon silente, absorbite kaj longatempe.

(daŭrigota)

Gerrit Berveling (Nederlando)



Kelkaj poemoj

poeto Gerrit Berveling (Nederlando)

Mi

mi estas la vivo
mi ne nur vivas
ne nur ekzistas
mi vin helpas ekzisti
mi 'stas la viv'
en vi
por vi

mi estas la vento
mi flugas tra l' viv'
neniu min kaptas
haltigas
difinas
mi flugas libere, senbride
difinoj ne estas stabilaj
ĉion mi ŝanĝas
ĉion adaptas

La libero

(pri statuo iom antaŭ Kiskorpád, Hungario)

ambaŭflanke la kampar'
je gren' inundas,
leĝerkurbe sub ventet',
en vojkurbiĝo.

jen subite la Liber'
persone fulmas:
eta placo kun

ĉi monumento
por falinta militist':
inter du kanonoj li
bravuris supren

triop' infana
grimpis sur la statuo
kaj ĝoje ludis,
kriis, ludis, brilis
en la vera libero
ne venkinte soldate

Revido

Vin mi trafis en hazarda tramo
ŝajne post laciga butikum':
ĉirkaŭ l' seĝo staris sakoĵ dum
bruste Fifi petis vin pri amo.
Ho maljustas mondo: eĉ de damo
dignoplena, ja en hela lum'
amopeti darfas hundo kun
lekokisoj sur vizaĝ' – sen dramo!
Tamen mi, estante (kiel oni
asertadas) homo, digna ja

laŭ Deklar' Universala de

Homaj Rajtoj, devis deci ĉe
nia renkontiĝ' – la vundo aj! –.
Do mi vin ŝajnis ne rekonu.

Ne intencita gravedeco

Ne scias mi kial mi tristas
se pensi pri homa ĉi ras':
knabin' senaverte rimarkas
ke kreskas estaĵ' en uter',
kaj baldaŭ matene ekkraĉas
ŝlimajon, memore pri sperm';
sed ventre se kreskas ideto,
dum panjo ne estas edzin',
jen granda problemo', kiel solvi
pri tiu Venera malsan'?

La homa strangeo

Birdo neniam plendas
pri sia beko nek plumokoloro,
ecx se apenau cxerpi
akvon gxi povas aux flugi:
gxi ja simple rigardas
l' eksteron nur donitajxo
plene hazarda. Gxi
neniam rasajn konfliktojn
povus kompreni de homoj,
ja tiom inter si samaj,
pleje kun hauxtdiferenc' aux
la nombr' neegala da haroj

Post lego de « Printempo en la aŭtuno » de Baghy al Eli Urbanov á

Legis mi foje versaĵon,
verkis ĝin iu virin’;
pensis mi: jen perdis saĝon
tiu, ne perdu ĝin mi!

Kiam en la profesorojn
ŝtelis sin gaja printemp’,
okulangule el koro
ŝtelis sin gut’ eĉ ĉe mi.

Baghy, vi tamen sorĉistas:
tute ne logas ĉi stil’,
verke vi tiom insistas:
larmojn decidis ne mi!

Krozmisiloj al Nederlando?



Usono nin devigas ke ni cedu:
ke nepre NATO fortiku kontraŭ bato
de malamika flanko, – ni procedu
laŭ ĉi ordono: ne ŝirmu nin kanono,
nek hekatombo, eĉ holokaŭsta bombo

ne plu sufiĉas: la Prezident' feliĉas
nur se la NATO fortikas kontraŭ fato
el fremda planedar': – ni ne plu tedu ...

Ne plu infana Raso vokas: ne!
Plenserioza ĉi amaso vokas: ne!
Ja eĉ la ŝtata kaso vokas: ne!
Do kvazaŭ en orgasmo: ne!
Kaj kun entuziasmo: ne!
En time-kria spasma: ne!

El voĉ' de demokrato:
Kaj artikole en MONATO:
Parolbatale ja en la Senato:
NE!
NUR NE!

Usono nin devigas ke ni cedu:
la Registaro sen ajna kontraŭstaro
permesu, ke Usono nin ekspedu
per ega knalo re al Neandertalo:
ja nur obei, ĉar ili scias bei
post la Ŝafisto, la Granda Mondstiristo:
la Prezidento, kun sia Brava Gento,
nin savis de Hitler': – do nun ne tedu ...

Kaj tamen la protesto diras: ne!
Per petici' kaj manifesto diras: ne!
Sur parolkesto sen modesto diras: ne!
Surbaze de teismo: ne!
Pro sia ateismo: ne!

El vibra voĉ' de maljunulo:
Per hela tril' de junulin':
Taĉmento eĉ da militistoj:
Grupiĝo jen de ŝovinistoj:
Kaj tie altruistoj:
Ho ĉie kia-istoj:

NE!
NUR NE!
NURNURE NE!

Usono nin devigis ke ni cedu :
ja nepre NATO fortiku kontraŭ bato
de neverŝajna flank'
– do ni ne tedu!

Kelkaj tankaĵoj el Japanujo

Multas la nuboj
ĉirkaŭ la Fuĵi-monto:
suprenirante
tamen ni daŭre vidas
glore la brilan pinton.



Araneaĵojn
faradas l' araneoj.
Same ni homoj
– kiom ajn diferencaj –
konstruas religiojn.

Japanvestaĵe
elefant-elegante

ni ĉe Oomoto
sen ritmo laŭ manklakoj
baraktas pri dancpaŝoj.

Ĉe danc' Miroku
festante la estonton,
ĉar kuloj pikas,
mi bestojn ne indulgas,
sarkasme nur buĉadas.

Agrabla festo
en loza atmosfero:
interamikiĝ'
eĉ sen lingva kompreno
kun ĉarmaj Japanidoj.

aŭg 2007

Gasto ĉe E-Nurnbergo

Ja iom dolĉis
al mi la saŭkraŭt' sur la
stana telero.

Inter grupeto
samideana jen beb':
estontpromeso.

Komencantino,
sed tre entuziasma,
kontraŭ veteran'.

Kaj kia mi mem?
Malgraŭ foja desapont'
torĉon pluporti!

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Meditaĵoj de neĵuna viro

poeto Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)

1.

Pligrandiĝas la pezo
de l'horora jarkvanto,
kaj la dorson kurbigas
tiu sako da tempo.
Plialtiĝas la prezo
de frivolo kaj vanto,
kiu foje min ligas
kun junula kantem', po
kelkaj spiroj luata
de l' destin' kontraŭ horo –
estas ĝi miapada
sed jarkvanta hororo.
Tamen rev' provizore
dampas pezon de l'aĝo,
kaj degelas la prema
senevita rutino,
kaj anim' rememore
trovas paĝon post paĝo
de la juno ekstrema...
Kaj plu foras la fino.

2.

En la kuranta vivo
pro l' sorto stranga,
nin disen direktinta,
al foraj lokoj,
plu daŭras nia drivo
en ege granda
distanco, reduktinta
laŭton de l'vokoj.
Sed diru dankon, kara,
mi al fortun',
ĉar lerte ŝi aranĝis
reaŭdon nian.
Mi diru dankon, kara,
kaj metu nun
la versojn sur ekran' ĝis
mi kaptos plian
eblecon havi novan -
eĉ nur por horo
feliĉan rekunvenon,
teneran kison,
kun hastiĝanta mov' en
la brust' – de l'koro
por faciligi l'penon
travivi dison.

3.

Facilas vivi,
se premas nokte
neniu honto,
neniu pento,
se oni pri vi
diskutas dokte,
se laŭdas mondo
vin en konsento.
Facilas vivi,
se viaj pekoj
pardonon tujan
de l'mond' ricevas,

se povas drivi
vi for de blekoj,
ke via land' en
kolapso krevas.
Tro pezas viv', se
eĉ fremdaj pekoj
animon vian
skrupule lezas,
se daŭras vice
post peno pen', kaj
ŝanĝas nenion –
la viv' tro pezas!
Sed elektinte
toleri l' pezon,
la voĉon levi
por la opono,
vi savas vin de
fal' en frenezon,
ĉar certas ke vi
servas al bono.

4.

En la societ'
paca kaj senbrua
vero ambigua
plu dominas, sed
tiu ĝena pek'
estas ne problemo,
ĉar ja mankas emo
firme diri "Fek!"
al insida trompo.
Ni toleras, krom po
unu eŭro nur
pagi por ripoz' de
ĉuvenonta poste
honta malplezur'.
Daŭros ĝi eterne,
se plej vera ver' ne
draŝos kun obstin'

la situacion,
renversonte ĉion
kaj vekonte nin.

5.

Mi, konscia ke daŭras la vintro kaj la milito,
mi daŭre preta toleri, atendi, aspiri kaj pacience revii,
pensas, ke se la preteco sama kunigus nin multe pli, do
ŝanĝojn videblajn, certe, ni pli rapide povus ricevi.
Ho ve, progresas la homoj pri opinia kunmuldo
plej facile, se trompon ili akceptas anstataŭ vero,
sen peno pensi, kompari, konkludi, kaj ĉiu trompul' do
trompas konvinke kun brila sukces' en maldigna afero.
Sed ne eternas eĉ plej longa vintro laŭ leĝo natura,
nek la militoj kapablas tra l' mondo tro longe drivi,
venos printempo nepre, kaj venos paco, do nura
tasko mia esence plej grava estas –ĝisvivi.

6.

Mi ne ŝatas babiladon
pri mono,
ja ne garnas aĉan pladon
admono
de ŝtelema kuiristo
post pledo,
ke ne havas tute karnon
kotleto.

Mi ne ŝatas babiladon
pri famo
eĉ se havas certan flaton
balzamo.
Kiu laŭdas min kaj tondre
aplaŭdas,
eble poste alironde
min fraŭdas.
Mi ne ŝatas babiladon
pri l' into,
ĉar ĝin metas en salaton
veninto

al la rego per arogo
defia,
kvazaŭ into estas predo
nur lia.
Mi ne ŝatas, malakceptas,
forigas
ĉion, kio ne plencertas
sed ligas
trompajn faktojn kun la vero
dubinda,
kvazaŭ estas mi partnero,
sed blinda.
Balaiĝu babilulo
rapide
ĝis alia mondangulo,
sed mi de
la haladzo kaj tumulto
babila
restu for, eĉ se en mutio.
Trankvila.

7.

Ekverkante foje dum vesper' do
mi konstatas kun sulkiĝo frunta:
ne por ĉiu taŭgas mia sperto,
malgraŭ ke mi akumulis nun da
agoj kaj ekzemploj grandan stokon,
kolektitan sur la Ter' dumvive,
kaj por ĉiu ja troviĝas lok' en
mia kap' grizhara, tamen vi, ve! –
la konsilojn de la av' neglektas,
preferante lerni el eraroj
propraj. Ho, ĉu mi ne vane plektas
rimpoemojn por vi, miaj karaj?

Dec.2023-Febr.2024

Tiberio Madonna (Italio)



Tra la stratojn de vi

Kie via koro loĝas
 tie
 mia fantazio
 konstruos sian domon
 per brikoj el gumo
 por ne senti doloron

poeto *Tiberio Madonna* (Italio)

kiam la pezo de viaj silentoj
 premeĝos ĝin
 kontraŭ la kvar muroj starigitaj;
 kaj sen tegmento
 por ke la ruĝa domo
 ne iĝu nigra prizono:
 tie
 mia fantazio
 estos libera
 forflugi supren
 kaj poste malsupreniros
 denove
 kaj denove
 altirata funden
 de la surfo onda
 de via sango.
 Kaj mi restos kontemplanta
 tra la fenestro
 dum horoj
 rigardante eksteren
 la lazuran maron
 de viaj okuloj
 ondan


impetan
kiu dronigas miajn sonĝojn
kaj sensoifigas ilin
kaj farbas ilin
ĉirkaŭigante min
per la brilaj koloroj
de siaj koraloj.
Kaj dum tiu tempo
dum tiu silenta kontemplado
mia fantazio
forflugos libera
girante ĉirkaŭe
perflugiloj de papilio.
Ĝiaj malpezegaj
nepalpeblajflugiloj
koloritaj de la koraloj
ne tedos vin
kiam ili pasos antaŭ viaj okuloj
ĉar ilia ombro griza
estos tiom maldika
ke ĝi estos triste nevidebla
envolvita
kaj neniigita
de la senlima suno lumega
de via orgojlo
kiu blindigos viajn okulojn
kaj bruligos vian kompaton.
Dume
ĉiam
ĉie
mi restos
en la sama loko
en la sama tempo
de nia renkonto
kaj mi marŝos obstine
tra la stratoj de vi
mi vagos senutile
tra la ĉambroj vastaj

kaj malplenaj
de via grandeco
dum viaj vortoj
resonantaj
sinkontraŭdirantaj
ĵetos min violente
sur la plankon
de la realo
nereala.
Kaj la realeco
de viaj kontraŭdiroj
nutros konstante eterne la eternan fajron
la etan flamon
tremetantan
kiu incendias mian universon.
SEN NI

La floroj
en la mallumo
ne havas kolorojn
kaj la luno
defalinta en la malamon
perdis la helecon.
La suno
kiu brilegos morgaŭ matene
pli eta ol oranĝo
pluvigos
sian acidan sukon
sur niajn okulojn
soifajn
kaj bruligos
kiel senutilajn paperaĉojn
la songojn
kvankam jam cindriĝintajn.
Kaj kiel faros intertempe
la nokto
por trinki la tutan akvon
de ĉi freneza

fulmotondro
kaj viŝi la nubojn
malkovrante
ke ĝi perdis la lunon?
Kie ni trovos
helfarban pentraĵon
por povi eniri kaŝite
kaj promeni en ĝi?
Horloĝoj kaj kalendaroj
diras nenion plu
al niaj fantazioj
kaj l' atendoj
longaj
lacigantaj
kaj dolĉaj
dronis
kun siaj falsaj promesoj
en unu guto
da fumo.
Kion ni diros
al niaj koroj
kaj kion ni rakontos
al la emocioj?
Aeron
silentojn
kaj pluan aeron
plenigitan per vakuo. De vi.

Wally du Temple (Kanado)



Ĉevalo, Nova Avataro Indiĝena

poeto, Wally du Temple (Kanado)

Prapatroj diras ke

Indiĝeno

antaŭ ĉevalo,

peze-ŝarĝita,

malrapida,

terligata-

sed kiam ĉevalo invitis homojn

rajdi sur dorso

tiam

liber-fluga, liber-briza, liber-ira kiel vento,

ĉevalo- flugtera kaj netera potenco

ĉevalo ebligis al songmigrantaj ŝamanoj

flug-atingi potencojn

el kardinalaj direktoj

el oriento, spirit-aglo

el okcidento, spirit-urso

el nordo, spirit-bubalo

el sudo, spirit-muso

ĉevalo kaj fajro

egalaj malkovroj de triboj

ĉevaloj sentas niajn animojn kaj estas lojalaj kunuloj

ili instruas, ke saĝo venas de sentado kiel la aliulo sentas

tiele trovi kompaton kaj enirejojn al potenco

ĉevala scio ebligas ekvilibrantan potencon kaj perspektivon
Ni lernu sekvi la ekzemplon de ĉevalo



Polinezia Sunsubiro

Mi,
malfrue al ŝipdeko,
por spekti spektanklan
sunsubiron.
Videblaj!
bruligitaj
dorsoj, sienaj,
grasaj korpoj
ŝmiritaj kontraŭ
suno
en la tiea nuno
kiuj per fotiloj anticipas
eventualajn mirindaĵojn
bite kapitajn por reta elsendo.
Kiel mola rubeno brilas
kiam suno subeniras
en lazuran maron
malantaŭ Nuku Hiva
En la Markizinsuloj
De Franca Polinezio

Lily (Ĉinio)

Azeno en puto

(limerikoj)

I.

Iutage enfalis azeno
en puton de akva malpleno.
Ĝi raŭke ĝemploris,
kaj savon deziris
el vere mizera ĉagreno.

II.

La mastro kompaton ekhavis,
al ĝi ja la savo tre gravis.
Cerbumi li penis,
ide' ne alvenis.
Profundo de put' lin malravis.

III.

Rezigne decidis per tero
plenigi li puton kun kvero:
en paco, vi kara
jen restu senfara,
mi faras tion sen prefero.

IV.

Do, oni enĵetis ŝovele
la grundon sur beston kruise.
La mastro lamentis,
malĝojon li sentis:
Ĝi ne plu servadis fidele.

V.

L' azeno mirige ne ploris

ĉagreno pro morto jam foris.
Ĉu pasis la krizo?
Ho, kia surprizo!
Ekmiro la mastron forvoris.

VI.

Li ŝovis la kapon diskrete
por vidi, ĉu io kviete
okazas enpute
sencie entute.
Ha, kion ĝi faras konkrete!

VII.

Forsvingis ĝi grundon plenforte
de dorso kaj staris komforte
taval' sur tavolo
jen firme kun volo
sur teron ĵetitan ĝismorte.



VIII.

Leviĝis ĝi lante fiere
ĝis rando de l' puto libere.
La mastro mirplene
laŭdetis senĝene:
“Vi saĝa stultulo ja vere!”

Sub lunlumo

(laŭ sapfa skemo)

Frida brizo blovas karese milde
tra arbar' sub luno plenluma brile,
paro da amantoj intime kveras,
kisas trankvile.

Sur herbejo ili dorskuŝas pace,
ĝuas l' amon dolĉan pasie, flame.
Palpas li ŝiajn elstarajn mamojn
sorĉajn permane.

Flaras li odoron parfuman snufe,
en ekstaz' ebrie forgesas sin mem.
Ĝi el korpo ŝia pufeta ravas
lin per kortrem'.

Turnas sian kapon li ŝmace kisas
ŝian vangon kaj li ŝin tiras flirte
al la brusto sia vilplena nuda
kvazaŭ bonvirte.

Ŝi kokete, milde forpuŝas buŝon
lian kaj sin tenas diskreta vere,
pro allogo de voluptemo cedas
ŝi finfine al nedeca konduto lia
agi libere.

Lia brakumringo sufokas preskaŭ
ŝin je spiro kaj li incitas vorte
ŝian tiklan koron, ŝi nestas sine
ja pli komforte.

Ekas ama ludo fervore arde,
kisoj, lipmordetoj, tordiĝ' avida,
langoŝmacoj, palpoj, brakumoj karnaj—

ĝuo senbrida!

Nokto profundiga. Ĉirpad' de griloj,
bru' de akvaj plaŭdoj, susur' de vento
supersonas ĝemojn, ĝojkriojn tute
en ĉi momento.



Malĝoja nub

vi estas tiu nub' sur la ĉielo
mildeco estas via belo
kial nun vi ja fariĝas
silenta kaj senvorta
kaj ofte larmojn faligas malforta?
vi eble plenas je tro da ĉagreno
pro tio vi ploradas en malsereno
mizeron vian sentas mi en koro
mi ankaŭ dronas en doloro
mi volas blovi kiel vento
rememoron tristan vian for
eĉ iom el via morna plendlamento

vi estas tiu blanka nub' sur la ĉielo
flirtado estas via flosa velo
sed jen nun vi fariĝas deprimiĝa
sen ĝojaj ridoj kaj paroloj
kaj kun tristeco kaj korŝiraj foloj
mi tiom ŝatus esti varma vento
por al vi sendi iom da miela dolĉo
kaj por konsoli vin eĉ dum momento

Elena Popova (Bulgario)



poetino *Elena Popova* (Bulgario)

Parolado dum la plenluno

Sidiĝanta sur floranta arbusto, kriketo ludis. Li ludis, etendis siajn flugiletojn, kaj kriis:

- Mi estas la plej bona muzikisto en ĉi tiu mondo! Jen, la Lampiroj dancas ĉirkaŭ mi, floroj aŭskultas min kaj revas, birdoj plenigas la nokton kun sonoj. Mi pensas, ke mi estas Sorĉisto...

La luno, turniĝanta per radianta vizaĝo al la tero, aŭskultis kun intereso.

- Ho, flugilhavulo, ĉu mi aŭdas ĝuste? Via mondo estas tro malgranda, kiel vi. Vi kreskos, lernos kaj nur tiam, se vi estas obstina, vi povus atingi vian kulminon de perfekteco.

La apogeo, kiun iu talenta kriketo povas atingi.

- Sed mi estas sur la pinto, mi ludas bele kaj vidas kiel bela estas la nokta mondo.

- Vi estas sur la pinto de iu arbusteto, sed mi ne parolas pri tia pinto. Ĉiu dum sia vivo havas kulminon, kriketo, al kiu li devas iri. Kaj ĝi ne estas facile atingebla. Vi ne povas flugi antaŭen sen porti la ŝarĝon de la scio kaj la sperto. Kaj kiam vi atingos la apogeon, vi rimarkos, ke ne ekzistas loko por fiero kaj laŭdo, sed por trankvila ĝojo de la atingo kaj deziro helpi la aliajn.

Estu modesta, kriketo, vi estas ankoraŭ ĉe la komenco de la vojo kaj la fiero povas nur malhelpi vin. Kaj nun, mi petas vin, ludu ion por mi, ke estu trankvila mia nokto!

Estis plenluno. Ĉe la supro de la arbusteto, ludis ravite kriketo - estonta granda muzikisto.

Ardo (Ĉinio)



poeto Ardo (Ĉinio)

Frua printempo

Dum lastaj tagoj post la nova jaro
ja estas tre agrabla la vetero.
Printempo startas jam en januaro,
sed ne burĝonis plantoj sur la tero.

La urbo bruas kaj je homoj plenas,
sed nur mi estas la fremdulo sola.
Sur vojo de vilaĝo mi promenas,
en milda vent' mi estas bonhumora.

Omaĝe al la jubileo de dekjara datreveno de Zaozhuanga Esperanto-muzeo

Jen estas solena dekjara jubileo
de nia Zaozhuanga Esperanto-Muzeo,
el ĉi tiuj kolektaĵoj pri Esperanto--
estas jen raraĵoj kun bril' de diamanto,
ĝi estas esplorbazo por esperantistoj,
kaj la eduka centro por geinstruistoj.
Ĉin oni aplaŭdas kiel ekspozicio
de esperanta kulturo kaj historio.
Nun karaj geamikoj donas bon-ideojn,
por havi belan perspektivon de l'muzeo.
Gratul-leteroj venas el la tuta mondo,
kun bondeziroj por la belega estonto.

Kiel hela stelo brilas en oriento,
ni povos fari novan gloran monumenton,
en kiu ĉikunas la altan idealon
de ĉiuj geesperantistoj kun lojalo.
Antaŭ ni jen estas persisto, eĉ la lukto,
sed post laboradoj ni gajnos pli da frukto.
Ĉar la muzeo donas al ni energion
por realigi nian sanktan ambicion.

15.nov.2023



L. L. Zamenhof

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



poeto, Yi Qiao

La nova Edeno

Jen aŭroro frumatena
kiel via bel' miena
el memoro de juneco
kun vigla deco.

Jen helbril' tagmeza
kiel via kis' karesa
el memoro de bel-amo
kun arda flamo.

Jen lunlum' vespera
kiel la brakum' tenera
el memoro de pasio
kun morna nostalgio.

Jen stelaro noktĉiela
plen-de admonad' fidela
el memoro de pasinta vivo
kun vasta perspektivo.

Per firmkred' en Dio ĉiopova
ni beniĝu en l' Edeno nova!

Rememoro ĉe l' plaĝo

Mi promenas ĉe fruĵara plaĝo
kun apude milda briz' susura:
flirte preter mia sobr-vizaĝo,
kiel flustro sorĉe am-murmura.

Tuj vekigās dolča rememoro
pri pasinta jam junec' fiera:
kiel vivdebuta hel-aŭroro,
kun eterne vigla verv' prospera.

Nostalgie morna mi suspiras
plene de elkora pez-lamento.
Al splendeco glora mi sopiras
jam kun varmaj larmoj en silento.

Se nur en la koro estas amo,
ardas ĉiam la juneca flamo.



Fernando Pessoa (1888-1935)



Fernando António Nogueira Pessoa (13 June 1888 – 30 November 1935) estis portugala poeto, verkisto, literatura kritikisto, tradukisto, eldonisto kaj filozofo, priskibita kiel unu el la plej signifoplenaj literaturaj figuroj de la 20-jarcento kaj unu el la plej grandaj poetoj en la portugala lingvo.

el Wikipedia

poeto, Fernando Pessoa

Sentabundo

Mi sentabundas intense
do ja konvinkiĝi povas
pri mia nepra sentem'.
Samtempe tamen mi trovas
ke ĉi-ĉio kuŝas mense,
estiĝante jam dilem'.

Ĉiuj ni vivas sub gvido
ja de l' viv' de ni vivata
kaj de dua en la pens'.
Sed tiu en sindivido
inter la du la spertata
vere estas, spit' al dens'.

Fakte ĉu estus por ni

viv' ol ĉi nuna pli ĝusta,
respondon kiu decdonos ?
Striktu nia penso pri
nia viv' , se pli bongusta
iam estos ni ĝin konos.

Aŭtopsikografio

Siaarte la poet'
doloron kredigas forte
kvazaŭ sian pro la net'
de ĝi tie do subvorte.

Tamen ĉe kiuj lin legas
ne plu l' senton pri dolor'
liaj du doloroj regas
sed tutnova en ĉi hor' .

En rondir' laŭ l' rejla ordo
kun laŭditstr' al la raci'
jen re-kaj-re trajn' de kordo:
jes ĉi vera kor' de ni.



tradukinto, Wáington Rocha (Brazilo)

Ai Qing (1910-1996)



poeto Ai Qing

Dediĉe al la Suno

Elĉinigiĝis Eto (Ĉinio)

Matene kiam mi vekigĝas,
 mi ĝojas je ekvid' de via lumo,
 lastnokte kvankam mi tre lacis
 kaj min obscedis inkuboj sennombraj.
 Karesa, freŝa, hela lumo via
 ŝutiĝas sur fenestron mian longe fermitan,
 la fenestropaperon farbas per helflav' kiel
 poleno,
 en krado hele blua inkrustitan.
 Mi saltas el la lito, kun dankemo,
 apertas la fenestron dum la tuta vintr'
 fermitan, enlasas l' or-teksitan tablotukon
 diafanan

sterniĝi sur la tablon apud la fenestro.
 Kun mir' kaj ĝojo, mi vin vidas:
 ververe kaj sendube
 vi staras sur la montpint' kontraŭa
 serene ridetante.
 Mi pene mian okulparon malfermegas
 por kapti soife imagon vian:
 vi tiel 'stas intensa, svaga kaj majesta!
 pupilojn miajn via lum' pikdolorigas.
 Ho, Suno, vi senmorta sciemulo,
 vin vidas eĉ la plej malfeliĉulo,
 ankore sentas li konsolon vian.
 Forĝist' de temp' vi estas,
 kaj orumisto de bonhava vivo;
 vi forĝas tagojn en sennombrajn radojn,
 surper antikva ebenaĵo rondflugantajn...
 Se ne ekzistus vi, ho Suno,
 vivaĵoj ĉiuj dronus en mallumo,
 eĉ se flugilojn ili havus, ili kiel

vespertoj flugas en eterna nokto.
Vin amas mi jen kiel mian proran panjon.
vi nutras miajn pensojn kaj konceptojn,
pro tio mi fervore vivas, min turmentas por la idealo,
ĝis kiam Mort' forportos mian vivon.
Post longa kaj soleca vintro,
hodiaŭ volas mi ascendi la montpinton,
min senvestigi kaj nudigi
por duŝi mian animon en via lumo...

Mi ĉi teron amas

Se mi estus birdo,
mi devus kanti per la raŭka voĉo
pri ĉi ter' trafita de pluvŝtormo,
pri l' river' torenta kun indigno trista nia,
pri la iritita vent' senĉese muĝblovanta
kaj pri la aŭroro milda elvenanta el arbaro...
— Poste mi formortus,
eĉ putriĝus miaj plumoj en la teron.

Kial ofte larmoj brilas en okuloj miaj?
Ĉar ĉi teron mi amas tre profunde...

Respondoj de Karbo

Kie loĝas vi?

Loĝas mi en montoj dekmil-jaraj
Loĝas mi en rokoj de dekmil-jaraj

Via aĝ'?

Estas mi pli aĝa ol la montoj
Estas mi pli aĝa ol la rokoj

Kiam eksilentis vi?

De la tempo, kiam dinosaŭroj regis la arbarojn
De la tempo, kiam la terkrust' ektermis la unuan fojon

Ĉu vi mortis en indign' profunda jam?

Morti? Ne, ne, mi ankoraŭ vivas —
Donu al mi fajron! Donu al mi fajron!

Rifo

ondo sekvas ondon
ĵetas sin sencese
ĉe liaj sokloj ondoj
rompiĝas, retiriĝas..

...

kun vizaĝ' kaj korpo
per glav' hakitaj
firme staras li senmove
ridetanta, l' maron ja defias

Sopiro

Maristo diras
li plej ŝatas
neĝblankajn ondflorojn
levitajn de ankrolevado

Maristo diras
li plej ĝojas
je la bruoj de fer-ĉenoj
eligitaj de ankrĵetado

sopir' ekiras
sopir' atingas sonĝon

Li Bai (701-762)



Dek Poemoj

Elĉinigris Tang Ren

*Li Bai (701-752): ĉina plej elstara romantika poeto dum
Tang-dinastio de Ĉinio.*

Malfacila vojo al Shu-regno

Aĥ, ho ve! kiel kruta vojo en danĝero!
 La vojirado al Shu (*ŝu*)-regn' pli malfacilas
 ol surgrimado al ĉielo!
 Ekde l' fondiĝ' de la Shu-regno
 jam pasis milmil jaroj en la temp-rivero.
 Dum kvardek ok mil jaroj ĝi neniam
 interkomunikiĝas trans la Qin (*ĉin*)-pasej' eĉ per
 letero.
 Ueste en la Taibai (tajbaj)-Mont' troviĝas trairej' por
 birda flugo,
 transgrimpi l' Emei-monton tie oni povas kun espero.
 Post martiriĝo de bravuloj pro montfal' kaj terkreviĝo
 du lokoj interligas per ŝtupar', kornica voj' por
 pasaĝero.
 Supre la montopintoj baras la filtriĝon de l' sunlumo,
 malsupre ond-torentas turbulanta la rivero.
 La flava gru' ne povas flugi transen,
 kaj malfacilas por simioj grimpi kun leĝero.
 Meandras montovicoj jen tavolo' post tavolo,

naŭ kurboj en cent paŝoj foj-refojas ĉirkaŭ roka sfero.
Spiromi retenas tuj sub stelar' en manatingo,
suspiras mi premante bruston en anhelsufero.
Kiam vi de l' vojaĝo okcidenten jen revenos?
Ĉi tie krutaj kaj danĝeraj klifoj vin senigas je libero.
Aŭdiĝas birdaj tristaj krioj inter praaj arboj,
jen viraj birdoj flugas kaj la inaj sekvas kun
vok-kvero.
Kukoloj kukuadas kontraŭ l' nokta luno
en trista mont' malplena en malhelo.
La vojo al Shu-regn' ja malfacilas
pli ol ascendo al lazura la ĉielo!
Priskribo tia jam timigas homojn kun mienŝanĝiĝo!
Vico da montopintoj preskaŭ tuŝas la ĉielon sen
ŝancelo,
inverse pendas la velkintaj pinoj sur klifmuroj.
Impetaj fluoj, akvofaloj roras sub ondopelo,
frapante klifojn kaj rokegojn kun sonoro tondra.
Nenio pli danĝera ol ĉi spirokapta sfero,
ho, kial vi vaganto venas tien ĉi riskeme?
Pasejo Jiange (*ĝjan-ge*) jen minacas alte kiel citadelo,
bravulo unu tie defensivas kaj la vojnon baras,
eĉ dekmil homoj ne sukcesas ĝin okupi por konkero.
Se garnizon' ne estus lojaluloj de l' imperiestro,
fariĝus ili certe lupoj kaj ŝakaloj de ribelo.
Matene vi evitu la ferocajn tigrojn,
vi vin protektu kontraŭ serpentmordo ĉe vespero.
Okazis multe da sangverŝ' kaj hom-mortigoj.
Spite al la plezuroj en Shu-regno, hejmeniru kun
prefero.
Aĥ, malfacilas iri sur la vojo al Shu-regno,
eĉ pli penige ol ascendo al lazura la etero!
Uesten rigardante al l' altaĵoj animskuaj
suspire ni sentas nin senkapablaj en despero.

Drinki sola sub la luno

Sidante inter floroj mi per vinpokalo

drinkadas sola sen alies kompani'.
Mi levas vinpokalon por inviti l' lunon
al mi kaj l' ombro por triopa vin-orgi'.
La lun' ne konas la plezuron de drinkado,
Ho, Ombro, vi apudas min ja sen konsci'.
Portempe mi, la ombro kaj la luno kunas,
mi en printempo trinkas, montras ĝojon pli.
mi versas sub la luno en moviĝemado,
mi dancas kun la ombr' vibranta en vari'.
Se sobre, ni gajplene ludu, drinku kune,
ni do disiru satdrinkinte en eberi'.
Jen Lun', ni kaj vi amikiĝu por eterne
kaj renkontiĝos ĉe la rand' de l' galaksi'.

La luno super montaro

La luno pendas super la montaro,
ŝvebante en nebula nubomaro.
Trans dekmil lioj vento blovas foren
ĝis la Pasejo Yumen (*jumen*) en batalo.
Soldatoj militiras kontraŭ hunoj,
la ter' de Qinghai (*ĉing-haj*) dronos en amaro.
Delonge tie estas batalkampoj,
soldatoj ne revenas pro fatalo.
Rigardas splene ili al lim-urbo,
hejmvee kun ekstrema spirit-falo.
Sur alta turo ankaŭ en ĉi nokto
aŭdiĝas vesuspiroj sub lulpalo.

Preta drinki

Ĉu vi ne vidas la Riveron Flavan torentantan el ĉielo
al l' orienta maro senrevene?
Ĉu vi ne vidas la gepatrojn antaŭ la spegulo, sen tolero
lamentajn pri blankharoj, kiuj nigras ĉematene
kaj jam fariĝas blankaj kiel neĝo ĉe vespero?
Dum vivo pompas oni devas ĝui ĉion plene,
ne lasu vinpokalon sen alkoholajo sub luna helo.

Talento nia ĉiam brilas kaj valoras geme,
se l' oro disipiĝas, ĝi revenos kun espero.
Ni buĉu kaj kuiru bovon, ŝafon porfestene,
da alkoholo tri cent tasojn trinku kun prefero.
Amikoj miaj, ĝojmiene!
Pretigu vin ekdrinki! Ne demetu la pokalon sen ŝancelo!
Mi kantu por vi forto-plene!
Aŭskultu al mi atenteme per l' orelo.
La luksa vivo kun frandaĵoj jen forpasu svene,
ni ebriĝu dorme, ne sobriĝu kun fiero.
De antikvec' sanktuloj sentas sin solece, splene,
nur drinkemulo lasas sian famon de la belo.
Feŭdulo festenigis siajn gastojn tre solene,
orgie ili drinkis kaj diboĉis kun libero.
Ne diru pri monmanko, maestr', aĉetu ja senĝene
alkoholaĵon por ni drinki do ĝis ebri-pelo.
Stalonon kolorriĉan kaj la pelton nun elprene,
forvenu kontraŭ bonkvalita vino en la kelo.
Ni kune ĝuu fole kaj drinkadu senĉagrene!

Penseroj en la printempo

La herboj suplas kiel velur-viloj,
morusfolioj fleksas branĉojn peze.
Kiam vi eksopiras al hejmloko,
mi jam morozas, ve, pro vi, freneze.
Printempa vento, vi ja ne min konas,
kial vi ĝenas min nun senkompleze?

Malfacila vojirado

Fajna vino en pokal' el oro
kostas je dekmil moneroj en valoro,
la frandaĵo en la plad' el jado
ankaŭ multe karas ja je mia ŝato.
Tason kaj haŝiojn mi demetas
kaj pro ĝenateco manĝi mi ne emas.
Elinginte l' spadon jen rankore,

mi rigardas nun ĉirkaŭen malplenkore.
Volas mi transpasi l' Flav-Riveron,
sed glacio sur ĝi baras mian velon.
Ankaŭ l' neĝ' sur Taihang-monto tute
malebligas mian transgrimpadon trude.
Iam fiŝohokis maljunulo,
venis saĝa reĝ', lin trovis talentulo.
Malfacile! malfacila vojirado!
Vojoj jen ireblaj multas tre,
sed do, kie l' ĝusta vojo por mi, ve?
Venos por mi l' ĝusta tempo certe
sur la maro longajn ondojn fendi lerte,
mi veturos per favora velo
kaj direktos min al rando de l' ĉielo!

Longa sopiro

1.

Tagnokte mi sopiras al vi en la urbo Chang-an
(ĉang'an).

Insektoj ĉirpas aŭtun-nokte ĉe putrand' el oro,
malvarm' invadas la bambuan maton pro
prujn-mordo.

sopiro min obsedas en malhela la lamp-solo,
fenestr-kurtenon levas mi kaj veas al ĉielo.

Belino via ja distancas de vi en la foro.

La volbo alta vaste spacas en nebulo svaga,
malsupre sur river' leviĝas huloj de rankoro.

Penigas la vojaĝ' tagnokta inter la du lokoj,
animo malfacile transas montojn eĉ per soro.

Tagnokte mi sopiras al vi kun rompita koro.

2.

Lunlumo fadas, floroj banas sin en nebulfumo,
mi malfacile endormiĝas pro enkora spleno.

Apenaŭ ĉesis mi plukadi kordojn de Zhao (ĝaŭ)-citro,
liuton de Shu (ŝu)-regno mi ekludas en ĉagreno.

Nur bedaŭrinde la ari' ne povas vin atingi,
mi volas, ke ĝi flugu jen al via loĝ-tereno.

Vin tenas mi en kor' sen renkontiĝi vid-al-vide.
 Okuloj miaj kun amemo
 fariĝas jam la font' de larmo
 kun kor' ŝirita de trist-pleno.
 Vi vidos mian povran malgrasiĝon je l' reveno.

Kanto de soldatoj en lim-regiono

Ankoraŭ neĝkovritas mont' en majo,
 videblas neĝpejzaĝo, sed sen floro.
 Muziko pri saliko sonas bele,
 eliĝas ne printempa bonodoro.
 En tamburado ni matene luktas,
 ĉe l' selo ni dormetas en nokt-horo.
 Kuraĝe volas ni per glavo akra
 ekstermi malamikon el la foro.

Vizito al la monto Tianmu en sonĝo

Laŭdire Yingzhou (jingĝoŭ)—la feland' en vasta
 nebulmaro,
 apartigitas de la homa mondo en realo.
 La monto Tianmu (*tjanmu*) tamen staras jen en
 Yue (*jŭe*)-tereno,
 jen kaj jen oni povas vidi svage tra nubpleno.
 Ĝi kvazaŭ etendiĝus rekte supren al ĉielo,
 l' imponajn kvin montegojn superaltas kun fiero.
 La monto Tiantai (*tjantaj*) altas dek-ok cent mil
 klaftojn vere,
 sed ĝi aspektas antaŭ l' monto Tianmu nan-apere.

Mi eĉ veturas en Yue-landon belan en sonĝ-lulo,
 kaj nokte jen leĝere flugas mi trans Lag' Spegulo.
 Lagakv' reflektas mian ombron klare
 kaj min forsendas al Shan (*ŝan*)-rojo per-nubmare.
 Ĉi tie la loĝejo de poet' Xie (*ŝje*) restas same
 simioj krias, lago ondetadas kristal-ĉarme.
 Kun la grim pantaj ŝuoj surpiede

per nub-ŝtupar' ascendas mi sencede.
Ĉe l' monttali' mi vidas sunon el la maro,
kaj aŭdas ĉiel-kokon kanti per kri-klaro.

La voj' sinuas inter milmil rokoj en pelmelo,
raviĝas mi de floroj kaj rokegoj ĝis vespero.
Muĝad' de drak' kaj urs' tremigas la fontakvon vibre,
kaj forte skuas arbojn kaj montpinton sonor-sible.
Nubaro griza amasiĝas, pluv' minacas,
vapor' nebula svarmas, la aer' grimacas.
Tuj sekvas tondro, fulm' subite,
jen ŝajne krevus mont' krepite.
La peza ŝtona pordo de l'ĉielo
ovriĝas jen abrupte en aero.
Senfunda la kaverno regas vasta, blua lumo,
palacojn el arĝent' kaj or' briligas sun' kaj luno.
La feoj en ĉielark-vesto rajdas sur la vent-ĉevalo
desupre ili avataras ŝvebe jen en aro.
Liuton ludas tigroj kaj feniksoj ĉarojn tiras,
la feoj puŝiĝante en linioj jen aliras.
Animo mia panikiĝas en terura skuo,
mi vekigiĝinte el la ŝonĝ' suspiras kun ve-bruo.
Mi vidas kapkusenon, maton antaŭ la okuloj,
vanuis tute en la ŝonĝ' nubfumo kaj nebulo.

La ĝojo en la vivo malaperas kiel sonĝa sfero,
aferoj de l' hommond' forfluas kiel la rivero.
Nun adiaŭas mi vin vojaĝantajn al la foro,
kiam revenos vi renkonti min ja en izolo?
Mi paŝtu blankajn cervojn en verd-monto provizore,
viziti l' faman monton ilin rajdos ni laŭvole.
Ĉu povus mi kaĵoli la nobelojn jen servile,
sen ke mi ĝoje vivas ridmienne kaj trankvile?

Kanzonoj de Changgan

1.

Ĵus kiam mian frunton plene kovris hararo,
ekkludis mi ĉe pordo per plukita branĉaro.

Vi venis ludi kun mi per ĉevalo bambua,
ni ĵetis prunojn ĉirkaŭ puto kun krio brua.
Ni ambaŭ loĝis kune en la Changgan-tereno,
kiel infanoj sen dubemo kaj sen sinĝeno.
Mi dekkvar-jara edziniĝis al vi volonte,
sed mi neniam montris ridmienon kunhonte.
Kun kap' klinita mi rigardis al murangulo,
kaj je mil vokoj ne min turnis jen de la muro.
Mi ekis ja vigliĝi je la aĝ' dekkvin-jara,
kaj volis sperti tagojn mi en vivo banala.
Mi ĉiam tenis min kroĉiĝe al vi fidela,
neniam mi ekpensis pri estonto sortpela.
Kiam mi dekses-jaris, vi vojaĝis al foro,
tra l' Gorĝo Qutang (*ĉutang*) ĝis celloko Yanyu
(*janju*) en solo.

En maj' ŝvelinta akvo al vi la vojon baris,
simiaj krioj ambaŭborde sore spiralis.
Antaŭ la porda via piedspuro hezita
kovriĝis plene jam per verda musko tre glita.
Balai mi ne povis ĝin pro ĝia densdenso,
folioj falis en l' aŭtuna vent' en intenso.
Aŭgusto bonvenigis papilian alvenon,
alflugis ili pare en uestan ĝardenon.
Je la vidaĵ' mi tristis jen kun koro ŝirita,
vizaĝo mia palas en oldiĝo rapida.
Kiam vi volis rehejmiĝi ja kun deziro,
mesaĝon sendu al mi antaŭ via foriro.
Por bonvenigi vin mi volos iri tutsola
la longan vojon spite al sufero dolora.

2.

Kiam profunde mi najlitis en buduaro,
hommondon mi ne konis tute ja en detalo.
Min Changgan-ano edziniĝis vole sen plendo,
sed mi lin sopiradas nun ĉe riverbord' en atendo.
En majo forte blovas suda vent' en intenso,
mi pensis, ke tra Baling iras vi en la menso.
Aŭguste blovis l' okcidenta vent' violente,

imagis mi, ke vi deiras jam evidente.
Foriron kaj reiron viajn mi ja zorgas en koro,
ni rare kunas, sed vi restas ofte en foro.
Kiam revenos al la hejmn' vi tute sekure?
mi songis, ke ni fluge transas ondojn veture.
Lastnokte furioze blovis vent' el ĉielo,
derompis arbigigantojn ĝi ĉe l' bord' de rivero.
Mi gapis al la torentanta flu' en stuporo,
kie karulo mia trovas vin en izolo?
Mi volus rajdi sur la nub-stalon' en aero
por vin renkonti ĉe eosta strand' kun prefero.
Ambirdoj naĝas sur la lago koro kun koro,
broditas alcionoj sur satena silk-tolo.
Mi estas pli-ol-dekkvin-jarulin' kompatinda,
kun vangoj persikfloraj kaj aspekto tre linda.
Kiel edzin' de komercist' migranta libere,
mi vivas vivon de disiĝoj multaj mizere.



Ding Xilin (1893-1974)



aŭtoro *Ding Xilin*

Subpremo

Unuakta komedio

PERSONOJ

Luanto (L)

Luantino (N)

Mastrino (M)

Maljuna Servistino (S)

Policano (P)

SCENO

Malnovstila ĉina domo. Malantaŭe pordo al korto. Ambaŭflanke po pordo al aliaj ĉambroj. Interne de la ĉambro iom dekstre staras kvadrata tablo, kun kelkaj seĝoj. Sur la tablo estas tablotuko, petrollampoj kaj tetrinkilaro. Iom live ĉe la muro staras tetableto kun paro da seĝoj. Sur la apogilo de unu seĝo estas pluvmantelo, apude— mansako. Malantaŭe live ĉe la muro staras meblo kun spegulo simila al tualeta tablo, sur kiu estas horloĝo kaj florvazo. En la ĉambro ankaŭ estas alia dekoracio, sur la muro estas belskribaĵoj kaj pentraĵo, sed ĉio estas sufiĉe simpla, modesta.

Kiam leviĝis la kurteno, viro en kostumo el kruda lanŝtofo kaj longaj botoj pipfumas sidante sur la seĝo apud la tableto. Maljuna servistino staras ekster la pordo etendante sian manon por pruvi ĉu ankoraŭ pluvas.

S: (*Eniris en la domon*) Jam ne pluvas. Kial ŝi ankoraŭ ne revenas? (*prenante de la tablo kruĉon, iris al la tetableto kaj verŝis teon al la gasto*)

L: (*Senpacience. Stariĝis*) Hm, al mi unue iom da manĝaĵoj, ĉu eble?

S: Pretaj estas manĝaĵoj tie. Sed ni ankaŭ devas atendi ĝis reveno de la s-ino.

L: Por manĝi ni devas atendi ŝian revenon?

S: (*suspiris*) Jes, por manĝo ni devas atendi la s-inon, por la apartamento ni ankaŭ devas atendi la

s-inon.

L: Do, ni atendu! Finfine egalas, ĉu ŝi revenos, ĉu ŝi ne revenos. (*residiĝis*)

S: (*kapskuis*) Verŝajne, nia s-ino mastrino ne konsentos ludoni al vi la apartamenton.

L: Ne konsentos? Kial ŝi akceptis mian mendpagon?

S: Tion ja faris nia f-ino, sed ve! Temperamento de nia s-ino ankaŭ estas tro stranga, ĉu s-ro kiel vi alportus ĝenon al ni? Fakte, se en la domo estas viro, oni sentos pli da sekureco en noktmezo.

L: Ĉu iam venis luanto por tiu ĉi apartamento?

S: La apartamento estis vaka jam dum pli ol unu jaro, sed ĝis nun ankoraŭ neludonita.

L: La ĉambroj ne estas malbonaj, kial venis neniŭ luanto?

S: Neniŭ? Ĉiu, kiu vidis tiun ĉi apartamenton, laŭdis kaj volis lui. Jen la ĉambroj estas puraj kaj helaj. Kaj antaŭe troviĝas tiel bona ĝardeno.

L: Sed kial neludonita dum jaroj?

S: Ho, s-ro, vi ne estas fremda homo, do estas ne grave, se mi konfidu al vi. Sciu, kion nia s-ino plej ŝatas, estas ludo de maĝango, ĉiutage de la mateno ĝis la vespero ŝi ne estas hejme. Restas nur nia f-ino kaj mi, duopo. Kiam venas luanto, akceptas nia f-ino. Al tiu, kiu havas familianojn, tuj ĉe la mencio pri edzino kaj infano, nia f-ino forsendis lin rifuze. Nia f-ino donis konsenton nur al tiuj luantoj sen familianoj. Tamen, kiam nia s-ino revenis, eksciinte ke la luanto estas sen familianoj, ŝi tuj lin rifuzis for. Tiel do, por ne paroli pri unu jaro, mia opinio, eĉ post dek jaroj la ĉambroj restos ankoraŭ vakaj neludonitaj.

L: Kio? Tia afero iam okazis?

S: Eĉ multfoje! Kaj ĉiŭfoje sekvis kverelo inter niaj f-ino kaj s-ino. Ordinare nia f-ino ne faris decidon. Sed ĉiŭfoje ŝi mem decidis akcepti vian mendpagon, tiel okazas la ĝeno.

L: Se ŝi decidis pli frue, la apartamento jam delonge estis luigita.

S: Jes, sed ordinaro la rifuzitoj foriris, ili ne estas kiel vi, tiel...

L: Stranga? ĉu? Jes. Via s-ino estas tro stranga. Ankaŭ mi mem tro stranga. Ĉiŭfoje kontraŭstaras du stranguloj, do la afero fariĝas malfacila. Tamen, ĉi tiu domo ankaŭ plaĉas al mi, precipe la malgranda ĝardeno.

S: Laŭaspekto, s-ro, vi certe estas kvietema, ĉi tie aŭdiĝas nenio da bruoj ĉiutage kaj estas tiel proksime de via oficejo, sekve... sekve mi cerbumadis por vi...

L: Kion?

S: ...vi prefere diru ke vi havas edzinon, kiu venos nur post tagoj, tiel nia s-ino konsentos ludoni al vi la apartamenton.

L: Do, sed post tagoj neniŭ edzino venos. Kion fari?

S: Post tagoj nia s-ino jam ne rifuzos, ĉar ŝi vidis vin bonkonduta.

L: Ne, ne! Homo sen edzino ne estas krimulo, kial ne rajtas lui domon?

S: Nu, mi tiel pensis stulte nur pro tio ke mi opinias vin certe tre afliktita, ĉar vi ja tiel ŝatas la apartamenton, sed ne sukcesis ĝin lui. Ho, mi ja estas senprudenta.— Aŭ, jen probable revenas la s-ino mastrino. (*iris ĝis la pordo, kaj laŭte vokis*) Ĉu s-ino? (*responde*) Ho, jes, ĉi tie. (*eliris. Ankaŭ la luanto stariĝis. Post momento, eniris la mastrino-luigantino de la malantaŭa pordo. La servistino ŝin sekvis.*)

M: Pardonu! Ke vi atendis longan tempon!

L: Pardonu pro mia ĝeno! Mi ja petis ke via servistino ne vokis vin, sed ŝi ne aŭskultis min.

M: Ne grave. (*prenis monbileton el leda monujo*) Aĥ, jen via mendpago! reprenu!

L: Aĥ, pardonu! Mi venas por loĝi, ne por repreni mian mendpagon.

M: Kio? Hieraŭ mi jam klarigis al vi ke mi ne povas ludoni al vi la apartamenton, ĉu?

L: Aĥ, jes, vi bone klarigis.

M: Sed kial hodiaŭ vi sendis vian pakaĵon ĉi tien? Kion vi volas?

L: (*kun granda ĝojo*) Ĉar tio, ke mi ne venu, estas via parolo, sed ne mia. Mi ne konsentis ke mi ne venas, ĉu mi konsentis?

M: (*iom post iom sentas malagrablon*) Mi ne bone komprenas vin. Ŝajnas al mi, ke laŭ via opinio,

la luigo de la apartamento nur vi rajtas decidi, ĉu?

L: Nu, ne. La luigon kompreneble nur vi rajtas decidi. Sed post la luigo nur mi rajtas decidi. Sciu,

nun la problemo ne estas pri luigo, sed pri nuligo.

M: (*iom post iom koleriĝis*) Kiam mi konsentis la luigon al vi?

L: Ĉar vi akceptis mian mendpagon, tio signifas konsenton al mi.

M: Diablo! Kiam mi akceptis vian mendpagon? Ja mia filino, senprudenta!

L: Senprudenta? Ŝi ne estas infano.

M: Nu, jam ne sensencaĵon. Ne estas tio, ke mi luigas. Mi nur volas luanton kun edzino. Se vi havas edzinon kunloĝantan, mi donos al vi la apartamenton. Senmalfacile.

L: Kia diro! Kiam vi luigas la ĉambron, ĉu vi klarigis tion? Ĉu mi trompis vin?

M: (*Ŝanĝas sin en paca maniero*) Mi ne klarigis luigante. Sed hieraŭ mi jam diris al vi ke en nia hejmo estas neniu viro...

L: (*Ŝin haltigi*) Aj, aj, mi demandu al vi ĉu estis viro kiam vi luigas vian apartamenton? Kial vi ekmemoras, nur ĉi-momente?

M: Tute neklarigeble kun vi. Mi ne havas tempon por diskuti.

S: (*interpacige*) Nu, s-ino, hodiaŭ jam estas malfrue, kaj pluvas. Estas ne oportune ke tiu s-ro trovu alian ĉambbron. Ĉu eble lasi lin provizore loĝi ĉi tie dum nokto kaj morgaŭ trovu alian elirejon?

L: (*obstine*) Neeble! La rezono estas tia. Se mi ne luis la ĉambrojn, mi tuj foriru! Se vi jam akceptis mian mendpagon, la apartamenton nepre disponu mi !

M: Do mi diru al vi: hodiaŭ vespere vi nepre foriru !

L: (*rikane*) Hm ! (*sidigis*)

M: (*paŝis antaŭ lin*) Ĉu vi foriru?

L: Ne!

M: Wang-ma (*la nomo de la servistino*), venigu la policanon !

S: Nu, s-ino!

M: Alvoku la policanon!

L: Kio koncernas la policanon? Li ankaŭ devas aŭskulti rezonadon.

S: S-ino, mi...

M: Mi ordonas ke vi venigu la policanon, ĉu vi aŭdis?— ĉu vi ne iros?

S: Jes. (*eliris tra la malantaŭa pordo*)

M: Tuj, rapide! (*eliris tra malantaŭa pordo kun brufermo de la pordo post si*)

L: (*senrimede. Palpe eligis tabaksakon kaj pipon, sed la tabakfolioj elĉerpiĝis. Prenis de leda teko*

tabakujon. Malfermis ĝin, plenigis la tabakujon, poste la pipon, ĝuste volonte ekfumi li aŭdis frapojn. Krudvoĉe) Eniru ! (*restis kun dorso al la pordo*)

N: (*puŝmalfermante la pordon, leĝere eniris. Kun pluvmantelo sur korpo, malgranda ledsako en unu mano, kaj ombrelo en alia mano. Enirinte la ĉambbron, ŝi ekparolis kvazaŭ nehaltigeble*) Aĥ, pardonu! Ekskuzu min !

(*La luanto rapide sin turnis, nur tiam li ekvidis, ke eniris tia homo.*)

N: Estas senĝentile, mi scias, sed mi ne havas alian rimedon. Via pordo ne estas fermita. Mi frapis

kelkfoje, sed neniuj respondis, do mi eniris.

L: (*Ankoraŭ kun kolero, sed ne forgesis demeti la pipon al la tablo*) Pro kio vi?

N: Mi? Mi venas labori al la Kompanio Dacheng. Ĝus de Pekino. Per trajno de la tria horo ptm. sed

atingis nur je la sesa. 90 lioj da veturado daŭris du kaj duonan horojn. jen! Nun mi devas trovi loĝejon. Ĉe stacidomo mi pridemandis kelkajn lokojn kaj mi jam vizitis tri aŭ kvar adresojn, sed neniuj taŭgas. Oni diris ke ĉi tie estas vaka ĉambro...

L: (*Trovis sin antaŭ rivalulino*) Aĥ, vi volas lui ĉambbron!

N: Jes. Ĉu la ĉambro ankoraŭ estas libera?

L: (*kun malmola koro*) Malfortunulo! La ĉambro estas luigita antaŭ momento.

N: Ha, malfortuno. Vere malfortuno por mi ! Tia vetero. Malbona kampa vojo. Rigardu, malsekiĝis mia vesto tutkorpe kaj laciĝis ambaŭ piedoj (*suspiris*) Ve, ĉu mi povus iom ripozi sur via seĝo?

L: Pardonu, sidiĝu! (*tute sen kolero*)

N: (*demetis sakon kaj ombrelon*) Dankon ! (*Eksidiĝis sur la seĝo apud la tetableto, rigardis ĉirkaŭen*)

L: (*ekinteresiĝis, sidiĝis sur la seĝo apud la tablo*) Ĵus vi diris ke vi venas labori al la Kompanio Dacheng, sed kio estas via ofico?— Aĥ, eble mi ne devas demandi.

N: Ne devas demandi? Kial? Tio ne estas sekreto. Antaŭ du semajnoj publikigis en ĵurnalo anonco ke oni volas dungu sekretarion. Tiu anonco ja aperis preskaŭ en ĉiuj ĵurnaloj kaj laŭ mia supozo, ankaŭ vi legis.

L: (*kapjesis*)

N: Lastavendrede, ili publikigis alian anoncon en ĵurnalo ke “la sekretario de nia kompanio jam estas dungita, kaj ni petas pardonon ke ni ne respondos al ĉiuj rekomendoj de la parencoj kaj amikoj”. Ĉu vi vidis la anoncon?

L: (*Rekapjesis*)

N: Tiu dungita sekretario estas mi. Ekster via imago, ĉu ?— Vi ne atendis, ke sekretario estas virino, ĉu?

L: Jes, vere.

N: (*fiere*) Sed nun, kion fari? Pensu por mi, postmorgaŭ mi jam laboros en la Kompanio. Sed ĝis nun mi ne trovis por mi la loĝejon. Ekde la duono post la sesa mi iradis, senĉese, por diri veron, mi eĉ nenion manĝis. (*stariĝis, iom ordigis sian veston, paŝis al la spegulo kaj rigardis*)

L: (*kun verŝajna simpatio*) Manĝis nenion? Kiel eble? Verŝajne je tio mi povas helpi al vi. (*stariĝis kaj verŝis tason da teo*)

N: Dankon! Mi nur diris, sed ne por tromp-akiri manĝaĵon.

L: Nu, pardonu!— Do, unue tason da teo!

N: Dankon! (*residiĝis*)

L: (*preninte el poŝo cigaredujon*) vi ne fumas?

N: Mi ne fumas. Sed mi ne oponas alies fumadon. (trinkis teon)

L: Dankon. (*reprenis cigaredujon. reprenis pipon. sinturnante por ekfumi*)

N: (*ekpalpis sian piedon*) Ho, ĉielo! rigardu, ĉu miaj piedoj ankoraŭ ŝajnas homaj...

L: (*rapide turnis sin*) Kio?

N: Ne nur akvo, sed eĉ koto eniĝis.

L: (*komplezeme*) Malbonege! Ĉu vi deziras ŝanĝi ŝtrumpojn? Se jes, mi povos iri eksteren.

N: Dankon. Mi ne ŝanĝos. Eĉ se jes, estas nenecese peli vin eksteren.

L: Ne grave, se vi ne kunportas, mi povas pruntedoni al vi paron da ŝtrumpoj.

N: Dankon pro via afablo. Sed kio utilas? Finfine mi iros en akvo.

L: Iros en akvo?— Kial iros en akvo?

N: Kion mi povus fari se ne iros en akvo? Tiel obskure, suririnte la straton, ĉu mi povus distingi akvon aŭ vojon?

L: (*iom pensis*)

N: (*denove trinkis. Veis. Stariĝis por adiaŭi*) Aĥ, pardonu pro mia ĝenado !
(*preninte siajn sakon kaj ombrelon, volas eliri*)

L: (haltigante) Momenton! Ne hastu!—Ĵus vi diris ke vi volas lui ĉambron , ĉu?

N: (*turni sian vizaĝon al li*) Kio? Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas kion mi diris?

L: Jes, mi komprenas. Sed... ve! Ĉu plaĉas al vi tiuj tri ĉambroj?

N: Kio? Ĵus vi diris ke ili jam estas ludonitaj, ĉu ne? (demetis sian sakon)

L: Jes, jam ludonita, sed eble oni povus transluiĝi al vi.

N: (*Ĝojiĝis*) Al mi? Vere? (*demetis la ombrelon*)

L: Nature, vere! (*reversis por ŝi tason da teo*)

N: (*sidigis. Akceptis teon*) Dankon. Sed kial al mi? Ĉu estas tiel, ke vi ne luigos al la alia homo se mi volas lui?

L: (*kapneis*)

N: Nu, alie vi ĵus mensogis. Ĉu la apartamento estas ankoraŭ ne ludonita?

L: Ne, mi diris la veron. La apartamento jam estis ludonita. Eĉ nun, ankaŭ ludonata al la sama luanto. Mia diro ke oni povas transluiĝi al vi, signifas tion, ke la luinto memvole transluiĝos al vi.

N: Mi ne komprenas. Kial tiu homo memvole transluiĝos al mi? Li eĉ neniam vidis min, kial volonte transluiĝos al mi?

L: Tio ne estas via afero.

N: Ĉu la domo estas fantomfrekventata?

L: Ho, ĉu vi timas fantomon?

N: Nu, mi ne timas. Mi konjektas ke eble tiu luanto timas fantomon.

L: Nu, ankaŭ tiu homo ne timas.— For la fantomon! Lasu nin rigardi la ĉambrojn, ĉu bone? (*deprenante lampon de la tablo kaj kondukas ŝin*) jen dormoĉambro (*malfermis pordon de la dekstra muro, lasis ŝin eniri*) kun pajla tegmento, cementa planko, moderna lito, pretaj litaĵoj. Ekster la fenestro estas malgranda ĝardeno, de frumatene aŭdiĝis birdkantoj. Tage sunradioj pleniĝis en la tuta ĉambro kun levigita kurteno.

(*La luanto retroiris. Li rekondukis ŝin al dekstra ĉambro.*)

L: Ĉi tie ankaŭ estas dormoĉambro kun litaĵoj kaj mebloj pretaj. Ampleksas same kiel la alia ĉambro, nur malpli hela. Se sola homo loĝas, ĉi tiu taŭgas kiel dormoĉambro kaj tiu— legoĉambro.

(*La luantino eliris*).

L: Kaj meze kiel salono, kie povas manĝi aŭ akcepti gastojn. (*demetinte la lampon*) La apartamento estas pura kaj hela. Aŭdiĝis neniu bruoj tuttage. Kaj, proksime de via oficejo. Ho, laŭ mia opinio, nenie vi povos trovi pli bonan.

N: Kiom da lupago entute por la tri ĉambroj? (*sidiĝis*)

L: Ho, sufiĉe malkara: nur kvin juanoj.

N: Vere, la ĉambroj ne estas malbonaj, ankaŭ la pago ne kara. (*post momento*) Ĉu oni vere povas transluigi al mi?

L: Kompreneble jes. Kial mi trompas vin ?

N: Tamen estas neeble, ke mi enloĝu jam ĉi-nokte, ĉu?

L: Jes, jes! (*kvazaŭ subite ekpensis ion*) Sed. momenton— ĉu vi geedziĝis?

N: (*eksaltis. Kun ŝveligita brusto kaj starigitaj brovoj*) Kio?

L: (*ripetfoje*) Ĉu vi geedziĝis?

N: (*ekkoleris*) Kiel sensenca demando!

L: Sensenca?

N: Absoluta ofendo!

L: (*Ĝojiĝis*) “Ofendo”. Ho jes, tute prave ankaŭ mi tiel diris. Sed nun la plej grava afero por la luiganto verŝajne estas tio, ke li volas scii antaŭ ĉio ĉu vi jam geedziĝis.

N: Je kio koncernas vin mia geedzeco?

L: Jes, tute prave. Je kio koncernas mia geedzeco ilin? Sed ili persiste demandis, ĉu vere strange?

N: Mi tute ne komprenas vin.

L: Kiu diris ke vi komprenas? Nature vi ne komprenas. Sed ne estu tro senpacienca. Mi diru al vi kaj vi tuj komprenos.— Ĵus vi diris, ke vi venas labori en la Kompanio Dacheng, ĉu ?...

N: Vere malbona memoro! Kial vi tiel rapide forĝesis ĵus diritan mian parolon?

L: Ne koleru. Mi nur volas sciiĝi al vi ke mi venas ankaŭ por labori en la Kompanio Dacheng.

N: Ankaŭ vi?

L: Jes. Ekster via atendo, ĉu?

N: Kio vi estas en Dacheng?

L: Inĝeniero.

N: Do vi ne estas la luiganto?

L: Kiu diris ke mi estas la luiganto? Ĉu mi diris? Ĉu mi aspektas la luiganto laŭ via opinio?

N: (konkure) Aĥ, mi komprenas! Vi estas luanto. Vi luis la apartamenton, sed nun vi opinias ĝin ne konvena kaj vi volas nuligi vian mendon.

L: Nuligi? Kiu diris ke mi volas nuligi?

N: Sed vi ĵus diris ke la apartamenton oni povas transluigi al mi, ĉu ne?

L: Jes, tion mi diris. Sed neniam pri nuligo.

N: Mi estas despli konfuzita. Kial vi konsentas transluigi se vi ne volas nuligi?

L: Ĉu vi vere ne komprenas?

N: Jes. Vere. (*sidigis*)

L: Ĉar— mi vidis ke vi... Nu, ne! Ĉar la mastrino ne konsentas luigi al mi.

N: Kial ne konsenti?

L: Aĥ, ĝuste pro la geedzeco. Nun ni revenas al la ĉefa temo. Antaŭ semajno mi vizitis ĉi tien kaj renkontis la fraŭlinon-luigantinon. Esploru ĉi demandis min longe pri tio ĉu mi havas patrinon aŭ infanon, aŭ gefratojn k.s., nur ĝis kiam mi klare sciigis al ŝi, ke mi estas fraŭla, ŝi sentis grandan kontenton kaj tuj konsentis luigi la apartamenton al mi eĉ ne menciinte pri la prezo.

N: Ĉu vi komprenas? Ŝi sciis ke vi estas inĝeniero. Ŝi deziras geedziĝi kun vi certe!

L: Ĉu vere? Tion mi ne imagis. —Hieraŭ posttagmeze, kiam mi venas ĉi tien, la s-ino mastrino sciigis al mi ke ŝi ne povas luigi la ĉambron al mi, se mi ne havas edzinon. Ŝi bone scias ke mi ne havas edzinon, tamen ŝi forpelas min per tiu ĉi preteksto. Kiel malice!

N: Kial ŝi ne luigas al homo sen edzino?

L: Mi ne scias. Ŝi diris ke neniu viro troviĝas en ŝia hejmo.

N: Ridinde.

L: Simple ofendo, ĉu?

N: Jes. — Kio poste?

L: Poste mi donis lecionon al ŝi.

N: Ĉu ŝi jam komprenis la rezonon?

L: Kompreni? Mi atentigu al vi, ke por homo pli ol 40-jara jam ne estas loko en lia cerbo por novaj rezonoj, ĉar la malnovaj jam ŝin plene okupas.

N: Sed nun, kion fari?

L: Nun? Nun mi ne foriru!

N: Sed ŝi?

L: Ŝi? Ŝi venigos la policanon.

N: Policanon? Kion li faros?

L: Min forpeli.

N: Ĉu vere?

L: Kial mi trompas vin? Se vi ne kredas, rigardu, baldaŭ venos la policano.

N: Tio estas vere interesa. Sed kion vi faros se la policano vere pelos vin?

L: Mi ne havas ideon antaŭ via alveno. Sed nun mi havas.

N: Kion?

L: Mi forte batos la policanon ke li arestu min al la policejo. La mastrino luigos la apartamenton al

vi. Tiel ni ambaŭ havas loĝejon.

N: Ne. (*iom pensis*)

L: Kial ne?

N: Vi ankoraŭ ne venĝis vin.— Hej, mi ekhavas ideon.

L: Kiun ideon?

N: (*post momento*) Mi estu via edzino, ĉu bone?

L: Kio?

N: Aĥ, ne timu tiel forte. Mi ne petas vian manon.

L: Aĥ, vi miskomprenas min— mi—mi— ĉar mi neniam pensis pri tio.

N: Tio estas la plej bona solvo. Ŝi rifuzis vin kun preteksto ke vi ne havas edzinon. Sed nun vi povas diri ke vi havas. Kion ŝi ankoraŭ povas diri?

L: Certe nenion. Sed— ĉu vi konsentas?

N: Kial ne? Kio domaĝas al vi?— ĉar fakte mi ne estas via edzino.

L: Aĥ, dankon!

N: Ne miskomprenu. Mi ne deziras ke mi havos domaĝon fariĝinte via edzino. Jen tuta alia afero.

L: Jes, tute alia afero. Tamen vi jam helpis min solvi la problemon de luigo. Mi devas danki vin.

N: Ba! Dankon. Subpremante de la burĝaro, proletoj devas unuiĝi por rezisti ilin. (*atente aŭskultante*)

L: Prave, prave.

N: Mi aŭdas parolon.

L: Certe la policano! (*urĝe*) Ve, sed kiel mi povas klarigi, ĉar mi ja diris ke mi ne havas edzinon.

N: Diru, ke ni kverelis, vi rifuĝis, ne dezirante ke aliaj tion sciu...

L: (*la policano jam venas al la pordo. Rapide kapbalancis, ke ŝi ne parolu*) Ŝŝ!

(*La luanto sidas ĉe la tablo ŝajnigante sin kolera. La luantino sidas ĉe la tetableto. La malantaŭa*

pordo estas puŝmalfermita, eniris policano kun ventrezista lampo en la mano. lin sekvas la servistino. Vidante virinon en la ĉambro, ili surpriziĝis. Vidante ilin, la

virino stariĝis foje kaj aĝable salutis ilin. La policano metis la lampon sur la tablon, salutis al al kolera s-ro.)

P: Ĉu mi povas scii vian familian nomon?

L: (*neĝentile*) Wu.

P: (*kapbalancis*) Nu.— kaj kie estas via hejmloko?

L: Hejmloko? Mi ne havas hejmlokon.

N: (*komencis kiel ofendita edzino*) Aĥ, vi decidis forlasi hejmon, ĉu?

P: (*rimarkinte la intervenantaron, al la s-ro*) Kia estas la familia nomo de ĉi tiu...

L: (*ne scipovas respondi. Ĵetis rigardon al la virino, kiu ankaŭ sentas embarason por li. Do li daŭrigis kiel kolera edzo*) Mi ne scias! Vi demandu al ŝi mem!

P: (*efektive turnis sin al ŝi*) Kia estas via familia nomo?

N: (*Ĝojege*) Mia?— ankaŭ Wu.

P: Aĥ, ankaŭ Wu.

N: Jes.

P: (*ne povante trovi alian parolon*) Do via hejmloko ...

N: Mia? Mi loĝas en la strateto Paco de Xisipailou (Ŝjisipajloŭ), Pekino, kontraŭ la Templo de Guan Yu, n-ro 375, mia telefonnumero estas 4692, (la okcidenta telefonejo)—Aĥ, notu ĝin, alie vi forgesos.

P: (*efektive prenis el ŝia poŝo notlibron*) Pekino...(skribis)

N: Strateto Paco de Xisipailou (*atendis, ke la policano skribu*), kontraŭ la Templo de Guan Yu.

P: n-ro?

N: 375, kaj telefonnumero 4-6-9-2, la okcidenta telefonejo.

P: (*finskribis*) Dankon. (*enmetis la notlibron en la poŝon, returnis sin al la luanto*) vi venas lui la ĉambrojn, ĉu?

L: Ne! Mi venas loĝi. La ĉambrojn mi luis jam delonge!

P: (*embarasite. Ne povante daŭrigi la parolon. Li ree turnis sin al la virino*) Vi venas por...

N: Mi? Mi venas por serĉi homon.

M: (*ne povas resti pacienca*) Kiu homon vi serĉas ĉi tie?

N: (*Ĝentile kapbalancis al ŝi*) Mi venas serĉi mian edzon.

M: Vian edzon? Kiu estas via edzo?

N: Mi opinias, ke vi scias— ĉar vi ja luigis la apartamenton al li, ĉu?

M: Kio? Tiu ĉi s-ro estas via edzo?

N: Mi ne scias. Vi demandu al li mem, rigardu, ĉu li konfesas?

S: (*ankaŭ ne povas resti pacienca*) S-ino! Kio okazas ! Mi jam delonge diris al vi ke tiu ĉi s-ro certe havas edzinon, sed vi ne kredas.

P: (*konfuziĝis*) Kio? Ĵus vi diris, ke tiu ĉi s-ro ne havas edzinon, sed, kiel li havas nun la edzinon?

S: Ne estu stulta! Antaŭ momento tiu ĉi s-ino ankoraŭ ne venis, kiel ni povus scii? Se tiu ĉi s-ino venis pli frue, mi ja evitis iradon en pluvo.

N: Pardonu. ne mia kulpo. Trajno de la 5-a horo, sed atingis nur je la sesa kaj duono.

S: Ne miskomprenu. Mi parolas pri li senprudenta.

P: Ho ni diru klare, via s-ino venigis min ĉi tien por tiu s-ro, kiu luis la tri ĉambrojn por loĝi sola,

ĉar nur virinoj loĝas ĉi tie, do lia enloĝiĝo iom ĝenas. Nun se la s-ino de ĉi tiu s-ro jam venas, la afero fariĝas facila. Se la s-ino loĝas ĉi tie kune kun la s-ro, do nenio koncernas min, se la s-ino ne loĝas ĉi tie, do mi...

S: Ne diru sensencaĵon. La s-ino kompreneble loĝas ĉi tie, —la afero estas tute klara — la s-ro kaj

s-ino iom kverelis pro bagatelo. Anstataŭ repacigo, vi diras tiel malprudentajn vortojn. Se ne ĉi tie,

kie loĝu la s-ino? — Nu, jam ne estas via afero. Rapide revenu al via maĝango-ludo (donis la lampon en lian manon) Iru ! Iru !

P: Do, jam ne estas mia afero. Bone. Ĝis revido, ĝis !

N: Ĝis. Estu trankvila. Mi sciiĝos al vi okaze de mia foriro.

P: Pardonu mian ĝenon. Pardonu !

(Eliris la policano. Ĝojege eliris la servistino kun kruĉo. Konfesis sian malsukceson, la mastrino-luigantino ĵetis rigardon al la geluantoj, ankaŭ eliris kun seka mieno)

L: *(Fermis la pordon. Ekmemorante demandon, kiun li jam delonge devis demandi, sed ĝis nun ankoraŭ ne demandis, li subite turnis sian kapon)* Aĥ, kia estas via familia nomo?

N: Mi— aĥ— aĥ— mi —

(Falas la kurteno.)



elĉinigiŝ **Guozhu** (1938-2020)

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



aŭtorino Rita Mkrtĉjan

Saluton, vojaĝantoj!

Aviadiloj, trajnoj, ŝipoj, maŝinoj...

Kial ni ŝatas "polvan odoron" de forveturo?

Ĉiu homo, sendepende de aĝo, ĉiam impetas al io nova, eĉ se malantaŭe restas ĉio kara, kutima, proksima.

Al ni ŝajnas, ke antaŭe atendas nin io mirakla, nekonata, eble ne tiel belega, sed... alia.

Ni postlasas ĉiutagan laboron, ŝatokupojn, niajn parencojn kaj, komenciĝas freneza rapideco ĉion sukcesi. Transformiĝo en nova homo okazas en momento, kiam ni eliras el la domo por forveturi.

Ĉiuj prizorgoj, malagrablecoj, adiaŭaj vortoj, konsiloj de la amikoj - ĉio degelas kiel griza malhelo, kiel nuboj, kiuj videblas tra fenestroj deflugilo. Kio okazos tie, en estonteco?

Ĉu novaj homoj, konatiĝo kun longe atendata heroo, ino, aŭ renkontiĝo kun novaj, malnovaj konatuloj. Ni ankoraŭ ne scias, sed ŝategas eniri ĉitium ĉiam novan, fremdan kaj samtempe konatan mondon. Povas ŝajni, ke ni laciĝas pro vojo, tamen ni laciĝas pro malpacienco de atendado.

La landoj, urboj, stratoj - ĉiuj lokoj, kiujn ni vizitas, post iu tempo ŝanĝiĝas, sed ni revas reveni en konatajn lokojn, eĉ se tie ni ĉiam estas fremduloj.

Survoje ni povas "naĝi" en feliĉo nur pro ies karesa rigardo, simpla bonvola vorto, renkonto kun interesaj homoj, liberiĝi, kaj pleniĝi je stranga agrabla varmo, de piedoj ĝis la kapo.

Post reveno, ĉiuj malfacilaĵoj, malagrablaĵoj (se ili estis), iĝas bagatelojn, - aliiĝas en io portempa, tute ne grava.

Sed el ĉiuj detaloj, bagateloj konsistas nia vivo, kaj post la vojoj, la vivo ŝajnas pli interesa, pli signifoplena.

La vojoj neniam restas en pasinteco, ĉar povas alvoki denove, ĉio povas ripetiĝi (eble ne ĉio), sed, flueto de freŝa aero, kiun promesas la vojo, povas denove ĝojigi nin, eĉ se tio daŭros nur momenton.

Ĉiuj vojoj, kiuj veturigas nin al konataj, aŭ nekonataj lokoj, landoj, ne lacigas nin, ni laciĝas pro ne ĉiam plenumbla espero ekĝui novajn sentojn.

Oni ne scias, ĉu ekzistas la monumento al vojaĝanto, se ne estas, mi nepre

konstruus, ĉar ni estas vojaĝantoj, eĉ se ne vojaĝas, ni konstante revas pri la aventuroj, pri novaj vojaĝoj, rememoras malnovajn.

Nia cerbo ne akceptas penson, ke ni, ekzemple, jam ne ekpovos lasi hejmon. Preskaŭ ĉiu homo vojaĝas ĉiam- en pensoj, en sonĝoj, en revoj...

Vojo, mallonga, aŭ longa, ne gravas, se ĝi ĉiam alvokas nin, ĉitio signifas, ke ni ekzistas, vivas.

La vojoj povas esti diversaj, sed por ĉiu vojaĝanto plej bona vojo estas tiu, kiu ĉiam atendas lin, atendas, bonvenigas kaj... neniam adiaŭas!

La trajno el infaneco

Kiel oni diras, ĉio en nia vivo estas ligita kun iu rememoro, estu lando, urbo, homo, kanto, eĉ la nomo, aŭ aromo de floroj.

Kompreneble, se ĉi-tio restis en "lando", kiun ni nomas Pasinteco. Ĉi-tiuj modestaj belaj floroj, kiujn jam tre ofte ni ekvidas en stratoj, en ĝardenoj, en kortoj, estis kaj estas saluto el mia infaneco.

Kiam ni, per trajno veturadis somere en Patrujon de mia patrino, en stacidomo mi unuan fojon eksentis ĉarman aromon de "nokta belulino" (ĝi estis nomo de la floroj).

Poste, la florojn plantis mia patrino, kaj dum la vesperoj mi admiris pri tiel konataj karaj diverskoloraj "ĉapeletoj".

Trapasis tempoj, vivoj, ŝanĝiĝis landoj, urboj, loĝejoj, sed pakajo de la rememoroj ĉiam estas kun ni.

Nun estas ebleco planti florojn, pri kiuj ni eĉ ne aŭdis antaŭe, kaj en nia urbo ni vidas florojn, kiuj ĝis tio renkontis nur en ekzotikaj landoj.

Kaj mi, kiel iam mia patrino, provis planti la semojn de "Mirabilis" en mia balkono.

Mi ne sciis, ĉu la floroj kreskos en florpotoj aŭ ne.

Sed, verŝajne miaj rememoroj havas fortajn "radikojn".

Jam ne ekzistas la stacidomo, ne ekzistas la trajno kun memorinda direkto, tamen...restis aromo, aromo de mia kara infaneco.

Pri TEATRO

Malvarmo kaj... dankema memoro.

Estis 1995-96 jaroj.

La vivo en nia lando iomete "paŝadis" al normala stato.

Jam ne estis kartetoj por la pano, la lumo "revenis" en la domojn de loĝantoj, kvankam ofte ripetiĝis elŝaltado de elektro. Pri gaso, loĝantoj nur revis, ĉar vivis sen ĝi jam 5 - 6 jaroj.

Tamen niaj rememoroj estas ne pri terura tempo en vivo de nia lando, sed pri la TEATRO.

Kiam la vivo komencis pli ordiĝi, ankaŭ reviviĝis kultura vivo en la lando.

La TEATRO ĉiam estis por mi la fenestro al magia mondo, la mondo, kie dum unu horo ĉiu spektanto "eniras" en ion iluzian, ion belegan.

En teatra halo estis tre malvarme, ĉiuj sidis en manteloj (eble estis frua printempo), sed aktoroj sur la scenejo ŝajnas ne senti malvarmon.



Ni eĉ memoras la spektaklon, estis gaja komedia spektaklo.

Sur miaj genuoj sidis mia filino, kaj mi provis varmigi ŝin, (ŝi laŭte ridis dum la ridigaj momentoj, eĉ ne ĉion komprenante), ordigas la mantelon, per kiu kovris ankaŭ ŝin.

Subite la halo kaj scenejo mallumiĝis, estis laŭvica elŝalto de lumo.

Nek iu el spektantoj ekstaris, eliris. Ĉiuj atendis daŭrigon, kiam ĉio ordiĝos.

Mi memoras, ke sur scenejo aperis ĉefa reĝisoro de la teatro kun kandelo, kaj ekkantadis melodion de la spektaklo.

Ĉio estis, kiel devis esti, kaj vivo sur scenejo, kaj la vivo ekstere.

Post 30 minutoj aŭ pli, la spektaklo daŭriĝis (oni enŝaltis la lumon per aŭtonoma elektrogenatoro).

Jen, el kio, el kiuj neforgeseblaj momentoj konsistas nia vivo, en kiu TEATRO certe havas apartan lokon.

Homoj kaj bestoj

Kial nuntempe ni ĉiuj pli proksimas al hejmaj bestoj? Ne, mi ne pravas, estas homoj, kiuj ĉiam prizorgas kaj helpadas al senhejmaj bestoj. Ili ne povas vivi alimaniere. Ili povas esti tre okupitaj, havi laboron, diversajn respondecojn, ŝatokupojn, sed ĉiam trovi tempon por helpi al niaj" fratetoj".

"Ni respondecas pri tiuj, kiujn malsovaĝigis." - fama frazo, kiun scias ĉiuj.

Jam pasis unu semajno, kiam sendormeco pli atakas, ĉifoje pro la hundo, kiun eksterigis el nia korto la servistoj, kiuj respondecas pri defendado de murdantaj hundoj. Iu el homoj turnis sin al ili(iu, kiu ne ŝatas hundojn), kaj ili faris sian laboron.

Ni telefonas kaj skribas ĉiutage(rete) al ili, ankaŭ nia amikino (esperantistino) skribis artikolon en landa ĵurnalo pri la okazaĵo. Hundo estas tre obeema, saĝa, donas manon, kiam iu petas, ĉion komprenas.

Inter multaj hundoj, kiujn ni prizorgas, ĝi estas plej bona.

Mi pensis, ke la problemo ekzistas nur en nia lando, sed,kiel okazis, sama situacio estas en multaj landoj.

ofte ni diras, ke homo pli gravas, pripensu pri homoj, sed ni ne devas forgesi, ke la bestoj pli beligas nian vivon kaj povas iĝi pli bona amiko, ol la homoj, ankaŭ de ni, homoj, ili atendas la helpon, amon.

Kiel finiĝos la historio, neniu scias, ni esperas, ke revenigos nian Betti-n.

Ĉu vere, ke en Nov-Jorka zoologia ĝardeno sur la muro estas pendigita la spegulo, kaj supren videblas la skribaĵo- " La plej danĝera besto en la mondo".

Eble, jes!

Pripensoj

Ĉiutage ŝi pripensis, ke necese ŝanĝi vivmanieron, forlasi virtualan mondon, interreton, almenaŭ uzi ĝin pli mallongan tempon, kaj reveni al libra mondo. Jes, la libroj estas atingeblaj en la reto, kie ĉiu povas trovi kaj tralegi ĉion, kion deziras. En pasinta tempo neniu imagis similan eblecon.

Sed hodiaŭ matene, ŝian rigardon altiris libroj el libroŝranko - ege karaj, amataj, malnovaj kaj novaj. La libroj aspektis solaj kaj forlasitaj, ili ŝajnas flustri - Kial vi perfidis nin? Ŝi prenis unu el amataj libroj kaj malfermis ĝin. Inter paĝoj ŝi ekvidis sekitan floreton. Ĉi-tiu bona (aŭ malbona) kutimo restis de infaneco, kiam en multajn librojn ŝi enmetadis folietojn, floretojn, verŝajne por pli longigi la vivon de kreskaĵoj, aŭ por iamaniere danki la libron. Nun tiu-ĉi seka floreto montris, kiel ŝanĝiĝis la vivo. Progreso, ŝajne, sekigis niajn animojn, kvankam ĉiuj homoj iĝis

pli evoluintaj, eruditaj, spertaj, "ĉiopovaj".

Ĉi-tio ne estas malbona, sed kio pli proksimas al ili - tiu, preskaŭ forgesita, aŭ nuna mondo? La demando ne estas Ŝekspira, sed same restis sen respondo. Ŝi fermis la libron, kie restisb "silueto" de viola floreto, "silueto" de ĉiuj pripensoj, revoj kaj esperoj.

Kiel vi fartas?

Estas frazo, kiun ni uzas pli multe ol alia.

En ĉiuj lingvoj ni uzas la saman frazon: "Kiel vi fartas?"

Kion ni atendas ekaŭdi? Eble kutiman respondon,

-Dankon, bone.

Aŭ ni atendas, ke konatulo, aŭ amiko komencos rakonti pri ĉiuj siaj problemoj, malsanoj, familiaj malfacilaĵoj k.t.p. Certe ni tion ne volas, por ni sufiĉas niaj problemoj.

Iam unu amiko rakontis, ke oni neniam uzas ĉi-tiun frazon, ĉar post demando, ĉe li aperadas kapdoloro pro fremdaj "novaĵoj".

Tamen, samtempe, ni povas diri, ke sincere interesiĝas pri la sanstato, pri tio, kiel sukcesas diversaj aferoj de la homo, kun kiu ni parolas.

Kompreneble havaas signifon la grado de amikaj rilatoj, ĉar demandi ĉe novekonatulo kiel li fartas, estas iomete strange.

Ofte ni demandas, por montri nian intereson al la homo: "Ĉu ĉio estas en ordo?"

Sed, samtempe, iu povas respondi: "Ne, ne ĉio."

Mi havas amikinin, kiu demandas kaj preskaŭ mem respondas: "Ĉu ĉio bonordas, vi bone aspektas, mi ĝojas".

De unu flanko ŝi liberigas min de la rakonto pri io, de la dua - mi ne komprenas, kial ŝi demandas, se ŝi ne deziras aŭdi la respondon.

Ni ankaŭ demandas niajn konatulojn, kiel ili fartas, se ni scias pri iuj okazaĵoj en la lando, en familio (se scias) kaj ili komprenas, ke ni ne simple demandas (nur por demandoj), ni volas subteni ilin, almenaŭ per varmaj vortoj.

Ni povas "paroli" longe pri tio, ke ĉio, ĉiu interparolo povas esti agrabla por unu, kaj senutila aŭ malagrabla por alia.

Sed, se forĵeti ĉiujn "detalojn", la frazo - "Kiel vi fartas" - estas kutima por niaj oretoj, kontentas ni aŭ ne, kaj ankaŭ havas bonan "kernon" en la senco - atendon de la respondo - "Bone".

De ĉi-tiuj respondoj ni vere pliboniĝas, ĉar, se homo fartas bone (eĉ se ne diras ĉion), tio signifas, ke li (ŝi) intencas esti bone!

Fartu bone, karaj samideanoj!

Rafael Henrique Zerbeto (Brazilo)



aŭtoro, Rafael Henrique Zerbeto

Printempa Festo en Ĉinio, karnavalo en Brazilo

La unua Printempa Festo post mia transloĝiĝo al Ĉinio okazis samtempe kun karnavalo en Brazilo. La datoj de tiuj du festoj sekvas lunan kalendaron, sed ne la saman. Tio okazas, ĉar Printempa Festo, kiel antikva tradicia festo de Ĉinio, sekvas tradician ĉinan kalendaron, dum Karnavalo dependas de Pasko: katolika eklezio kalkulas la daton de Pasko - kiam katolikoj celebras la renaskiĝon de Kristo - surbaze de la fazoj de la luno. Sekve oni retrokalkulas sep dimanĉojn por trovi la daton de karnavala dimanĉo.



*Koncerto en Templu Foiro dum la Printempa Festo en Pekino: Samkiel karnavalo,
la Printempa Festo estas plena de muziko kaj ĝojo.*

Printempa Festo estas konata en multaj landoj kiel Ĉina Novjaro. Tiu vortumo

estas misgvida, ĉar fakte Novjaro rilatas nur al la unua tago de la jaro, ne al la tuta festo. Printempa Festo daŭras longan tempon: ĉinoj purigas siajn domojn, kuiras por familia kunmanĝo, gluas versparojn kaj aliajn ornamaĵojn sur pordoj kaj fenestroj, vizitas aliajn homojn por bondeziri... Malantaŭ la festo estas kompleksa aro da tradicioj kaj ritoj, kiuj esprimas la saĝecon kaj la esencajn valorojn de ĉina kulturo.

Ankaŭ Karnavalo iusence esprimas multon de la brazila kulturo. La festo kutime komenciĝas vendrede (en kelkaj urboj oni ekfestas jaŭde) kaj daŭras ĝis merkredo, konata kiel Cindra Merkredo, kiu markas la komencon de Karesmo, periodo de fasto por kristanoj antaŭ Pasko.

Onidire la origino de la Karnavalo estas antikva kutimo drinkadi, manĝi multe da viando kaj multe amuziĝi, ĉar tion oni ne povas fari dum Kvaresmo. En malsamaj regionoj de Brazilo kreiĝis malsamaj muzikstiloj kaj tradicioj ĉirkaŭ tiu festo, sed la plej popularaj estas surstrataj paradoj dum kiuj muzikistoj kaj dancistoj sin prezentas.



Homoj amuziĝas surstrate dum karnavalo 2016, en mia devenurbo.

Alivorte, Printempa Festo estas celebrata tutlande laŭ la sama maniero, dum en Brazilo estas regionaj kutimoj pri Karnavalo, tiel ke Karnavalo en Rio-de-Ĵanejro, Salvador aŭ Recife estas tre malsamaj spertoj. Alia esenca diferenco inter ambaŭ festoj estas la fakto, ke Printempan Feston oni celebras hejme kun familianoj, dum Karnavalo estas festata kun amaso da homoj, surstrate aŭ en salono.

Sed ankaŭ estas similaĵoj inter ambaŭ festoj: en ambaŭ okazoj, tamburado kaj artfajraĵoj estas kutimaj, kaj dum la stratoj de ĉinaj urboj estas bele ornamitaj de lanternoj, la ĉefaj stratoj de brazilaj urboj ankaŭ ricevas belan dekoracion.

La lasta fojo kiam Karnavalo koincidis kun Printempa Festo estis en 2016. Tiam estis ankaŭ la lasta fojo kiam mi vizitis Brazilon dum Karnavalo, kaj ankaŭ mia lasta Karnavalo kun miaj gepatroj. Mia patrino ĉiam ŝategis Karnavalon kaj de mia infaneco ni ĉiam iris kune al karnavalparadoj. Mia patro, malpli entuziasma pri dancado, kutimis resti flanke por nur spekti.

Ankaŭ mia avino ŝategis Karnavalon, sed post atingi certan aĝon ŝi ekevitis iri al amasfestoj pro la risko fali aŭ pro malfacilo trovi lokon por sidigi, sed ŝatis danci karnavalan muzikon hejme dum karnavalaj tagoj.

Dum mia infaneco, ankaŭ dum Karnavalo estis multaj parencoj en mia hejmo, ĉar la karnavalo en mia devenurbo estis tre bona kaj ĉiuj volis pasigi Karnavalon tie. Por mi Karnavalo ĉiam estis okazo por festi kun familianoj, malgraŭ ke ĝi ne estas familia festo kaj multaj homoj preferas turismi dum Karnavalo por koni aliajn lokojn kaj sperti aliajn manierojn festi ĝin.

En 2019, mi vizitis mian devenurbon dum Printempa Festo, kaj Karnavalo okazis la semajnon post mia reveno al Ĉinio, do mi maltrafis ĝin, sed dum mia restado en la urbo okazis bonega antaŭkarnavala festo, dum kiu raportisto de brazila televidprogramo intervjuis mian patron. Tiu intervjuo estas la lasta filmajo pri li. Post kelkaj monatoj li forpasis.

Ĉijare mia devenurbo celebras sian 200-jariĝon, kaj dum almenaŭ duono de tiu tempo mia familio estis parto de la urba historio. En la epoko de miaj praaĵoj, ĝi estis prospera urbo rapide disvolviĝanta. Nuntempe ĝia ekonomio stagnas, ĝiaj junuloj migras al aliaj lokoj, dum emerituloj el grandaj urboj transloĝiĝas tien en serĉado de trankvileco.

Antaŭe mi konis ĉiujn en mia devenurbo, sed lastfoje plejparto de la homoj surstrate estis fremdaj al mi. Dum vizito al tombejo, tamen, mi konstatis la malon: mi rekonis nomojn de multaj entonbigitoj kun kiuj mi kunvivis, homoj de la generacioj de miaj gepatroj kaj geavoj. Mia iama hejmloko fariĝis fremda al mi, dum Pekino fariĝis mia nova hejmo. Eble tio respondas la demandon kiun mi foje aŭdas de kelkaj eksterlandanoj, pri kial mi emas resti porĉiame, dum ili faras planojn por vivi eksterlande en estonteco.

En 2016, mi festis Karnavalon kun iom da bedaŭro pro mia neeblo celebri Printempan Feston en Ĉinio, ĉar tiu estis mia unua ŝanco tion fari. Nuntempe mi povas diri, ke mi sufiĉe spertis Karnavalon kun familio, mankas sperti ĝin kiel turisto. Kaj mi sufiĉe spertis Printempan Feston kiel turisto, mankas sperti ĝin kun familio.

el EPC

Vejdo (Ĉinio)



aŭtoro Vejdo (Ĉinio)

Historiaj punktoj de ĉinesko

En junio de 1973, aperis en la n-ro 2 de la mimeografita revuo *El Ĉinaj Esperantistoj* 4 poemoj verkitaj de s-ro Hu Guozhu laŭ ĉina fiksforma poemo *Sopir-al-Sudo*, kaj post ĉirkaŭ dek jaroj li publikigis la libron *Esperanta Metriko*, en kiu troviĝas aliaj du poemoj ankaŭ laŭ ĉina fiksforma poemo *Sopir-al-sudo*:

1	2
Ĉu fajro	En pluvet'
sovaĝa povas	dorse sur azen'
forleki herbojn ? Ho ne !	veturnte la poet'
Jen vent' printempa blovas	lulis sin per rava tem'
kaj herb' jam novas!	taŭga poe poem'.

Ĉi tiuj du poemoj, laŭ la eldiro de s-ro Hu Guozhu, estas la samplaj de *Sopir-al-sudo* en Esperanta vesto. Li difinis la skemon de tiaspeca poemo: kvin versoj de 35,77,5 silaboj kun rimaranĝo xa,x,a,a (x=senrima). Tio fakte markas la unuan paŝon de enkondukado de ĉinaj fiksformaj poemoj. Kiel sciante, Ĉinio estas lando riĉa je poemoj. La historio de ĉina poezio povas retrospurigi al la 11-a jarcento A. D., kiam skribitaj poemoj jam troviĝis. Ekde tiam la ĉina poezio travivis dekelkajn dinastiojn daŭrantaj pli ol tri mil jarojn ĝis nun. Kiam temas pri ĉinesko, oni devas paroli pri *Ci*, grava branĉo de ĉina antikva poezio, ĉar ĉinesko fakte estas esperantigo de *Ci* preskaŭ en ĉiuj flankoj. *Ci* havas historion de ĉirkaŭ

1300 jaroj. Kun tempopaso, ĝi plene disvolviĝis kaj iom post iom formiĝis pli ol du mil skemoj. Ĝis nuna tempo multe da homoj ankoraŭ emas verki per tiuj skemoj. La trajtoj de *Ci* konsistas el nombro de verslinioj, nombro de silaboj en ĉiu verslinio, rimado kaj tonado de ĉiuj ĉinaj ideogramoj (ekzemple: mā má mǎ mà). Kompreneble tiuj trajtoj iel katenas la penson de verkantoj, tial kelkaj proponas reformadon de *Ci* en moderna ĉinlingvo, i.a. ili forigas tonadon de ĉinaj ideogramoj. Ŝajnas, ke la reformita *Ci* ankoraŭ konservas sian belecon en sonoj kaj formo. Koincide estas, ke, en sia libro *Esperanta Metriko*, s-ro Guozhu, kiu estas la iniciatinto de ĉinesko, enkondukis la koncepton de *Ci* en Esperanta vesto, kaj forigas ankaŭ tonadon de ĉinaj ideogramoj, ĉar en Esperanto mankas tonado de vortoj.

S-ro Hu Guozhu elektis nur eble la plej karakterizan parton de la ĉina poezio — *ci*-poemojn — kiel sian temon de enkondukado en Esperanton. *Ci*-poemoj prosperis ĉefe en Song-dinastio de Ĉinio kaj prezentiĝis en multaj skemoj (melodioj). Laŭ pli-malpli aŭtoritata kalkulo, tiaj skemoj nombriĝas je pli ol 2000. Pro tio li opciis komence 81 skemojn por unuaj provoj. Tamen kiel doni al tiuj skemoj unuecan nomon restis problemo. Hu ekpensis pri Edwin de Kock, la fama sudafrika Esperanta poeto, kiu publikigis poemaron *Saluton al la Suno* en 1983. En la poemaro troviĝas poemo kun la titolo *Ĉinesko*, en kiu li imitis la stilon de la unuaj du versoj de ĉina antikva poemo, kvankam li ne konis la ĉinan lingvon:

De kiam vi, sinjor' foriris,
lantnube trajtigis vizaĝoj;
kaj flirtas, oldaj kvazaŭ koro,
komodspegule albumpaĝoj..

Pro tio Hu prenis “ĉineskon” kiel la konuman nomon aludantan al tiuj skemoj de si elektitaj.

Ĉar en ĉina poezio estas diversaj formoj, kiaj kvar-ideogramaj, kvin-ideogramaj, sep-ideogramaj, metrikaj kvin-ideogramaj, metrikaj sep-ideogramaj, *ci*-poemoj k. a., “ĉinesko”, uzita por speciale aludi al tiuj skemoj de *ci*-poemoj, estas tre trafa vorto. Kiam s-ro Hu kavis la planon de enkonduko de ĉineskoj, Ĉinio ankoraŭ restis en tempdaŭro de Granda Kultura Revolucio, dum kiu oni ne kuraĝis laŭvole eligis malsaman voĉon. Ĝis 1990, kiam *Penseo*, ĉina mimeografita beletra monat-revuetto debutis, ĉineskoj trovis la ŝancon por evolui. En la unua numero de *Penseo* (1990) oni povas trovi 4 ĉinesk-poemojn. Ekde la unua numero ĝis hodiaŭa 388-a numero aperadas senĉese ĉinesk-poemoj en *Penseo*.

Dum la pionira periodo la kreado de ĉineskoj nur dependis de dekelkelkaj veteranaj kaj fervoraj esperantistoj, inkluzive de kelkaj neĉinoj, kiaj Kris Long (Britujo), Meva Maron kaj S. Asta (Svedio). Tiama entreprenado estis malfacila, sed sukcesplena. Kiam William Auld legis kelkajn pecojn de ĉinesko *Tiaoxiaoling* (Flirta kanto) en la unua numero de *Penseo*, li laŭde skribis en letero: “Aparte mirigas la poemformo *Tiaoxiaoling*, kun ties kvar elstare sukcesaj ekzemploj. Kiel la poetoj ŝatas turmenti sin, ligante sin per ĉiam pli striktaj katenoj! Mi ne konas pli rigoran formon ol *Tiaoxiaoling*! Gratulon vere sinceran al Guozhu kaj Lu Jixin.”

Mi citu ekzemplon jene:

Kris Long:

—laŭ ĉinesko <i>Tiaoxiaoling</i> (Flirta kanto) ¹	
Ŝtona, ŝtona	vastan, vastan
strand' Brajton-betona:	marsurfacon plastan!
rubo, ne marstelo,	Polietilena
ladskatol', botelo	sako, pako ĝena;
...lote, lote	naĝe, naĝe
glutas gorĝ' pilote	sen kuraĝ', enkaĝe.

Laŭ la priskribo de skemo, por verki pecon de *Tiaoxiaoling* oni devas cerbumi multe, precipe por serĉi paron da vortoj palindromitaj. Estas vere malfacile! Sed estas gratulinde, ke de 1990 ĝis 1999 oni aperigis en *Penseo* ĉirkaŭ 200 ĉineskajn poemojn. Tamen post 1999 preskaŭ neniu verkis ĉineskaĵojn plu.

La nova turnopunkto aperis en 2006. Pro tio, ke interreto estis pli vaste utiligata kaj pli da multaj ĉinaj esperantistoj uzis interreton kiel novan propagandilon pri Esperanto, la ĉinaj esperantistoj akiris pli multajn ŝancojn por kontaktiĝi inter si kaj kun alilandaj kolegoj. En Ĉinio, krom oficialaj retejoj, kiaj *El Popola Ĉinio* kaj *Radio Internacio* (en Esperanto), la plej elstara retejo funkciigita de individua esperantisto estas Elerno (www.elermo.cn), kiu entenas preskaŭ ĉiujn sektorojn pri Esperantaj movado, lernado, studado, aŭskultado, paroligo, tradukado, literaturo kaj esperantologio. Escepte de tiuj rubrikaj troviĝas grava parto — *forumo*, kie oni povas libere eligi siajn opiniojn pri propagando kaj disvolvado de Esperanto. S-ro Hu Guozhu, invitite de la retejo kiel honorinda gasto, ekposedis specialan spacon de afiŝoj. Tie li lanĉis alian ondon de kreado de ĉineskaj poemoj. Kaj samtempe, pro lia kuraĝigo, la retejo aranĝis rubrikon “Kreado de Ĉinesko” por ricevi afiŝojn de ĉineskaj poemoj. Fakte la aktivecoj de kreado de ĉineskaj poemoj atingis novan kulminon post 1999. Ĝis 2018 la kvanto de afiŝoj de ĉineskaĵoj jam atingis 1500 pecojn, multe pli ol la antaŭaj 200. Kaj samtempe oni formis grupon de ĉineskaĵo en la franca retejo Ipernity² kaj varbis neĉinajn verkantojn de ĉineskaĵoj, kio rikoltis bonan rezulton. Cindy Mckee (Usono), Imre Szabo (Hungario), Helena Tylipska (Italio), Hans-Georg Kaiser (Germanio), Jadranka Miric (Serbio), Hannes Van Loggerenberg (Nederlando), Nomus Nimbus (Svislando), Erzsebet Tuboly (Hungario), Kvantumo (Italio), Siv Burell (Svedio), Josep V. (Katalunio), Catherine B. Krause (Nederlando), Rebeka Senfamilia (Usono) kaj Luiza Carol (Israelo) prezentis siajn ĉineskaĵojn. Inter ili Cindy Mckee estas la plej fekunda ĉineskistino kaj produktis pli ol cent pecojn, kaj Jadranka Miric ankaŭ tre aktivas ĝis nun en verkado de ĉineskaĵoj kaj ŝi jam produktis pli ol cent pecojn. Ili ambaŭ publikigis sian poemaron de ĉineskaĵoj, *Cindy Mckee Ĉineskas*³ kaj *Jadranka Miric Ĉineskas*⁴ respektive. Ĉineskaĵoj de Cindy aspektas mature kaj rafinite, kaj ŝi eĉ prezentis ĉineakĵon en anglalingva vesto (Kia kreaĵo!):

Cindy Mckee (Usono)

Bezono de seneco

—laŭ ĉinesko Pusaman⁵

Mi staras negative
samloke, relative
Atomoj dancas
de mi distancas

Mi ĉion manifestas
ne io-eco estas
sen mia sed-o
kaj sena knedo

Anglalingva versio:

My Lack is Needed
—in the tradition of *Ci*, form Pusaman (Buddhist Dancer)
I stand in negative space
it is my usual place
atoms dance elsewhere
forming in live air

Everything needs me
somethingness can't be
without void me-swarm
Lack of form shapes form

Evidente, de 1990 ĝis 2018, evoluado de ĉineska kreado povas esti dividita en du etapojn. En la pionira etapo la nombro de verkintoj kaj tiu de ĉineskaj poemoj estas multe malpli grandaj ol en la dua etapo. Enhave la ĉineskaĵoj en la unua etapo ĉefe fokusiĝis sur individuaj pejzaĝoj, personoj kaj sentoj, dum tiuj en la dua etapo, krom tiuj trajtoj, jam koncentriĝas sur priskribado de rakontoj kaj okazintaĵoj, kaj ĝenerale plilongiĝas, utiligante pli da skemoj. Vejdo, unu el la plej aktivaj ĉineskistoj, eĉ adaptis ĉineske la tutan libron *Ezopa Saĝo* far K. Kalocsay, en kiu li uzis 55 malsamajn skemojn por ĉineskigi la 77 originalajn poemojn. Li ankaŭ adaptis kelkajn rakontojn el fabeloj de Andersen, Grimm k. a., kiaj *Novaj vestoj de l' reĝo*, *Knabinetoj kun alumetoj*, *Reĝidino sur pizo*, *Ruĝa ĉapeleto*, *Cindrulino*. Tiuj longaj ĉineskaĵoj multe altigas la valoron de ĉineskoj.

En decembro de 2007, kadre de la sepa ĉina Esperanto-Kongreso, okazis la unua seminario pri ĉinesko en Kantono. En la seminario oni okazigis la premieran disdonadon de kvin librojn *Ŝlosilo de Ĉinesko (Guozhu)*, *300 Sopir-al-sudoj, Ezopa Saĝo (Vejdo)*, *Sekretaj Ĉineskoj (Lily)*, *Ĉineskoj (1973-2007.11)*, kiuj estis speciale preparitaj de Kantona Esperanto-Asocio por la seminario. Tiuj libroj fakte estas la fruktoj de kreado kaj studado de ĉineskoj dum la tempdaŭro de 1973 ĝis 2007. Kaj s-ro Guozhu kaj Vejdo faris prelegojn pri kreado kaj evoluado de ĉineskoj kaj ĉirkaŭ 30 ĉeestantoj, inkluzive de ĉineskistoj, diskutis pri rilataj problemoj en varma etoso. La seminario donis movforton al postaj disvastigo kaj propagando de ĉineskoj.

En la jarkunveno de Osiek okazigita en Wuhan, Ĉinio en aprilo de 2011,

Vejdo faris prelegon pri ĉinesko sub la titolo *Ĉinesko el Ĉina Saĝo*. Li lumbilde prezentis detale difinon, estetikajn valorojn, esprimivecon, disvolvadon kaj perspektivon de ĉineskoj per riĉaj ekzemploj. Pri la esprimiveco kaj estetikaj valoroj de ĉineskoj la preleganto faris detalan traktadon. Kiel alispecaj poemoj, ĉineskaj poemoj ankaŭ povas esprimi libere momentajn sentojn, pensojn kaj naturajn fenomenojn. Krome, oni povas trovi fablojn, fabelojn kaj rakontojn verkitajn per ĉineskaj versoj. La esprimiveco de ĉineskaj poemoj ankaŭ videblas en adaptado de aliformaj poemoj. La plej rimarkinda kontribuo estas adaptado de “Ezopa Saĝo” verkita de K. Kalocsay. Vejdo adaptis la tutan libron per diversspecaj skemoj de ĉineskoj. Tio almenaŭ manifestas, ke ĉineskaj poemoj povas esprimi la samajn eventojn kaj sentojn kiel alispecaj poemoj. Inter tiuj adaptitaj poemoj troviĝas la plej longa ĉineska poemo *Ezopo* adaptita de Vejdo el *Ezopa Saĝo* entenas 176 pecojn de la ĉineska skemo *Sopir-al-sudo*, entute 850 versojn. Tio signifas, ke ĉinesko povas rakonti anekdotojn kaj historietojn, ĉu longajn ĉu mallongajn.

Aliflanke ĉineskaj poemoj ankaŭ povas bone prezenti samajn ideojn de alispecaj poemoj per delikataj tuŝoj. La interesa ekzemplo estas la esperantaj tradukoj de irlanda poeto de Yeats *When you are old*. Oni elangligis tiun poemon per du skemoj de ĉinesko *Sopir-al-sudo* kaj *Qinyuanchun* respektive kaj fidele prezentis la saman senton de la poeto.

William Butler Yeats (1865~1939)⁶

Kiam Vi Oldos
— laŭ ĉinesko sopir-al-sudo
kiam vi
oldos en futur’
plenplena je grizo kaj
dormemo sen ajn plezur’
kapklinante nur

ĉe fajro
legu bonvole
ĉi libron de poemar’
lante kaj senparole
legu senfole

prisonĝu
ekrigardojn de
via pasinteco kaj
profundan ombraron ĉe
la okulmuze’
.....

Kiam Vi Oldos
—laŭ ĉinesko Qinyuanchun

I.
 kiam oldos
 vi grizeta
 kun dormem-plen'
 kapklinemante
 ĉe la fajro
 ĉi libreton
 per la manpren'
 legu lante
 kaj prisonĝu
 la intan rigardon sen
 malĝojo
 kaj densajn ombrojn
 profundajn en

Kaj kelkaj skemoj de ĉinesko helpas esprimi diversajn tonojn (tristan, ĝojan, sarkasman k.a.). Mi nur citu du ekzemplojn:

Guozhu (Ĉinio)

AMO
 —laŭ ĉinesko Chaitoufeng
 Dolĉa am',
 juna flam'
 lulis nin feliĉa gam'.
 Ni ja tre
 dubis ke
 kiuj folis
 pli ol ni ge?
 Ne,
 ne,
 ne!

Kurta am'
 pasis jam.
 Estingiĝis juna flam'.
 Min ja tre
 ĝenis ke
 ĉio iĝis
 morta pase'.
 Ve,
 ve,
 ve!

En ĉi tiu poemo videblas unue ĝoja kaj poste desaponta sentoj.

Miĉino (Ĉinio)**Malĉipa Pugo**

—laŭ ĉinesko Tiaoxiaoling
Pugo, pugo,
eĉ en ofic-flugo
ankaŭ rangojn havi
ne forgesis pavi.
Vipa, vipa
draŝ' al luks' malĉipa.

Oni povas senti sarkasman kaj abomenan sentojn de la poeto.

Krome, oni povas senti la muzikan efekton de ĉineskaj poemoj pro ties ripetadaj samrimoj relative fiksitaj, kiel supre cititaj ekzemploj. Fakte, en la antikva Ĉinio, tiuj skemoj estis melodioj, laŭ kiuj oni povis kanti, kiam poetoj donis tekstojn. Sed poste, kun tempopaso, la melodioj iom post iom perdiĝis kaj nur tekstoj restas ĝis nun. Tamen la rimoj adaptitaj al muziko ankoraŭ ludas la rolon de muziko.

Dum pli ol kvardek jaroj da disvolviĝo, la mondo ekkonas ĉineskon laŭgrade. Oni povas trovi ĉineskajn poemojn en multaj revuoj kaj gazetoj. La revuo ekster Ĉinio, kiu plej frue publikigis ĉineskaĵojn, estis *Preludo* en Japanio⁷. En sia novembro n-ro de 1989, *Preludo* publikigis serion da ĉineskaj de Guozhu je funebro pri Honfan, la veterana pioniro de ĉina EM. Poste, ĉineskaj aperis ankaŭ en aliaj revuoj ekster Ĉinio, ekz-e en IPR, la organo de ILEI, la prestiĝa *Heroldo de Esperanto*, influohava beletra revuo *Fonto*, *Sennaciulo*, organo de SAT, la beletra literatura revuo *BA*, *Gazeto* k.a.

En 1991, Lu Jixin verkis bruŝuron *Invit' al Ĉinesko*, kiu ne povis trovi eldonejon en Ĉinio. Feliĉe ĝi ricevis favoran akcepton de Gerrit Berveling, kiu eldonis ĝin en 1995 en Breda, Nederlando, kiel la n-ran 13 inter la VoKo-serio. Tiu ĉi 28-paĝa broŝuro kolektis 7 ĉineskojn *Tiaoxiaoling*, *Dekses-silabo* kc. kun 75 specimenoj versitaj de la aŭtoro, tial ĝi legiĝas ankaŭ kiel individua poemaro de Lu.

Leginte ĉineskaĵojn, la granda poeto William Auld estis tiel entuziasmigita ke li verkis favoran recenzon *Ekjuku la poeta mano* kaj esprimis sian bondeziron: “Mi esperas, ke la tria eldono de Esperanta Antologio enhavu originalajn *Ci*-ojn ankaŭ de poetoj ne-ĉinaj.”⁸ La fakto, ke ĉinesko senĉese aperas en diversaj Esperantaj revuoj kaj pli kaj pli neĉinaj esperantistoj partoprenas en kreado de ĉineskaj poemoj, indikas, ke ĉinesko jam fariĝis internacieca en la vera senco.

Ĉu ĉinesko evoluos plu? La respondo estas absoluta JES! Nun la organizanto de kreado kaj esploroj de ĉineskaj poemoj estas la retejo *Elerno*. Krom aperigi ĉineskajn versojn, ĝi kolektas kaj bitigas libroforme tiajn poemojn. De 2007 ĝi produktas libro-serion sub la titolo *Ĉineske*. En aprilo de 2019 jam aperis *Ĉineske* (19)⁹. Kaj aliaj dekkelkaj bitigitaj libroj pri Ĉinesko povas esti elŝutitaj en la retejo. Fakte la eldonado de tia libro-serio markas, ke ĉineskaj poemoj elkoviĝas preskaŭ ĉiutage kaj la esploroj pri ĉinesko neniam ĉesiĝos.

Laŭ la tendenco de evoluado de ĉinesko, oni fokusiĝas ĉefe sur du aŭ tri skemoj, kiuj estas relative mallongaj kaj facilaj, kiaj *Sopir-al-sudo* kaj *Dekses-Silabo*. En pasintaj du jaroj, la aperigitaj pecoj de ĉineskaĵoj preskaŭ apartenas al tiuj du skemoj. Ekzemple la serbia esperantistino *Jadranka Miric*, kiu aktivas ankoraŭ ĝis nun, preskaŭ verkas nur ĉineskaĵojn laŭ la skemo *Sopir-al-sudo*. Oni rajtas kredi, ke ĉiuj ĉineskistoj iom post iom maturiĝos kaj produktos pli da ĉineskaĵoj kun diversaj temoj en proksimaj jaroj.

Notoj:

1. ĝia skemo: ses versoj de 4, 6, 6, 6, 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de a, a, b, b, c, c. La 4 silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono' roso-soro.

2. <http://www.ipernity.com/group/cxinesko>

3. <http://www.elerno.cn/elibro/Cindy%20Mckee%20cxineskas.pdf>

4. <http://www.elerno.cn/elibro/Jadranka%20Miric.pdf>

5. Pusaman (Budhista dancisto): ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

6. Lia originala poemo legiĝas:

When you are old and grey and full of sleep,
And nodding by the fire, take down this book,
And slowly read, and dream of the soft look
Your eyes had once, and of their shadows deep;
How many loved your moments of glad grace,
And loved your beauty with love false or true,
But one man loved the pilgrim Soul in you,
And loved the sorrows of your changing face;
And bending down beside the glowing bars,
Murmur, a little sadly, how Love fled
And paced upon the mountains overhead
And hid his face amid a crowd of stars.

7. Preludo, n-ro 24, p.9~10. La serio konsistis el 4 ĉineskaĵoj “Sopiro al Fora Homo” , “Kora Sento”, “Korva Krio en Nokto” kaj “Lanta Sontreniĝo”, kun intence elektitaj titoloj konforme al la funebra atmosfero.

8. Fonto, n-ro 175. p.28

9. Oni povas elŝuti ĉiujn kajerojn de *Ĉineske* ĉe:
<http://www.elerno.cn/elibro/elibro/htm>

Veĵdo

Serĉado por saĝo

el rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

La reĝo

aŭdis ke lia

regnan' Afanti estas
saĝa kaj multescia
kaj simpatia.

La reĝo
post longa vojaĝ'
lin vizitis kaj ĉuis:
"De kie jen via saĝ'
venas al kap-kaĝ'?"

Afanti
respondis sprite:
"Mi ĝin serĉadis ĉie
malfacile kaj ŝvite,
kaj senhezite."

"Ĉu trovi
ĝin oni povas?"
"Jes certe, via moŝto!
Vi hojon fose movas
kaj ĝin ja trovas!"

La reĝo
ekĝojis pro dir'
lia kaj pensis en si:
"Oni nomas per delir'
min malsaĝa vir'.

Se trovos
mi saĝon vere,
mian kapon plenigos
mi ja per ĝi prefere
kaj tre fiere,

kaj krome
da ĝi kestojn du
mi kaŝe konservos por
mia fil' por onta ĝu'

kaj dispono plu.”

Post tio
la reĝ’ ordonis
lakeon preni hojon,
sekvi l’ viron proponis,
ĉevalon spronis.

Post longa
iro peniga
ili haltis ĉe terpec’
sovaĝa, senlirika
kaj sentrafika.

Afanti
demetis jakon
kaj petis al la reĝo
forigi sian frakon,
eki fos-hakon.

Fosadis
longtempon ili,
plenaj de granda ŝvito,
sed ne trovis tie ĉi
ion de magi’.

“Kial mi
saĝon trovis ne?”
ĉuis la reĝ’ kolere.
“Malpaciencu ne tre,
fosu re kaj re!

Ni plugu
teron aŭtune,
semu saĝon printempe,
jen rikoltu ĝin kune.
Ni fosu nune!”

Demandis
la reĝ' scivole:
“Ĉu l' saĝ' dirita de vi
'stas gren' kreskinta ore
en ter' frivole?”

“Ja prave!”
diris Afanti,
“Se ne estus gren' ĉe vi,
vi volus ĝin serĉanti
sen aroganti?”

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

